

The Australian Esperantist

("La Rondo")

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15ŝ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5ŝ.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.
Adreso de A.E.A.—Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.
Kasisto: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

N-ro 1 (81).

MELBURNO.

Jan.-Feb., 1958.

SUKCESPLENA KONGRESO EN MELBURNO

S-ino Ruby Hutchison malfermis la 11-an Aŭstralian Esperanto-Kongreson. Nia 11-a Kongreso, kiu okazis de la 2-a ĝis la 8-a de Januaro 1958 en Melburno, estis unu el la plej bonaj iam organizitaj en Aŭstralio.

Jam la nombro de la aliĝintoj—117—estis rekordo. Fakte partoprenis la kongreson 84 gesamideanoj, el ĉiuj ŝtatoj de Aŭstralio kaj el Nov-Gvineo. Gi staris sub la alta patroneco de s-ino Ruby Hutchison, membro de la supera ĉambro de Okcidenta Aŭstralio, de s-ano Roy Rawson, membro de la supera ĉambro de Viktorio, kaj de s-ano Ralph Harry, lastatempe Aŭstralia Komisiito en Singapore. Eĉ la vetero—ĉiam tre duba afero en Melburno—multe favoris nin; la suno brilis dum la tuta kongressemajno kaj venteto refreŝigis nin dum la vesperoj.

La nova, bela (kaj cetera tre multkosta) "Memorial"—halo de la Y.W.C.A. estis la plej taŭga loko por nia festo. La Kongres-Komitato (D-ro Fred Williams, Prez.; Herbert Koppel, Sekr.; Ken Linton, Kasisto; Glennys Calwell, Koncerta kaj s-roj E. McKenzie & M. Cohen) dum multsemajna laboro antaŭaranĝis ĉion kaj kiam alvenis la ges-anoj el la aliaj ŝtatoj, ĉio funkciis glate kiel bone oleita maŝino. En la kongres-ejo staris libro-stando preta por servi la anojn (prizorgita de f-inoj A. Paling & R. v. Rijswijk kaj s-ino O. Glenie) kaj ekspozicion preparis Ges-roj S. Milligan. La nova granda kongresflago de A.E.A. (zorge preparita de s-ino F. Koppel) kaj grandega bildo de la Majstro ornamis la scenejon.

La programo anticipis 3 prelegojn de la vojaĝanta UEA-komitato Tibor Sekelj, kiu lastmomente ne povis forlasi Hindujon, kaj ankaŭ prelegon de s-ino Datoe Toemeng-goeng, kiu ne povis veni el Indonezio pro la politika situacio tie. Sed post kelkaj sendormaj noktoj de la kongressekretario, la programo rearanĝigis dank' al la helpoj de ges-roj Hanks, s-ro F. Taylor (Albury) kaj s-ro K. Linton, kiuj ŝtopis la breĉon per 3 interesaj prelegoj.

Propaganda Laboro

Kelkajn tagojn antaŭ la kongreso la kongressekretario kontaktis per "Gazetarservo" ĉiujn Melburnajn tag-jurnalojn kaj la Australian Associated Press. Sekve de ĉi-tiu informado aperis kelkaj artikoloj pri la kongreso, kaj la diversaj radiostacioj menciis nian kongreson en siaj novaj-servoj. La A.B.C.-Televida Stacio ABV-2 invitis D-ron F. Williams al intervjuo, cetera la unua Esperanto-televida prelego en la historio de la aŭstralia E-movado. F-ino G. Calwell, kiu deĵoras ĉe la radio-stacio 3DB, sukcesis aranĝi sufiĉe longan intervjuon en la "Virina Horo", inter la populara 3DB prelegistino "Stephanie" kaj nia Ruth McGrath (Perth).

La Kongreso komenciĝas

Post kunveno de la komitatoj de ĉiuj E-kluboj en Aŭstralio (ĉe YWCA), komenciĝis la kongreso je jauda, 2/1, per la Bonveniga Fest-

manĝo, kiu okazis en la Restoracio MAAS en St. Kilda. Inter la honoraj gastoj oni vidis s-inon Ruby Hutchison, membro de la supera ĉambro de Okcidenta Aŭstralio, kaj s-anon Ralph Harry, kiu ĵus revenis el Singapore, kie li deĵoris kiel Aŭstralia Komisiito.

La diversaj manĝoj ja estis tre bongustaj, sed la servado tro malrapida, kio kaŭzis ke la ĉeestantoj bonhumore nomis la kunvenon "mal-SAT-kongreso". Post la manĝo, en la oficiala parto de la vespero, D-ro F. Williams laŭvice prezentis la diversajn salutantojn. Unue s-ino R. Hutchison alportis la saluton de la Nov-Zelanda E-Kongreso, kiun ŝi, kelkajn tagojn antaŭe, partoprenis en Auckland. Nun estis la vico por s-ino R. McGrath (Perth), s-ro McKenzie (Melbourne), s-ro N. Gamble (Canberra), s-ro W. Chandler (Sydney), kaj s-ro S. L. Parry (Brisbane), kiuj salutis en la nomo de siaj kluboj. Je la fino s-ro H. Koppel prezentis s-anon Ralph Harry, kies paroladeton la ĉeestantaro akceptis kun granda aplaŭdo.

Malfermo de la Kongreso

La Solena Malfermo okazis la 3-an de Jan. Post bonvensalutoj de la kongres-prezidanto (D-ro F. Williams), malfermis la kongreson S-ino Ruby Hutchison. Ŝi aludis al la UNESKO - rezolucio pri Esperanto kaj emfazis ke la enkonduko de Esperanto en la lernejojn multe kontribuas al pli bona interkomprenado inter la homaro.

Post honorigo de la mortintoj de post la lasta kongreso, s-ano Roy Rawson rakontis pri pasintaj tagoj de la aŭstralia E-movado. S-ro K. Linton (ĉefdel de UEA) kaj s-ro M. Leereveld (SAT-peranto) salutis en la nomo de la du grandaj tutmondaj E-organizoj, kaj s-ro Stan Milligan (en skolt-uniformo) alportis la saluton de la Skolta E-ista Ligo.

Pere de magnetofonaj sonbendoj venis salutoj de la japana, sveda kaj brazila E-movadoj. Elstaris la belsona Esperanto de D-ro Hideo Yagi (japana UEA-ĉefdelegito). Por la aŭstraliaj E-societoj salutis s-ino Sedgley (Perth), s-ro Parry (Brisbane), s-ino J. Torr (Canberra), s-ro E. McKenzie (Melbourne). Telegrafaj salutoj ankaŭ venis de s-ro Tibor Sekelj (Bombay), D-ro Eini-

hovici (Perth) kaj ges-roj Matasin (Sydney).

La festparoladon faris s-ino Grace Barlow (Sydney) en sia kutima entuziasmiga maniero. En la nomo de aliŝtataj delegitoj ŝi dankis al la Melburnanoj pro la bona organizado de la kongreso kaj esprimis esperon ke ĉiu reiru al sia hejmurbo plenplena de entuziasmo daurigi la laboron por nia komuna afero. Per komuna kantado de La Espero finiĝis la digna malfermo, kiu estis bele ornamita per ĝuinda muziko, prezentita de 3 studentoj de la Melburna Konservatorio.

Prelegoj kaj Seminario

Kiel ĉe antaŭaj kongresoj ankaŭ ĉi-foje okazis aro da altnivelaj prelegoj. Pens instiga estis la prelego de s-rino Grace Barlow pri "Romantiko kaj Realismo" (3/1). S-ino Barlow ĉiam elektas interesan temon kaj kapablas teni la intereson de la aŭdantaro. Samvespere, s-ro Frank Taylor (Albury) montris belajn lumbildojn pri sia vojaĝo al la Univerŝala Kongreso en Kopenhago. Nia redaktoro, s-ro F. R. Banham, prelegis 4/1 pri "Recenza Relativeco", kiu temis pri recenzoj de E-literaturo kaj la plej elstaraj recenzistoj. Samvespere ges-roj E. Hanks prelegis kun belaj lumbildoj pri "Aŭstraliaj Arboj."

Pri "La Epoko de Malraco" prelegis s-ro F. Mueller-Sorau (Sydney) (5/1). Kvankam ne ĉiuj ĉeestantoj samopiniis pri la nutraj-kaj vivreformistaj ideoj de la preleganto, ili tamen devis respekti la sinceran kaj konvinkan manieron per kiu la preleganto traktis la temon. Lin sekvis s-ro Ken Linton, kiu legis 2 interesajn ĉapitrojn el sia libro pri Nov-Gvineo. S-ro Ross Robbins, Nov-Zelando kiu nun loĝas en Canberra, prelegis, 6/1, pri "Botanikisto sur Tropikaj Insuloj". Li montris belajn bildojn pri siaj vizitoj al Jamaiko kaj Nova Gvineo. Samvespere ni aŭdis sonbendajn salutojn de la aŭstria E-movado al nia kongreso kaj D-ro F. Williams prezentis al la ĉeestantaro s-ron W. J. Drummond, kiu ĵus festis sian 50-jaran Esperantistecon. S-ro Drummond mem alparolis la kunvenon kaj rakontis pri pasintaj tagoj.

S-ro Ken Linton denove gvidis Lingvan Seminarion, kiu konsistis el 3 preletoj pri gramatikaj malfacilaĵoj. La partoprenantoj sekvis kun intereso liajn preletojn kaj nur bedaŭris ke tempo ne permesis pli longan kaj pli detalan traktadon de la temoj. Ni publike dankas al s-ro Linton pro lia grandega laboro antaŭ kaj dum la kongreso. Kiel kasis-to li estis jam plene okupita dum la tuta kongressemajno, sed tamen li trovis tempon ankaŭ gvidi la Seminarion, fari prelecon kaj konduki la U.E.A.-kunvenon. Krome el liaj penoj rezultis la belaj kongres-insig-noj kaj poŝtkartoj.

Di-Servo

Dimanĉe, 5.1., okazis en YMCA la Di-Servo. Ĝin gvidis digne D-ro Fred Williams. El la Nova Testamento laŭtlegis f-ino W. Addis (Adelaide) kaj s-ino Ruth McGrath (Perth). Post la Servo oni kolektis monon por la Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj; entute kolektiĝis £7/10/9.

Labor - Kunsidoj

Okazis unu U.E.A., du S.A.T. kaj kvar A.E.A.-kunvenoj dum la kongreso; krome tri kunvenoj de komitatoj.

S-ano K. Linton gvidis la UEA-kunvenon kaj anoncis ke Aŭstralio tre verŝajne gajnos "Konkurson II" de la Internaciaj Konkursoj 1957 de UEA. Li alvokis al pli forto subteno de UEA kaj speciale petis gesanojn anonci sin kiel Delegitoj en lokoj kie ankoraŭ tiuj ne ekzistas. Li ankaŭ raportis pri la helpo kiun li donis al multaj eŭropaj enmigrintoj al Aŭstralio, el kiuj kelkaj ĉeestis la kunvenon.

La unua S.A.T.-kunveno okazis 4.1. SAT-Peranto M. Leereveld prelegis pri la "Evoluo de la Homaro". Okazis, post la prelego, interesa diskuto kaj s-ino G. Barlow dankis la preleginton. La duan SAT-kunvenon, 7.1., estris s-ino G. Barlow. La Peranto donis detalan raporton pri la SAT-laboro en Aŭstralio kaj respondis al demandoj de la membraro. S-ro V. Gueltling klarigis la diferencon inter S.A.T. kaj U.E.A. S-ino G. Barlow laŭtlegis parton de la SAT-Regularo.

A.E.A. kunvenoj diskutis pri la asocia organo, la Aŭstria Antologio kaj la AEA-Regularo.

La modela kasraporto de s-ro Linton montris kontentigan staton de la financoj kondiĉe ke nur 6 n-roj de "La Rondo" estas jare eldonataj. Por pli da eldonoj necesas aŭ pli da abonantoj aŭ pli alta kotizo. La kongreso akceptis (kontraŭ la voĉo de s-ro Gamble), do la plialtigon de la kotizo al 15/-.

Longaj estis la diskutoj pri la eldono de la "Aŭstria Antologio". La kongresanaro samopinias kun s-ino Barlow ke la libro "Australian Signpost" ne sufiĉe bone reprezentas la aŭstrian literaturon. Kontraŭe, la enhavo de tia libro estu zorge elektota kaj la unua tasko estu trovi taŭgan redaktoron. La kongreso fine akceptis proponon de s-ro Linton ke AEA trovu unue spertan redaktoron, kiu krome havu 2 konsilantojn (aŭ "subredaktorojn"). S-ro Linton estis komisiita trovi taŭgan redaktoron.

La diskutoj pri la A.E.A. regularo okupas ĉe ĉiu kongreso multajn horojn kaj ankaŭ ĉifoje oni ne atingis kontentigan celon. Fine estis decidita ke s-rino Barlow kaj s-ro Gamble kolektu amendojn al la regularo kaj komuniku ilin al la membraro ne pli malfrue ol 6 monatojn antaŭ la venonta kongreso (do en Junio 1959).

S-ro G. A. Grant (Brisbane) sendis kontentigan raporton pri la Libro-Servo. La kongreso esprimis la deziron ke li havigu denove el Anglujo la "Korespondan Kurson" de B.E.A. kaj ke la tuta mono de la libro-servo estu uzota por venigi al Aŭstralio plej grandan stokon da E-libroj.

La eldono de A.E.A. jarlibro, laŭ sugesto de s-ino McGrath kaj f-ino E. Bull (Perth), estis akceptita. F-ino Bull deklaris sin preta fari la necesan laboron de multobligado kaj ekspedo.

En la nomo de la Hobarto E-Grupo, s-ro Leereveld invitis la 12-an kongreson al Hobarto, kie ĝi okazos en Januaro 1960.

Estis 9 kandidatoj por la 7-membra A.E.A. estraro, do okazis sekreta baloto flanke de la delegitoj. Elektiĝis: s-ino Barlow D-ro Williams, D-ro Robbins, s-roj Parry, Linton, Leereveld, Koppel. Sub la prezido de la lasta AEA-Prezidanto, D-ro F. Williams, okazis poste la unua estrarkunveno, ĉe kiu elektiĝis:

Prezidanto: D-ro Fred Williams (Melbourne).

Vic-Prezidantoj: D-ro Ross Robbins (Canberra), s-ro M. Leereveld (Hobart).

Sekretario: s-ro H. Koppel (Melbourne).

Kasisto: s-ro K. Linton (Melbourne).

Estraranoj: S-ro Grace Barlow, s-ro S. L. Parry (Brisbane).

La estraro decidis ŝanĝi la nomon de la asocia organo al "The Australian Esperantist", sed reteni dum unu jaro la subtitolon "La Rondo".

En la kadro de la kongreso okazis "Literatura Konkurso" La 1-an premion de £5-5-0 gajnis s-ro P. E. Schwerin (Sydney), per sia rakonto "La Kulmino Mankas." La 2-an premion (£2-2-0) gajnis s-ro F. Mueller-Sorau (Sydney) (Preskau Mi Gajnis la Melburnan Pokalon.") kaj la 3-a premio (£1-1-0) iris al s-ino R. McGrath (Perth) ("Mi kaj la Malamiko").

Je la fermo de la kongreso, D-ro Robbins alvokis la anojn forte labori por nia komuna afero. Li ankaŭ esprimis deziron ke baldaŭ pli taŭga regularo anstataŭu la ĝisnunan. S-ino Barlow dankis la Melburnanojn pro la bona kongreso kaj ĉiuj ĉestantoj kantis "La Esperon".

Distra Programo

Dum la kongresmajno okazis 2 aŭtobusaj ekskursoj. Duontaga ekskurso, 3.1., ebligis al vizitantoj admiri la vidindaĵojn de Melbourne kaj je la lasta tago, 8/1., okazis tre agrabla tuttaga ekskurso tra la Dandenong-montaro.

La granda koncerto okazis mardĉ, 7.1. Preskaŭ ĉiu loko en la granda YWCA halo estis okupita. Varman gratulon meritas f-ino Glennys Calwell, kiu kapablis aranĝi bonan kaj amuzan programon. Elstaris la pianludado de la konata radio-pianistino Mabel Nelson. Kantistinoj alternis kun violonisto kaj kantisto kaj la ŝercoj de la "anoncisto" Ted Nelson kaŭzis tondrajn aplaŭdojn.

Sed la plej granda surprizo por ni E-istoj estis "Minutoj de Magio" de nia s-ano Dr. Ross Robbins. Liaj magiaĵoj estis ne nur tre efikaj kaj okulfrapaj, sed ĉar li parte prezentis sian programon en facila Esperanto, li ankaŭ multe varbis por nia lingvo. Nia nova vic-prezidanto ne nur estas bona E-isto, sed bonega

aktoro kaj artisto, kaj ni ĉiuj esperas revidi lin sur la scenejo en Hobarto.

Por la lasta vespero, 8.1., ni ĝuis la gastamecon de Ges-roj E. McKenzie, S-ro Taylor montris al ni pluajn lumbildojn de sia vojaĝo tra Eurolo kaj D-ro F. Williams transdonis kristalan vazon al f-ino G. Calwell pro ŝiaj penoj aranĝi tiel bonan koncerton. Per bongusta manĝo finiĝis ne nur agrabla vespero, sed ankaŭ sukcesplena kongreso. Eĉ finance la kongreso estis sukceso, ĉar spite de grandaj elspezoj restis profito de pli ol £100, ĉefe pro la penoj de nia kasisto Ken Linton.

Tro rapide forpasis semajno en Esperantujo kaj en la menso de ĉiuj restis nur unu espero: "Ĝis Revido en Hobarto 1960."

Impresoj pri la Kongreso

Estis vere gojige renkonti tiel multe da homoj kiujn mi konis antaŭe nur per la paĝoj de "La Rondo", aŭ per leteroj. Plenumiĝis longjara deziro en la renkontiĝoj vid-al-vid kun S-ro Banham kaj Pastro Cowling—sed ho ve—kiel mizere mallongaj pro tempomanko devis esti la interparoloj kun ili!

Pri la kunsidoj mem ĉefe malplaĉis la ĉiam malfruaj komencoj kaj la preskaŭ senfruktaj kunvenoj de A.E.A. Plaĉis la ĉiam amika atmosfero, la ĝenerale alta nivelo de la prelegoj, la simpla digno de la Diservo.

Kun varma plezuro oni konstatis la grandan pliriĉigon de la movado en nia lando kiun alportis la novevenintoj el Eŭropo. Laste, sed ne lasta, la gastamo kaj ĉiurilata helpemo de la Melburnanoj estis neforgeseblaj.—Ruth McGrath (Perth).

* * *

Multan dankon al la melburnaj gesamideanoj pro la sindonaj preparoj antaŭ ol ni alvenis kaj la granda servo kiun vi faris al ni de la momento kiam ni alvenis en la stacidomo ĝis la momento kiam ni adiaŭis unu la alian ĉe la hejmo de la familio McKenzie.—S. A. Vizitantoj.

* * *

Tre agrable impresis la etoso ĝenerala en la kongreso. La amikeco, sento de frateco, la facila interparolo de diversnacianoj.

Kelke da altnivelaj prelegoj en kiuj "Rocenza Relativeco", "Romantiko

kaj Realismo" kaj "Aŭstraliaj Arboj" plej plaĉis al mi. La Seminarioj de s-ro Linton meritis pli da tempo kaj apartan ĉambron. Plej valora propaĝando troviĝis en "Minutoj de Magio".

A.E.A., U.E.A., S.A.T. havu lokon en aparta ĉambro, tiuj organizoj nur raportu al la kongreso kaj tiel ŝparu tempon por pli interesaj temoj.

Plej ĉagrena afero: la subita postprelega malapero de S-ro Banham, al kiu kelkaj multmejlaj vojaĝintaj kongresanoj volis paroli!

Elstaraj personoj: D-ro Ross Robbins, s-ro Ralph Harry, s-ro H. Koppel. Koran dankon pro bonega kongreso.—"Poloso."

★ ★ ★

Ĉiu kongreso havas sian propran atmosferon kaj tiu de la 11-a estis tre kontentiga. Oni sentis ke la movado vere viglas en Aŭstralio, kaj la kuneco kaj laboro de la kongres-tagoj certigis pluan vivon en la estonteco. Kvankam la komitato kaj la ĉeestantoj multe bedaŭris la nealvenon de s-ro Sekelj, oni devas konfesi ke al la kongreso mankis nenio de intereso kaj plezuro. El la propra forto ni prezentis bonan programon kaj eble la sperto bonefikis nin. Preter laŭdo estis la neforgesebla koncerto kiu finis la oficialan parton.

Elkoran gratulon meritas nia nelacigebla sekretario Herbert Koppel, kies laboro por Esperanto en Aŭstralio estas kronita per ĉi-tiu sukcesplena kongreso. Speciale mi volas gratuli lin pro la fakto ke li elportis kun gajeco kaj kuraĝo la malĝojigan foreston de s-ro Sekelj.

Se kritiko necesas, mi devas kritiki la membrojn mem, kiuj ne sufiĉe profitis el la kongreso por plibonigi en la lingvo, kiuj rifuzis eĉ balbuti en Esperanto. Mi tamen rimarkis ke ĉe multaj s-anoj la nivelo de la parolata lingvo multe plialtiĝis. De kongreso al kongreso ĉi tiu plialtiĝo evidentiĝas; ni ĉiuj devas praktiki kaj studi antaŭ ol ni povas paroli la lingvon kiel Zamenhof ĝin faris. Antaŭen al la perfektigo!

—Grace Barlow (Sydney).

★ ★ ★

Tre ĝinda kongreso por mi, kaj mi certe strebos ĉeesti la 12-an ĉe Hobarto. Plej forta impresio: kiel granda nombro de vere spertaj E-istoj inter la kongresanoj! Kaj kian bonan lingvokapablecon havis la E-

istinoj. Esperanto ja vigne kaj konstante fluis kaj dum la diskutoj kaj dum la klaĉado.

Postkongresaj pensoj: oni ja devas klopodi plibonigi tiun aĉan regularon, sekvontaj kongresoj devus havi interrilatojn—unu kiel daŭriga kunveno de la pasinta. Eble ni bezonas bazajn kongresregulojn, eble konstantan kongreskomitaton? Laŭ nuna sperto ĉiu kongreso ŝajnas tute nova aparta kunveno sen rilatoj aŭ spertlecioj el la antaŭaj kongresoj.

Du petojn: Kongresontoj ricevu almenaŭ ĝeneralan programon de la kongreso du-tri monatojn antaŭ la kongreso. Dum kongreso oni arangu tutesperantan amuzvesperon aŭ koncerton. Povas esti tute aparte de la mongajna publika koncerto—vespero dum kiam la E-istoj povus ĝui E-prezentadon de teatraĵoj k.t.p.

—Ross Robbins (AEA-Vicprez.)

Zamenhof - Festoj

Brisbane: La 15-an de Dec. 1957 okazis la Zamenhofa Festo en Hotel Canberra. Ĉeestis 20 personoj, inkluzive de 2 novaj studentoj.

Dum la festmanĝo interrompis nin Radio Stacio 4 BK, kiu faris multajn demandojn pri la festo kaj la historio de la lingvo kaj sekvintan semajnon disaŭdigis la donitajn informojn.—S.L.P.

Sydney: Nia Zamenhofa vespero estis sukcesplena kaj la vizitantoj tiom multaj ke ne estis sufiĉe da seĝoj. Kelkaj gejunuloj de la Vespida Klubo ĉeestis kaj agrable kantis kaj pianludis. Malgranda Teatraĵo estis prezentita de la Nova Teatro pri "Flugantaj Subtasoj". S-ro Bob Nicholson dancis glavdancon laŭ la skota maniero kaj s-ino Barbara Lysiak kantis popolkantojn.—G.B.

Perth: La 14-an de Dec. 30 Ligan-oj festis la nasktagon de la Majstro unue per ĉefmanĝo en Savoy hotelo kaj poste, kun amikoj, per amuza vespero en la ĉambro de "Women's Service Guild". Ambaŭfoje la prezidanto, s-ino Pollard, bonvenigis la ĉeestantojn, inter kiuj troviĝis niaj 2 amataj dumvivaj anoj D-ro Caldera kaj s-ro Walker.

La nove elektita estraro estas jene: Prez.: s-ino G. Pollard; Vic-Prez.: s-ino R. McGrath; Sek.: s-inq A. Sedgley; Kasisto: f-ino A. Longson;

Biblioteko: s-ino Palmer; Ekzamenoj: f-ino O. Stempel; Propagando: s-ro Finch.—A. Sedgley.

Melbourne: Je 14-a Dec. 50 anoj festis la nasktagon de nia Majstro en la ejo de la Caris Club. Post salutvortoj de la prezidanto (s-ro McKenzie) estis prezentita teatraĵeto "La Fremdulinioj", verkita de s-ino G. Barlow. S-ro McKenzie kantis E-kanton, s-ro H. Koppel deklamis poemon de Raymond Schwartz kaj s-ano Herrmann bele ludis kaj kantis germanajn popolkantojn. Je la fino, s-ro F. R. Banham faris profundsentan festparoladon pri la vivo kaj verko de nia Majstro.—H.K.

LIBERA FORUMO

Post diskuto pri la Melburna Kongreso ĉe nia dusemajna kunveno, la E-istoj de Adelaide decidis peti klarigon pri grava afero. (1) Placūs al ni scii, kial la L.K.K. ne petis iun E-iston el Sud-Aŭstralio doni saluton al la kongreso, kvankam diversaj personoj el ses aliaj ŝtatoj faris tion je du okazoj? (2) Kiu regulo en la A.E.A. statuto forprenis nian rajton paroli?—W. Addis.

LA RONDO

For binding, J. Regulo-Perez, Ap. 25, La Laguna, Tenerife, Canary Isles, Spain, urgently needs n-rs 19, 49, 58. He would recompense with books, &c.

PYKE MEMORIAL EXAM.

Ĉi-jare s-ro Paul Fahey estis la unusola kandidato—por Kategorio B (la premio). Lian provon ni konservas ĝis ni ricevos minimume ses kandidatojn—espereble en 1958. Sub tiu kondiĉo ni juĝos ĝin. Li devas konkursi kontraŭ almenaŭ unu samkategoriano.

Ni emfaze petas, ke oni faru la plej eblon por varbi taŭgajn ekzamenojn por 1958. Ni havu reprezentantojn el ĉiuj ŝtatoj en la venonta Novembro! Cirkuleroj dissendiĝos en la ĝusta tempo. Dume, studentoj, sub bona gvido, devus jam esti preparantaj sin por la tasko.

P. 200: Respondo.—Unu miliono da miloj egalas mil milionojn. Tial dudek milionoj da miloj estas pli granda ol du mil milionoj.

THE A.E.A. EXAMINATIONS

Because the examiners have been tested and approved by La Akademio de Esperanto itself, and because permission has been gained to use the standards, rules and nomenclature of La Akademio, a diploma from the Australian Esperanto Association confers a qualification recognised throughout the Esperanto world.

Those who pass may indicate their standard by putting after their name the initials of the examination.

There are three tests: (1) La Norma Elementa Diploma (N.E.D.).—This certifies that the holder can use Esperanto in writing and speech for the requirements of daily life.

The total cost is 30/- and the standard between the Elementary and Diploma exams of the B.E.A.

(2) La Norma Supera Diploma (N.S.D.).—This certifies that the holder can use Esperanto for literary and technical purposes. The total cost is 30/- and the standard higher than the B.E.A. Diploma or the Pyke. Candidates are advised to succeed in one of those before attempting N.S.D.

(3) La Norma Klereca Diploma (N.K.D.).—This, at a total cost of £3, certifies that the holder has thoroughly mastered Esperanto in every respect and is competent in its structure, history and literature.

This examination seeks to attain University standards and should be attempted only by outstanding students.

Those interested write to Rev. C. C. Cowling, St. Paul's Vicarage, 113 Victoria Street, Ballarat, Victoria.

N.E.D. DIPLOMO

Sukcesis en ĉiu postulo por la Norma Elementa Diplomo:—


S-ino J. P. Pianta, Stud Farm, Harbourne st., Leederville, Okc. Aŭstralio.

F-ino Dorothy Leach, 13E Holland st., Wembley, Okc. Aŭstralio.

"ANGLA ANTOLOGIO" (1000-1800), a monumental work. Edited by W. Auld and R. Rossetti. Published by U.E.A. 319 pages, 30/- Aust. Our chief agent: G. A. Grant, 6 Mikado Street, Hamilton, Brisbane.



Ĉe la malfermo. De maldekstre al dekstre: S-ino A. Sedgley (Perth), S-ino Grace Barlow (Sydney), S-ino Ruby Hutchison (Perth), S-ro Ken Linton (Melbourne), S-ro Roy Rawson (Melbourne), D-ro Fred Williams (Melbourne), S-ro Marcel Leereveld (Hobart), S-ro Herbert Koppel (Melbourne), S-ro S. L. Parry (Brisbane).



La Kongresanaro.

The zinc plates for these Congress photographs were generously given by the Apex Engraving Co. Pty. Ltd., Melbourne, as a mark of sympathy with our movement, through our Treasurer, Mr. Ken Linton.

Recenzoj

AMARA PANO: Jozsef Darvas; trad. el la hungara Ladislao Somlai; eld. Dana Lab. Esp. Asocio, ĉe M. Jacobsen, Rydersvej 9, Arhus, Denmark. 112 p., 1 dol.

La amo al mono estas radiko de ĉia malbono. Manko de mono povas tiel same fi-efiki sur la mizerajn homojn. Atestas tion ĉi-verko pri la malriĉaj kampuloj en Hungarujo antaŭ la milito. La aŭtoro lertstreke pentras bildojn el tiu tempo de brutecaj bienĉefoj kaj senrajtaj servutuloj.

Tra ĉio blovas odoro de hordekampoj, fetoraj kabanjoj, ŝvitantaj laculoj. Al Dio aŭ diablo flugas la kolera krio de mastro, dolora delirio de naskanto, pepa plendeto de juskaskito, veplena voko de kampsklavo spiranta la simplan juston.

Pere de fanatika aŭ oportunisma aŭguristo, la ĉeffiguro konatiĝas kun la religio. Komence logata de la hom-egaliga Kristo, li fine tamen rifuzas plu atenti sian strangan orakolon, kies kromaj instruoj, pro absurdo, poste lin naŭzas.

En la lastaj paĝoj ni vidas lin, patron kun filo, frontanta la estontecon kun instinkta, emocia, tamen ne racie bazita espero al pli justa aferstato. Mankas indikoj, ke li eĉ scietas pri la maniero laŭ kiu povus pliboniĝi la besteca sorto de tiuj hungaraj laboristoj.

La verko impresas kiel fidinda priskribo de tempo pasinta, sed malmulte diras pri faktoroj generantaj novan socion.

"**LA VIVO DE LA PLANTOJ,**" an expanded and revised version in Esperanto of a remarkable work on plant biology by Paul Neergaard, acknowledged Danish authority in this field. With profound but clearly expressed scientific analysis of phenomena he blends a warm humanism and a literary charm reminiscent of Richard Jefferies. The shorter Danish edition appeared in 1956. Of 128 pages, the Esperanto edition is richly illustrated by the eminent Mads Stage and contains an exhaustive glossary of botanical terms. 2 U.S. dol. Publishers: Stafeto, Ap. 25, La Laguna, Tenerife, Canary Isles.

"LA FARAONO"

A new edition of this wonderful story of ancient Egypt by B. Prus, in the translation of Kabe (K. Bein). Three magnificent volumes of over 900 pages in all. Kabe was acclaimed in his day as the greatest stylist in Esperanto, barring only Zamenhof himself. (Review to appear.)

Price is £2. Contact our agents. "Ars Polona" is the publisher; address, Foksal 18, Warsaw 10. Bankers: Narodowy Bank Polski, Warsaw. Money may be forwarded through any Post Office.

To booksellers a discount of 25% is made, which increases with the quantity of copies ordered.

* * *

GRAND DICTIONNAIRE ESPERANTO - FRANCAIS, by G. Waringhien, Professeur agrege de l'Universite; director of the section: Generala Vortaro (Esperanto Academy). 368 p., perfect paper and legibility; well bound. 55/- Australian, plus 10% postage. An excellent work; all interested in the French language should have it. Librairie Centrale Esperantiste, 41, rue Descartes, Paris.

* * *

La Akademio de E-o ekceptis alvokon de **Internacia Geografa Asocio** por kreo de komisiono pri geografiaj nomoj (5 membroj de la Akademio kaj 5 de I.G.A.). Tiu decido estas tre grava por la movado, ĉar ĝi povas helpi al solvo de plurjardeka problemo.

"**Geografia Revuo**" estas ilustrita 32-paĝa organo de I.G.A. kun artikoloj pri landoj kaj loĝantoj en div. partoj de la mondo. La dua n-ro jam estas en presejo kaj aperos eble sur 52 paĝoj. Jarabono: 10ŝ. pagebla al S-ino Irene Fink, 100 Headingley Rd., Mt. Waverley (Vic.). Cefred. estas Tibor Sekelj, antropologo kaj esploristo. Ni rekomendas tiun revuon. Ĵarkotizo al I.G.A. estas 5ŝ.

Membroj de U.E.A., kiuj deziras havi la Belarton Aldonon al la revuo, bonvolu sendi sep silingojn al la ĉefdelegito, S-ro K. G. Linton, 11 Poplar St., South Caulfield, S.E.8, Vic.

The Australian Esperantist

("La Rondo")

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15ŝ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5ŝ.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.
Adreso de A.E.A.—Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.
Kasisto: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

N-ro 2 (82).

MELBURNO.

Mar.-Apr., 1958.

ESPERANTO AND THE PRESS

New Note of Dignity Displaces Former Facetiousness.

The 42nd World Esperanto Congress in Marseilles was a particularly brilliant success. 1468 persons from 38 countries were present, and many more would have come had they been able. Never before had any such Esperanto gathering received such wide attention from the newspapers, and never before had the tone of the reports been so informative and objective in describing the event. Reporters were introduced to ably equipped and well-informed Esperantists, whom they interviewed with mutual profit.

While we must assume that presentation of Esperanto affairs by the popular tabloid papers will for some time be conditioned by the lightsome, jocular approach presupposed as desired by the large page-riffling element among their readers, there is a reason to believe that with wider acceptance of Esperanto by recognised centres of activity, cultural and economic, the public will become prepared to look for more sober and sustained treatment in the large-circulation press also.

"The Times Literary Supplement" (July 26, 1957) provides an example of the fair and balanced approach to Esperanto that is now frequently a feature of references to the language in the better-class newspaper. It also mentions ways by which Esperanto could be brought into larger prominence by association with significant social institutions. After re-

viewing the history, nature and attainment of the language, the writer concludes:—

"The value of Esperanto for educational, scientific, cultural and diplomatic purposes has been officially recognised by Unesco; the Sixth American Congress of Educationists recently held in Montevideo recommended the teaching of Esperanto in American schools; and the French Ministry of Education is now considering accepting Esperanto as an alternative language in the baccalaureat. The 70-year-old language is not doing too badly."

It is evident that the changing face of the world, and the ever more clamant need for an international speech-medium in the various fields of human endeavour, coupled with the growing status of Esperanto as a proved instrument for such, has brought to serious journalism a wider appreciation of the problem and a more intelligent approach to the facts.

PROOF OF THE PUDDING.

"One of the less well publicised features of the recent World Youth Festival in Moscow was a meeting in which delegates from 15 countries conversed in Esperanto without needing the services of a single interpreter. This illustration of the utility of an international language of this kind came exactly 70 years after its creator, Dr. L. Zamenhof . . . had

published his first pamphlet of explanation in July, 1887"

—The Manchester Guardian Weekly," 12/9/57.

Australia Kroniko

● **SYDNEY:** La jarkunveno de la Sidneja E-Societo elektis estraron: Prez. S-ino Grace Barlow; Vicprez: S-roj W. Chandler, J. Matasin and F. Mueller-Sorau; Kasisto: S-ino Kay Morrison; Biblioteko: F-ino F. Smith.

La vizito de s-ino Hintze (Melbourne) donis grandan plezuron kaj instigon al la membroj kaj ni ĝuis ŝian paroladon pri la fruaj tagoj de la movado.

Ĉe la amuzvespero, la 1-an sabaton en Marto, ni prezentis interesan ĉehan filmon "Heroldo de la Tagiĝo". Ĝi havis historian temon kaj kelkaj studentinoj de gimnazio kaj de la sidneja universitato ĉe-estis. Oni uzis tiun okazon por fari propagandon por nia afero.

En Marto ni fine aĉetis novan fortepianon, kiu estos daŭra memorajo al nia mortinta amikino Ethel Cooke.

—Grace Barlow.

● **PERTH:** Jaŭdon, 20/2, kelkaj Liganoj kunvenis en la Lig-ĉambro. S-ino McGrath donis raporton pri la 11a Tut-Aŭstralia E-Kongreso en Melburno kaj la membroj diskutis diversajn aferojn.

Bedaŭrinde nia nova oficiala propagandisto s-ro J. Finch foriris el Perth. Ni ja sentos la mankon de lia vigla personeco inter ni.

Post kelkaj jaroj kiel loka peranto por la A.E.A. Libro-Servo, f-ino Edna Chandler ekŝiĝis de tiu ofico. S-ro Finch konsentis agi kiel peranto, sed lia laboro en kampara urbeto devigis ankaŭ lin ekŝiĝi.

—A. Sedgley.

● **BRISBANE:** Dum Januaro ne okazis kunvenoj de la Societo. Por eviti interrompon al la klasoj, la lernantoj estis prizorgitaj de S-ino V. Fraser kaj S-ro Grant. La Societo reklamis en la ĉiutagaj gazetoj kaj anoncis novan kurson kiu komenciĝis 24 Feb.—S. L. Parry.

● **CANBERRA:** La jarkunveno de la Kanbera E-Klubo okazis 24 Feb. kaj oni elektis estraron: Prez.: D-ro Ross Robbins; Vic-Prez.: S-ro H.

Torr; Sekretario: S-ro N. Gamble; Help-Sekretariino: F-ino J. Channon; Kasistino: S-ino J. Torr; Biblioteko: S-ino C. Fulop; Propagando kaj raporto al "Aŭstralia E-isto": S-ro H. Torr; Kaskontrolanto: S-ro C. John.

Oni elektis kiel unuan honoran dumvivan membron de la klubo, s-ron Gerald Whiteford, pro lia longa kunesto kun la E-movado kaj pro lia helpo al nia klubo. La klubanoj ankaŭ registris dankon pro la donaco de 30 tre malnovaj E-libroj, flanke de s-ro Whiteford. La loka tag-gazeto "Canberra Times" publikigis detalan raporton pri la jarkunveno, du tagojn poste.

Almenaŭ dum la vintraj monatoj, la klubanoj kunvenos regule je la 3-a merkredo en ĉiu monato, en la domoj de la anoj laŭvice. Krom tiuj kunvenoj, la kutimaj klasoj por komencantoj kaj progresintoj daŭros funkcii.

La anoj konsentis plialtigi la kotizon de la klubo, pro la plialtigo de la A.E.A. kotizo, sed samtempe decidis protesti kontraŭ tiu-ĉi lasta, ĉar estas eble presigi la gazeton pli malmult-koste per aliaj metodoj, kiel klarigite antaŭe de s-ro Gamble, kaj letere antaŭ la Melburna kongreso kaj ĉe la kongreso.—H. Torr.

(Rim. de la A.E.A. Sekretario: S-ro Gamble proponis presadon de nia gazeto pere de la "Varitype"-maŝino. Mi kontaktis la aŭstralian reprezentanton de tiu maŝino, s-roj Stott & Hoare Ltd., kiuj respondis ke nek ili mem, nek iu el iliaj klientoj, kiuj posedas "Varitype" maŝinon, deziras presigi gazeton en Esperanto. Tiu respondo estis sendita al la Prez. de la Kanbera Klubo.—H.K.)

● **MELBOURNE:** Post la sukcesplena kongreso, la Melburna E-Klubo ekagis kun vigla programo. Je 15/1 s-ino McGrath parolis pri la E-movado en Perth, dum s-ro Parry rakontis pri la movado en Brisbane. D-ro F. Williams kaj s-ro W. Drummond gvidas 2 kursgrupojn por komencantoj kaj s-ino F. Koppel daŭrigas sian tradukan klason.

Je 22/1 s-ro E. McKenzie rakontis pri "Teatroj en malnova Melburno", kaj je 29/1 ni aŭskultis al sonbendoj senditaj de vienaj E-istoj. Je 5/2 s-ro K. Linton prelegis pri E-gramatiko kaj s-ro Schilperoord rakontis

Anekdotojn. Je 12/2 s-ro H. Koppel prelegis el E-gazetoj kaj s-ro S. Bursztein parolis pri la temo "Kiel malstreĉigi".

Skota edukisto s-ano Brockie rakontis, 19/2, pri nia movado en Edinburgo kaj s-ino I. Schilperood, estinta Londonanino, tre interese skizis la kluban vivon de la granda Londona E-Klubo. "Observoj ĉe la 11a Aŭstralia E-Kongreso" de D-ro A. Fridenbergs (26/2) estis kaj interesaj kaj amuzaj. Je 5/3 s-ro K. Linton prelegis pri E-gramatiko kaj s-ino F. Koppel priskribis aŭtomobil-vojaĝon de Melbourne al Adelaide. Pri "Astronomio" prelegis 12/3 s-ro McKenzie kaj je 26/3 s-ro Rolding montris kiel kalkuli pasintajn tagojn de la kalendaro.

Ĉe la jarkunveno, 19/3, oni elektis kiel estraron: Prez.: s-ro E. McKenzie, Vic-Prez.: s-ro Drummond; Sekr./Kasisto: s-ro Cohen; Biblioteko: s-inoj Hill & Schilperood; Estraranoj: s-ro P. Schilperood kaj s-ro H. Koppel.

Ĉe la monataj kunvenoj de la RENDEVUO ni ĝuis eksterordinare bonan programon. En Januaro s-ro P. Schilperood prelegis pri la vivo kaj verko de Louis Braille, la inventisto de la Braille-sistemo por Blinduloj. Blinda s-ano Wilson montris al ni la legadon laŭ la Braille-sistemo, laŭlegante el E-gazeto por blinduloj. En Februaro ni ĝuis prelegon de nia eminenta amiko, s-ro Ralph Harry, kiu prelegis pri Singaporo, urbo kie li deĵoris kiel aŭstralia komisiito. Li ilustris sian prelegon per memfaritaj belaj koloraj filmoj. Ni esperas pli ofte aŭskulti al prelegoj de nia E-diplomato. En Marto, s-ino I. Fink, kiu loĝis dum multaj jaroj en Maroko, rakontis al ni pri tiu interesa lando. Tro rapide forflugis la tempo kaj la prelegistino devis promesi daŭrigi sian prelegon en kelkaj monatoj.—H.K.

CITOTJ INCITAJ.

Dues (3 dol. and up) to the Esp. League for North America are tax-deductible. Sir A. Fadden, please note.

"If the Soviet Union goes for Esperanto there will be a battle of ideas, in which the international language will be more potent than the H-bomb. Let's have more American

than Russian E-ists in the argument, and may the best idea win!"

—North American Esperanto Review.

"La Infana Raso" ekkaptas sian leganton kaj firmtenas lin ĝis la lasta linio . . . kaj la legado tute ne estas malfacila". (—samgazete.)

"Pri la Rusa satelito? Nu, tio estas ekster nia sfero."—Ano de la Brita Fremdafera Ministrejo.

"(Zamenhof) plene posedis nur la germanan lingvon, apud la pola—gepatra." Tiam sube: ". . . la pola . . . sola lingvo, kiun li plene posedis". "British E-ist", Aug., 1921. Eble post 36 jaroj la aŭtoro, Petro Stojan, jam venis al pli justa konkludo.

ZAMENHOF, ESPERANTO KAJ NI.

Parolado havita antaŭ la Melburna Zamenhof-Festo, Dec. 14, 1957.
F. R. Banham.

Kelkaj historiaj nomoj bone taŭgas al la portantoj de tiuj nomoj.

STALIN—la homo de l'ŝtalo.

CHARLES MARTEL—la martelo kontraŭ la Gotoj.

MOLOTOV—ankaŭ "martelo", homo de drastlingva rebato. Ruse la vorto-nomo signifas "martelo".

Povas esti, ke ankaŭ mi modestulo estas taŭge nomita, ĉar, kiel preskorektisto, mi malpermesas la erarojn—laŭeble—do "Ban'em!"—malpermesu ilin!

Precipe en la Biblio ni rimarkas tiun fenomenon. Ciu granda figuro havas nomon, kiu trafas indikas lian signifon, karakteron, en la vivo.

La nomo ZAMENHOF estas Germandevena—Samenhof. Ĝi signifas: korto de semoj. Lia korto estas tre honora korto, kaj multe pli utila por la mondo ol iuj reĝaj kortegoj, kiujn mi povus mencii. Zamenhof estas taŭga nomo por homo, kiu semis kaj semis konstante. Al ĉiu lernanto en ĉi tiu kunveno kaj aliloke, mi diras: "Se vi estas bona semo, vi post ne longe fariĝos ankaŭ semanto, kreanto kaj kulturanto de ankaŭ aliaj semoj. Vi estas Zamenhofanoj—anoj de la korto de semoj—kies sana, vigla kresko benas la socion.

Zamenhof mortis antaŭ kvardek jaroj. Eble estus pli bone, se li mortus en 1913 en la gloro de la Berna Kongreso. Tio estus savinta lin el

trijara dolorado. Tamen, li pasis la finajn tri jarojn en Varsovio; kie li fintradukis la Bibliion kaj subtenis la korojn de siaj premataj amikoj ĉie en la mondo.

Li mortis en tempo de militanta malamo. Ni hodiaŭ staras en mondo dividita en du blokojn. Du mondpartoj reciproke suspektas la movojn de la kontraŭa partio. En ĉiu tago minacas nin danĝero de milito multe pli terura ol tiu, kiun Zamenhof devis trasuferi.

Gravsignife estas, ke la scienco ne plu estas universala, unuece laboranta por komunaj celoj kolektive. La rilato de la atomscienco al la nacia defendaparato rezultigis, ke la sciencistoj ne plu rajtas interŝanĝi la konojn, kiel ili rajtis en la antaŭa tempo. La ŝtato tiranas super la scienco, kiu nepre devas per sia naturo resti libera kaj ekster la paraliza premo de la ŝtataŭtoritato. En la pure kultura kampo la interrilatoj estas simile malfacilaj, ĝuste pro la ideologia milito.

Precipe de post la milito pli alte leviĝis la muroj inter la popoloj. Nia devo estas tial tre klara. Kiel Espistoj ni devas streĉi la fortojn disvastigi la spiriton de universala interkompreno. Sur nin, kiuj vivas en lando, kie Esp-o ne estas malhelpata aŭ malpermesata, metiĝis granda respondeco. Ni devas teni la glavon brila kaj uzpreta kontraŭ tiu tempo, kiam la mondo denove fariĝos kultura kaj spirita unuo, kun libera pensintersanĝado. Ni devas ekzerci, plifleksebligi nian mirindan lingvon por uzado tutmondskala en tiu tago.

Post longa silentado la E-movado en la Sovet-orbito—kaj eĉ en Sovetio mem—reviviĝas kaj eĉ bone floras. La 70-jara Jubilea Kongreso de E-o okazos en Varsovio, ĉefurbo de komunisma lando, kaj lulilo de E-o. Venu la tempo, kiam la U.E.A. denove havos delegitojn en ĉiuj landoj, negrave kian politikan regformon ili havas.

“Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale, por kiaj celoj li uzas ĝin.” Zamenhof ne destinis E-on por servi nur duonon de la mondo.

En ĉiu kampo, radia, literatura, eduka, freŝa vento blovas. La antaŭparolo de la UEA-jarlibro estas kvazaŭ trumpetsono triumfa

tamen ni ankoraŭ ne atingis la fincelon.

★ ★ ★

Ekster E-o ne ekzistas iu ajn solvo al la lingva problemo, malgraŭ la influa propagando favore al la Angla, Rusa aŭ alia lingvo. Homoj lernas la Anglan, la Rusan, por servi al la propra persona intereso, sed la popoloj neniam konsentos obei dekreton, ke iu nacia lingvo estu universala, tutmonde uzata. Cetere, tiu dekreto neniam okazos; la nacioj tute ne interkonsentus pri tiu demando.

★ ★ ★

Universala lingvo forte akcelus la progreson, tamen, simile al la telegrafo, aŭ la universala alfabeto, ĝi ne povas en si mem—per si mem—forigi la militismon, dum sociaj elementoj multe pli potencaj ol lingva interkompreno konstante naskas la kaŭzojn de la militoj—la armil—kaj avionindustrio, la monopolema grandkapitalo kaj la transmaraj interesoj de riĉaj rentuloj kaj karteloj—kaŭĉuko, petrolo, stano k.t.p. Tamen ni povas per E-o prepari la kampon por tuthomara kunlaboro, kiu venos, kiam institucioj malbonaj por la socio ne plu baros kontraŭ la popoloj la vojon al sano, bonstato kaj abundo.

★ ★ ★

E-o per si mem ne povas forigi la militismon, sed ĝi povas servi al faktoroj, kiuj havas tiun potencon. Simile en la individua, persona kampo—E-o povas grande pligi la kapablojn de altaspiraj, idealismaj homoj. SED E-o ne kreas el homoj perfekte paciencajn sanktulojn. Sanĝi homojn en harmoniajn familiajn postulas ion pli potencajn ol simpla lingva komuneco. Zamenhof mem devis porti multon da kontraŭemo, eĉ de la plej fervoraj E-istoj. Estis ĝuste lia modesta, sinofera personeco, kiu multe helpis al la progreso de la lingvo. Mi diras eĉ pli, kaj emfaze: La milda toleremo de Zamenhof, pli efike ol lia lingva genio, savis E-on kaj garantiis ĝian pludaŭron kaj venkon tra la mondo.

En kio diferencas La Interna Ideo de aliaj internaj ideoj? Kion ĝi efektive signifas por vi? Eble nur nebulule vi konceptas ĝin. Mi konsilas vin, serĉi la difinojn per kiuj Zamenhof penis komprenigi sian ideoaron pri tiu temo. Ne uzu la frazon “interna ideo” se vi ne komprenas ĝin, kontentige por vi.

Jes, amikoj, malgraŭ la disputoj interne de niaj organizoj kaj inter individuoj, E-o kreas ĉiutage centojn da firmaj ligiloj inter homoj de diversaj lingvoj kaj kulturoj. Inter malsamlingvanoj ĝi certe larĝigas la simpatian kaj mortigas la suspekteton. La miloj da dediĉitaj E-istoj, kiuj hodiaŭ laboras sur la vasta kampo de la mondo, estas la nukleo, la embrio kaj ĉelo de tiu grandioza kosmokulturo, pri kiu revis la glora Goethe.

Ni kunvenis por honorinian Zamenhofon. Ni honoru lin dum ĉiu tago de la jaro, sekvante lian ekzemplon, nutrante lian semon skribe kaj parole en ĉiu taŭga okazo, ĝis la fina venko, kiam ĉiu homo estos dulingva kaj komprenos unu la alian ĉie sur la tero.

Zamenhof, majstro, tra la nevidebla kurteno de l'morto niaj amaj pensoj sagas sian vojon rekte al vi!

Recenzoj

LA FARAONO: B. Prus, tradukita de K. Bein (Kabe), eld. Ars Polona, Varsovio. 960 paĝoj; £2/7/6 sterlinga. 25% rabato al agentoj.

Kio motivis al Kabe, ke, antaŭ 50 jaroj, li tiel fide tradukis verkon proksimume tiel same longan kiel "Martin Chuzzlewit"? Ĝi eldoniĝis en 1907-8, tempo de la Ida krizo, kaj eliris duaeldone en 1912. Hodiaŭ, li, nesana okdekjarulo, karesas la belan trion de volumoj, eldonitaj de ŝtata presejo en Pollando.

Presita sur bele blanka papero, per klara granda tipo, la trio valoras la prezon. La plej impona el la verkoj de la realisma Prus (Glowacki), la rakonto, scenigita en la antikva Egiptujo, estas mirinda komplekso de l'arto kaj la scio. Modelo de simetria strukturo, en ĝi la prihistoria erudicio kaj la verkista talento kombiniĝas por prezenti impresan panoramon el pratempa socio, kies vivon malforte bildigas ankoraŭ restantaj hieroglifoj. Krome, ni sentas la genion de la aŭtoro, kiu povis tiel lerte enteksi en la verkon pensojn socie rilatajn al la moderna mondo.

Prus, per sia humuro, montrita en aliaj romanoj, similas al Dickens. Strange, ke liaj verkoj ankoraŭ mankas al la angla tradukita literaturo. Germana traduko de La Faraono

aperis en 1945. Ĝi estas verŝajne la plej longa beletraĵo en Esperanto; komparindas kun ĝi nur la romano "Kastelo de Prelongo" (Vallienne), 515 p. La longeco povas plaĉi.

Antaŭ longlonge oni rekonis la meriton de Kabe, la tradukinto, nomante lin la plej bela stilisto en Esperanto post Zamenhof. Ni analizu tradukojn de li kaj de Grabowski:—

Kabe:—Li rigardis min nekonfide, sed konvinkite, ke li havas antaŭ si malklerulon, li komencis klarigi . . .

Li jese balancis la kapon . . .

Grabowski:—Li ekrigardis min kun senkonfideco, sed konvinkiginte, ke li havas antaŭ si inspektiston, li komencis klarigadi . . .

Li ekklinis la kapon por signo de l'jesigo . . .

(La diferenco de frazpezeco estas evidenta.)

Ni rimarkas kelkajn, plejparte aprobindajn, ŝanĝojn en la tekstoj. Ekzemple, observanto (anst. spektatoro). La Plena Vortaro (Sup.) donas: spekti. Ĉu necese? Kial ne: Ili plezur-, ĝu-vidis, observis, rigardis, algapis, gapadis la spektaklon?

Oni ne plendu, ke post 45 jaroj oni saĝe modifetas la tekston en negravaj detaloj. En la verkoj de Dickens, ekzemple, oni trovas arkaismojn. Jen unu: Paul Dombey deziris "to part with his playfellows . ." ("partopreni kun", NE, "foradiaŭ ilin"!). Kp. 1 Sam. 30/24. Oni bone farus, revizianta tiun kaj similajn en la verkoj de niaj ĉefaŭtoroj de la ora tempo de la romano.

Ni ĝoje salutas la reviviĝon de Esperanto en Pollando kaj aliaj landoj, kaj gratulas la ŝtatcentrojn, kiuj ebligis al niaj okuloj tiel imponajn eldonadojn kiel tiu ĉi. Esperantistoj profitos al si kaj instigos al ili, mendante la frukton de brava entrepreno.

JOZEFO: Drama poemo en kvar aktoj kaj epilogo. Originalo de J. D. Applebaum; eld. Stafeto, La Laguna. 120 p. 1 dol. Usona.

La aŭtoro estas Pola hebraisto, 80-jara, loĝanta depost 1900 en Anglujo. E-isto jam de 1909, li multe kontribuis al E-aj gazetoj, tradukis verkojn, kaj iniciatis la starigon de la monumento sur la tombo de la Majstro.

Jen la konata Biblia rakonto en

senrimaj versoj de klasike pura simpleco. Ĝia glate iranta disvolvado karesas la menson; ĝia modeste moralala tono la spiriton edifas. Jen-jen la seriozeco donas lokon al komika dialogo, kaj tra pluraj scenoj zefiras la melodio de dolĉa horo.

La fratoj vendas Jozefon en servutecon; li rifuzas amorpeton de la mastra edzino; iras en malliberejon, el kiu li venas por fariĝi ĉefa post la Faraono; edziĝas kun pastrino kaj fine akceptas en Egiptujo la patron Jakob, kiu, mortonte, benas siajn du nepojn.

La rakonto estas ĝenerale rigardata kiel elstara ekzemplo de grandanima repago de malbono per bono. En tempo de malsato Jozef provizas grenon al siaj fratoj, kiuj tiel terure jam antaŭe pekis kontraŭ li, kaj plenkore li al ili pardonas. Tiun gravan elementon s-ro A. ial ne uzis, kio forprenas de ĝia efika forto.

Guste vidate, la Biblia rakonto estas ne nur pri Jozef, sed ankaŭ pri liaj fratoj, kies honta humiliĝo en la fina parto donas al ĝi simetrian kaj levas ĝin al nivelo de korvibra impresoj. Ilia deviga panpeto, kaj sekva grandanimeco de Jozef, kiu senhezite plenumas ĝin, dum miljaroj elvokis admiron—al la ago mem kaj ĝia majstra priskribo.

Simile mankas mencio pri la gravrolo Benjamin, kiu, amegata de Jozef, senkonscie sed fortinflue direktis la politikon de Jozef ĉe la fratoj.

La klera aŭtoro uzis preskaŭ nenian neologismon. Ankaŭ tio meritis lian grandan fortostreĉon.

Japanaĵ Fabeloj: dua eld. Amo-Akademio, Tenmori, Kozoji, Aĉiken, Japan. 60 p., Prezo?

Interesa kontribuo al nia mizera literaturo por la infanoj. Estus bone, kompari ĝin kun la Fabeloj de Grimm, tradukitaj de Kabe kaj aliaj. Ambaŭ montras en si, krom multo bele instrua, iom da kruda kruelo, aŭ, minimume, priskriboj pri sangaj punoj ne plaĉaj por la moderna pedagogio. Grimm estas plena de tiaj teruraj, kaj versimile ankaŭ liaj japanaj kolegoj.

Tio estas komprenebla, ĉar verdire la rakontoj devenis de la primitiva tempo, kaj spegulas la spiritstaton de la antikvuloj, malpli humanismaj ol ni. Grimm kaj la japanoj konservis ilin en ilia fakta formo, estante nur

redonantoj, ne originale - verkantoj. Tamen ni notas, ke eĉ ĉe la milda Andersen ankaŭ restas tiu malnova elemento de barbareco, kiel ekzemple en la historio de Malgranda Niko kaj lia frato. Tion li faris per propra volo, ĉar li estis originala fabrikanto de fabeloj.

Hodiaŭ iuj psikologoj evitas meti antaŭ bubejoj vortbildojn pri kapforhako, bruloj de vivantoj kaj similaj. Tamen aliaj infansciencistoj ne tre timas malsanan reagon ĉe malgrandaj edukatoj. Tiuj ĉi ne sentas aŭ interpretas fantaziajn kruelojn laŭ la pensado de maturuloj. La idemondo de infanoj estas malsama ol nia, ĉar ni aldonas—el nia sperto kaj vivinstruo—signifojn fremdajn por ili. Kun la paso de tempo, kaj evoluiginta intelekto, ili, same kiel ni, ricevos la kapablon ĝuste taksrigardi la rakontojn, kiujn ili (kaj ni) sendanĝere ĝuis en la infanaĝo.

La kvinfabela kolekto estas klare kaj facilflue tradukita. Mi faris notetaron, kiun mi pruntus al eventualaj petontoj.

Sennacieca Revuo, N-o 85, S.A.T., 67 avenue Gambetta, Paris 20. 56 p. 5/- aust.

La kompilantoj de tiu serio meritas la dankon de ĉiu ŝatanta la liberon de l'penspenetro. Jen paĝoj plenaj de plumprovoj de homoj laborantaj ekster la kampo de la konvencia rutineco, homoj esplorantaj novajn vojojn, ignorante la katenojn de l'tradicio, provokante la pretendojn de tielnomataj aŭtoritatoj. Negrave, ĉu aŭ ĉu ne la konstatoj de la diversaj aŭtoroj estas cent-pro-cente pravaj, neniu serioza leganto perdis profiton, atentinte la vidpunktojn de la studentuloj, kiuj trovas lokon en la paĝoj.

Ni rimarkas nur kelkajn el la artikolaro: Eseo pri Rabelezo, kun speciala aludo al Lanti; Pri Rembrandt, fare de la direktoro de la Rembrandtmuzeo; Pri "Don Kihoto", solide analizita de An Kaŭ; Pri Punalaboruloj en la frua Aŭstralio, de Grace Barlow; anonima traduko de La Manuskripto de Lucinius Partides; galkreva ridigaĵo, de la senkompara humoristo R. Schwartz; studo pri la unuaj aviadistoj, de G. Ledon; signifa kompilo, kiu ilustras, kiel la historio, anstataŭ esti universala, estas male modlata laŭ diversaj interesoj,

por servi nigrajn naciismojn; Pedagogia Provo, de Marjorie Boulton; temas pri eksperimenta kurso en la mondliteraturo. Ĝi estis profite por almenaŭ unu ekzamenito, kiu lernis, ke ŝi eraris, skribinte: "Dante venis al purgatorio kaj trovis Terza Rima, la virinon, kiun li amis"; poemoj de Emba kaj Matkowski . . .

Elektitaj Versaĵoj de Georgo Deŝkin, 1909-56. Eld. Serbia Esperanto-Ligo, Terazije 42, Belgrade, J.S. 0.60 dol. 54 p.

Deŝkin naskiĝis en Vilno 1891, E-iĝis 1908. Lia verkado precipe temas pri la amo, la naturo, kaj lia reago spirita al ili. La ĝenerala tono estas pesimisma: la mondo kaj ĝia signifo estas malluma, nekomprenebla, mistera, eĉ malgrava. En tio li ne staras sola; grandaj verkmaĵstroj prozaj kaj poeziaj ankaŭ sentis kaj sentas simile. Nur postulende estas, ke la meditaĵoj portu la stampon de originaleca genio aŭ minimume alta talento. Entute mankas al la versaroj inspire konstrua penso; escepto estas la liriko Revenas Bela Tempo, en kiu, pro ia cirkonstanco, sunradio naskis ĝojon en lia koro.

Tro ofte difektas la metrikon lia nebele torda frazaĵo: bela plej radi'; kiam liberiĝos de kora mi dolor'? de tempo ĉion ŝanĝas ir'; ĝi ne sur nia estas ter'; mi pri bela revas mond'; sub de via rigardo radi'; mi rememoras pasinton trans de temp' nebul'; benu li vivon unua je fojo; de malvarma vintro veno belajn tagojn pelas for; per brilantaj kovrita nebuloj. Pro tiuj inversioj, ĉe deklamado oni ne facile kaptas la sencon.

"Kien La Poezio?" de Brendon Clark. 17/6 Aŭst., plus afranko. The Esperanto Publishing Co. Ltd. Ĉe niaj agentoj.

La aŭtoro difinas la poezion: la kontentiga esprimo per mezurita lingvo de pripensinda ideo. La celo de la prozo estas sciigi: . . . de la poezio, sentiĝi.

Sen ideoj, poemo neniam valoras; ĝi estas, senidee, nur vortludo. Senrima poezio estas malfacile verkebla, ĉar ĉiu verso ĝia dependas de perfekta esprimo de esenca ideo. Ĝi estas formo por specialistoj, ne por homoj ĉe kiuj la rimo estas la sola aspekto, kiun ili komprenas.

La neologismoj en Esp-o ne estas analogaj al la "poeziaj vortoj" de la naciaj lingvoj; tiuj estas postvivantoj el la antikva prozo de tiuj lingvoj. Poetoj uzu neologismojn nur post kiam ili sufiĉe estas uz-konataj pere de la prozo.

Clark kontraŭas la elizion, rimarkante, ke oni elizias -o nek en la prozo nek en la parolado—do en 99% de nia E-a praktikado. Tradukante, ni antaŭ ĉio traduku la ideojn. La lingvo, metriko kaj ritmo de la originalo estu imitataj laŭeble, sed nur ĝis grado, kiun ebligas la ecoj de E-o. En la Angla povas okazi, ke en verso ĉiu silabo estas memstara vorto; sed en E-o la senakcentaj silaboj estas vortfinajoj, kiuj helpas la komprenon, sed nenion aldonas al la penshavo. Pro tio kaj alio li konsilas, ke se necese oni plilongigu la E-an metrikon. Zamenhof, tradukante kvin-taktojn en Hamleto, aldonis kelkajn versojn, sed aliloke el-lasis metaforojn.

Pro malmulto da radikoj, la E-a rimado estas malfacila. Clark konsideras kiel solvojn: neologismoj, ŝanĝo en vortordo, kvazaŭ-rimoj, kaj sinonimoj. Li prezentas utilan liston de parence-sencaj radikoj.

Traktitaj estas ankaŭ: metriko, ritmo, ŝtopiloj, mal- kaj "la", beleco lingva, aliteracio, personigo, metaforo, etoso . . . sed li ne rimarkas pri la kunfando de la adjektivo kaj substantivo,—la "maskita elizio de la adjektivo": ekz. junfamilio. Nek pri stumpigo: entombas min; maleblas vidon; nek pri sensilabigo de ekzemple "kiu" (kja).

Bertram Potts skizis la vivon de lia samlandano, la plej elstara E-a poeto en Aŭstralazio, kiu mortis en 1956, kaj lumdone prikomentas lian verkteorion kaj gvidprincipojn. En ĉi-libro oni trovas ilin nete prezentitajn, kun specimenoj de ilia aplikado. La dua duono de la 156-paĝa verko havas du kolektojn de tradukitaj kaj originalaj poemoj, inter ili multo valora.

La penso kaj praktiko de tiu ĉi fundesplora fakulo plaĉas al versemuloj, kaj instigos pluire ĉiun, kiu celas la belon kaj la klaron. Lia teknika sinteno vekos profitan diskuton ĉe homoj okupataj pri la sorto de nia poezia literaturo, precipe ĉe kompetentuloj pri pluraj lingvoj, tial

kapablaj trakti la problemojn interne de sufiĉe vasta kadro.

Aldone: La "Malnovaj Lampoj", tezo metrika, estas komparinda kun La Arto Poetika, en 'Parnasa Gvidlibro", kaj la Unua Kanto de la "Arto Poezia" de Boileau (Nica Lit. Revuo, n-ro 6). Liaj tradukoj el Stevenson, Herrick, Longfellow, Keats, Goldsmith, Wordsworth, Tennyson, Shelley, Lovelace kaj Shakespeare meritas zorgan analizon kaj sentan provadon. Cetere, mi preferas la tradukon de "Lucasta" en la Angla Antologio, faritan de Auld. La mirinda klareco de liaj originalaj poemoj nepre impresos la feliĉan leganton.—F. R. Banham.

Mrs. A. Sedgley and Mrs. R. McGrath have been appointed Special Examiners by the B.E.A.

Miss Florence Cherrett, kindly contact Editor. Postcard for you.

"POPOLA ĈINIO appears again, in new make-up, with emphasis on the cultural and literary sides. Pface is given to the Esperanto movement in China. Two-monthly, 36 pages, it costs only 4/6 through Keesing's, Box 4886, G.P.O., Sydney; or 6 reply coupons to Ĉina Esperanto - Ligo, Kesto 77, Peking.

E-IST FOR 70 YEARS!

Polygot, author, philosopher, **Francisko V. Lorenz**, has died, in Porto Alegre, Brazil, 24th May, at 84. Some say he learned E-o in 1887, the year it appeared; others, 1889. Born in Bohemia 24th December, 1872, he issued the first Czech E-o textbook. In 1890 he migrated to Brazil, where he did much to advance E-o. This remarkable man, doyen of E-o, leaves in his works and in the memory of his outstanding personality, a grand inheritance for Brazil and for the discerning world outside. The present doyen is a Pole, A. G. Furmanik, 87, who learned Esperanto in 1888.

95,000 COPIES

of an E-o textbook by N. Andrejev has been published in Leningrad under State auspices. It is the first E-o publication in Russian since the war.

PEN FRIENDS?

From time to time we give space to addresses of correspondents, recalling the joy that Zamenhof felt in the early days at the receipt of every new adherent to his infant cause. Just how far are we using this opportunity of utilising our knowledge of Esperanto? Are we showing evidence of a fruitful Esp. life here, demonstrating the practical utility of Esp. as a factor in international intercourse, and profiting ourselves by the exchange of thought and impression with our fellows in other lands? Our gazette is the only window on Esp. activity in a vast segment of the English-speaking world, and as such bears a heavy responsibility as a link in the chain of the movement's effective unity. Honest effort should be made to satisfy the needs of worthy correspondents wishing to enter into relations with us.

True it is that the matter calls for reform, in that much time and money is wasted through individuals who fail in their duty to reply, who make extravagant claims to interest or competence "on all subjects", or who are lingually or temperamentally unfitted for the role assumed by them. In La R. 10/47, 4/48, 8/48, 11/50 we treated of abuses in this field, but without echo from those directly concerned.

We print only those calls that bear the imprint of a genuine desire; let us then encourage them with a brief introductory letter. Relevant issues of "A.E." are sent to all so calling. Use only the accepted postal forms for names of lands, &c.

S-n G. Krystyna, Czestochowa, ul. P.P.R., No. 83, Poland. S-n E. Janina (sama-sed—No. 108).

S-r L. Ryznar (36-j.), Ctyricet Lanu 460 p. Svitavy, C. Slovakia. Int. trad. de mitoj k fabeloj naciaj.

J. Kalinov, ul. Georgi Dimitrov 122, gr. Ruse, Bulgaria. (konserv-fabrikano.)

Lidija and Aleksandro Petrunovi, pri Asen I, N-o 55, Sofia, Bulgaria, pri pentrado kaj literaturo.

Banati Istvan, Bekescsaba, I. Banat u. 26, Hungary, pleads for cor. for 30 groupers.

The Australian Esperantist

("La Rondo")

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15\$ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5\$.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.
Adreso de A.E.A.—Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

Kasisto: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

N-ro 3 (83).

MELBURNO.

Majo - Junio, 1958.

Professor Pei and the International Language

Reading Between the Lines of Local News Report.

In "The Age," Melbourne, May 5, there appeared a press item from New York concerning a well-known philologist, Prof. Mario A. Pei, of Columbia University. Stressing the urgent need for an international language, he has distributed a book of his to "the heads of State in every Government of the world"—"One Language for the World and How to Achieve It." The book is represented as making the following point among others:—"Any one of the 2796 existing natural languages or more than 600 'artificial' ones could be the world language."

We hesitate to believe that Prof. Pei wishes it understood that there are 600 plan-languages adaptable today to such a role. The figure might well be used to indicate in a catalogue the number of projects that have, through the past three centuries, made (with few exceptions) but a fleeting appearance; but as "rivals" to Esperanto in linguistic discussion only the names Ido, Interlingue, Interlingua and Ido remain with any possible relevance for purposes of discussion.

The introductory words in the press report: "a . . . campaign to establish one world language—not Esperanto" misrepresent the author, who, as above cited, implicitly affirms that also Esperanto "could be the world language," for it is one of the "more than 600 . . ."

Prof. Pei is in no way antipathetic to Esperanto. He has clearly attested this by fair and constructive treatment of it in more than one of his books. We await perusal of this one with an interest we wish were prevalent in journalistic circles.

The Esperanto network, serving 60 countries through its Year-book, has no opposition in its specific field, and could take its place as the universally used auxiliary world language just as soon as cold routine, self-interest and sheer obtuseness elect to raise their numbing pressure on progress.—F. R. Banham.

G.I.'s AND GERMAN.

"With every language you learn, you gain a new soul," pontificated the German philosopher Humboldt. Some 5,000 U.S. soldiers in Europe decided that they needed a new soul, and so started to learn German.

Feeling that they already knew the basic words of the language—Bitte, Danke schon, Fraulein and Prosit—the 5,000 gaily got to it. Reeling out of the third lesson, they had found that there are five ways to say "the". At this, 4800 slid off the course, leaving 200 to continue the struggle. Another 100 gracefully disappeared when they had the first look at the prepositions.

(Reckoned by case, gender and number there are 16 ways of using in German the definite article in German.—Editor.)

Australia Kroniko

SYDNEY: Dum Aprilo la movado en Sidnejo faris progreson. Kelkaj junaj personoj telefone faris demandojn pri nia lingvo kaj poste komencis lerni, vizitante la klubon de tempo al tempo. La nova grupo en la Strathfield Gimnazio laboras bone kaj almenaŭ unu patrino lernas kune kun la filino. La progresintaj knabinoj korespondas kun eble 10 landoj kaj ĉiu lernantino faras propagandon por nia afero.

La 10-an de Aprilo la membroj organizis surprizfeston por la naskiĝtago de nia prezidantino. Ni ludis, kantis, regaligis kaj toastis—vine kaj biere—kun gajeco kaj ĉiuj multe ĝuis la okazajn, inkluzive de la prezidantino mem!—G.B.

BRISBANE: La Jarkunveno okazis la 14-an de Aprilo kaj sub la prezido de s-ro H. N. Love la jena Estraro elektigis: Prez: S-ro S. L. Parry; Vic-Prez: S-ino G. Grant; Sek-ino: S-ino V. Fraser; Kasisto: S-ro G. A. Grant; Kont-Kontrolisto: S-ro O. H. Behncken.

La raporto de la Kasisto prezentis tre gratulindan finano-staton, sed la raporto de la Sekretariino ne montras tian kontentigan bildon, kaj la prezidanto, alparolante la anojn, atentigis ilin al tio ke malpli da mono kaj pli da entuziasmo kaj intereso en klubaferoj nepre rezultigus pli fortan movadon kaj vigan Societon.—S. L. Parry.

PERTH: La 13-an de Marto, S-ro Hawks parolis pri sia vojaĝo eksterlande, precipe sia ĉeesto ĉe la Universala Kongreso en Marseille. Ni ĉiuj esperas, ke S-ro Hawks plue rakontos pri sia vojaĝo.

La 23-an de Marto okazis pikniko. Klubanoj kaj amikoj veturis per aŭtoj al Kwinana kaj Thompson's Reservoir, kaj poste al la hejmo de nia prezidanto, S-ino G. Pollard, por teamanĝeto. Ĉiuj pasigis tre ĝojplenan tempon kaj raporto aperis en River-ton News.

La 10-an de Aprilo, S-ro N. Brodie montris filmojn kaj parolis pri sia vizito al Nov-Zelando. E-istoj el kelkaj partoj de Aŭstralio kaj Nov-Zelando montriĝis en la filmo.

La 19-an de Aprilo okazis Distra Kunveno en Okcidenta Perto. Mul-

taj E-istoj kaj amikoj de Esperantistoj partoprenis tre ĝuidan vesperon. S-ino Pollard legis mallongan raporton pri klubaj aferoj kaj ankaŭ da muzikistoj ludis mandolinojn. Per ĉi-tiuj kunvenoj ni ne permesas ke la publiko forgesu nin.

Ni ricevis kelkajn leterojn de personoj, kiuj ne povas ĉeesti klasojn, sed deziras lerni Esperanton. S-ino McGrath nun estras Korespondan Klason, kiu uzas la Korespondan Kurson de B.E.A. por komencantoj.

La 24-an de Aprilo ni gastigis S-ron V. Rolding el Skandinavio. Ni dankas lin pro lia parolado kaj pro la filmoj, kiujn li montris al ni, sed tre bedaŭris ke tiel malgranda kunveno de Liganoj renkontis lin.—A. B. Sedgley.

CANBERRA: La unua kunveno de nia nova serio okazis 19-an de Marto en la hejmo de nia prezidanto, s-ano Ross Robbins. Ĉeestis 9 anoj kaj la programo inkluzivis kantadon, konversacion lecionon, poemojn kaj tre interesan prezentadon de magiaĵoj de D-ro Robbins. Okaze de ĉi-tiu kunveno ni ricevis varmkorajn salutojn de la A.E.A. Sekretario, s-ano H. Koppel, el Melburno. Ni dankas pro lia ĝentileco. S-ino Robbins regaligis nin per bongusta manĝeto.

Nia dua kunveno okazis je 16-a Aprilo en la hejmo de nia membro Harry Howell. La programo konsistis el leciono, "skeĉo", legado de poemoj kaj denove magiaĵoj de nia prezidanto, s-ro Robbins. Per bona vesper-manĝeto finiĝis ĝuinda vesper.—Harry Torr.

MELBOURNE: Plejparte ni daŭrigis niajn duerajn programojn, kiuj pruviĝis tre popularaj ne nur al aŭskultantoj pri ilia vario, sed ankaŭ al parolantoj, ĉar malpli longa prelego necesigas malpli da laboro. Je 2/4, S-ro Ken Linton denove prelegis el sia serio pri E-gramatiko, kaj poste Ges-roj Schilperoord prezentis amuzan teatraĵeton verkitan de S-ro Schilperoord mem. Tre realajn bebosonojn en tiu provizis S-ro Burstin. La 9a de Aprilo estis okazo de prezentado al S-ino Hintze honore al ties 75a naskiĝtago kaj longdaŭra aliĝo al la E-Movado. Samvespere S-ro Ralph Harry okulmalferme parolis pri la multa uzado de Esperanto por

divastigo de informo je la parto de diversaj internaciaj organizaĵoj, kiel ekzemple, La Internacia Labor-Organizaĵo, Interŝtata Komitato por Eŭropa Migrado, Monda Organizo por Saneco, Monda Organizo de Meteorologio kaj Mondorganizo de Sociala Sekureco. Tia uzado, ni devus menci, estas rezulto ne nur de liaj rilatoj kun tiuj organizaĵoj, sed ankaŭ de lia grandlabora tradukado de ties informiloj dum lia restado en Genevo. Je 16/4 S-ro H. Koppel, pere de elĉerpitaj novaĵoj el tuta Esperantujo, skizis la fresdatan progreson de Esperanto. Je 23/4 S-ro Schilperoord varbe kaj kuraĝige alparolis la Klubanaron kaj sukcese aranĝis tri-monatan programon. Sekvis lin S-ino Hintze kun interesa legado el "Leteroj de Lanti." Kelkaj anoj rememoris personajn kontaktojn kun tiu eminentulo.

Tre lerte preparita kaj prezentita estis la programo de 30/4, kiam Gesroj S. Milligan priskribis vojaĝon al kaj tendrestadon ĉe Mallacoota. Dum S-ino Milligan priparolis, S-ro Milligan funkciigis lumon inter mapoj kaj bildoj de si mem lertege faritaj. Bedaŭrinde ke pro akcidento ili ne povis atingi la celon (Sydney), tamen feliĉe ne pli malbone.

Je 7/5, F-ino v. Ryswyk gvidis diskutvesperon. Pluan ekzercadon en tiu ni certe bezonas. Je 14/5, S-ro Ralph Harry legis el sia traduko de "La Eta Princo," ĉarme verkita originale en la franca lingvo de Antoine de Saint-Exupery. Ankaŭ interesa estis posta komparo kun la franca kaj angla eldonoj.

Ce la Aprila kunveno de RENDE-VUO, D-ro A. Fridenbergs prelegis pri "La Mondo antaŭ 50 Jaroj." Interesajn kaj kelkfoje amuzajn komparojn kun la nuna mondo li faris. Oni petis ke li daŭrigu la temon en Julio.—Fay Koppel.

UNESCO AND SCIENCE.

In 1952-54 Unesco carried out a survey in 21 countries on the languages used in scientific literature. Its report, in French, English and Italian, concluded that such work consisted of 60% English; 10% each German, Russian, French; 2% each Japanese, Spanish; 6% others.

Scientists as a whole understood the languages as follows: 30% Eng-

lish; 20% German; 13% each Russian, French; 4% each Japanese, Spanish; 1% others.

Thus more than half the science literature is outside the reading range of more than half of the scientists.

In a report under State aegis, the Royal British Council (1955-6) informs that of British scientists 80% to 90% read French, 60% German, but only a few read the important Slav and non-European languages.

Full treatment of this and kindred aspects of the problem is found in the bulletin of the Interlingvistika Inform-Servo, Blucherstr. 17, Flensburg/Murwick, Germany.

LIBERA FORUMO.

La kongresna komitato multe ĝojigis, kompreneble, la multaj dankoj, kiuj aperis en "The Australian Esperantist", sed iom malĝojigis nin la plendeto de unu Sud-Aŭstralia vizitanto pri la forpreno de rajto.

La respondo al tiu plendeto troviĝas sur paĝo 2 de la Jan.-Feb. n-ro de nia gazeto, kie aperas la vortoj "salutis en la mondo de siaj kluboj", kaj pli malsupre "Por la Aŭstraliaj E-societoj salutis."

Tiu malgranda plendeto rememorigis nin, ke ni bedaŭrinde NE havas klubon aŭ societon en la bela ĉefurbo ĉe la Torrens, fakto, kiun ni konstante bedaŭras.

Nur antaŭnelonge Hobarto akiris tiun rajton, kaj eĉ nun avide anticipas okazigi la venontan kongreson. Ĉu ni povus esperi, ke Adelajdo baldaŭ ankaŭ akiros tiun rajton, kiun ni nepre ne dezirus forpreni? Kiu scias? Eble ni eĉ povus revii pri plua kongreso en la sidejo de la unua aŭstralia E-Kongreso.

Ni tre deziras ke ĉiuj gesanoj partoprenu plene en la kongreso. Fakte mi mem persone invitis f-inon W. Addis helpi je la Di-Servo kaj ŝi faris ĝin tre bele.

—Fred Williams, Prezidanto.

Rilate al la supra respondo, mi ŝatus atentigi niajn amikojn ie ajn en Aŭstralio pri Paragrafo 8 de la A.E.A. Regularo: "Ĉiu Aŭstralia grupo Esperantista povas aliĝi al la Asocio, se ĝi enhavas almenaŭ 5 membrojn, estas laŭorde organizita kaj laŭ regularo estas neŭtrala." "Laŭorde organizita" signifas ke

komitato estas elektita per baloto de la klub-membraro. A.E.A. Regularoj estas senkoste haveblaj, kontraŭ reafanko, ĉe A.E.A. (Box 2122T, Melbourne). Mi forte rekomendas ke, se almenaŭ 5 samideanoj loĝas en iu urbo, ili elektu komitateton kaj aliĝu al AEA, por ke ilia reprezentanto plenrajte partoprenu nian venontan kongreson en Hobarto.

—Herbert Koppel, AEA-Sekretario.

DECIDOJ DE LA A.E.A. ESTRARO.

La A.E.A. estraro decidis per letera baloto:

- (1-e) ke F-ino E. Bull (Perth) estu kooptita en la estraron.
- (2-e) ke S-ro Ralph Harry estu elektita kiel "Komisiito por la Zamenhof-Jubileo 1959".
- (3-e) ke S-ro J. Matasin estu oficiala reprezentanto de A.E.A. ĉe la ĉi-jara Univ. Kongreso en Mainz (Germanujo).
- (4-e) ke Pensiuloj pagu nur 10/- (anstataŭ 15/-) kiel membrotizon al A.E.A.
- (5-e) de edzino de A.E.A. membro pagu nur 5/- kiel kotizon.

AŬTOMATIGO KAJ ESP-O. (La Rondo, Julio, 1957.)

La grandaj elektronaj instalaĵoj uzataj ĉefe por kompleksa kalkulado povas esti facile aplikataj ankaŭ por tradukaj taskoj. La maŝino konservas en si la vortojn de du lingvoj, la gramatikajn regulojn de tiuj lingvoj kaj la diversajn signifojn, kiujn la unuopaj vortoj povas havi laŭ la kunteksto.

La vortaro bezonata por certa fako, kaj la gramatika regularo necesa por tio, ne estas tro granda, almenaŭ por havi ne bonstilan, sed kompreneblan tradukon. Kio volas esti tradukata estas endonata en la maŝinon per tru-kartoj. La plej grandaj firmoj: la Usonaj IBM kaj Remington Rand. Sed ankaŭ la Rusoj havas similan aparaton: BESM. Traduka centro por faka literaturo estas instalita jam 1953 en Moskvo; tie en 13 revuoj ĉiujare resumaj tekstoj el ĉirkaŭ 400,000 sciencaj trak-

tajoj estas publikataj, kiuj aperis en dekmil eksterlandaj fakrevuoj ("Spiegel", 2/58).

Estos eble permaŝine traduki ne nur la presitan, sed ankaŭ la parolatan vorton. Jam ekzistas aparatoj, per kiuj la homa voĉo povas esti produktata, kaj ne daŭros longe ĝis tiuj maŝinoj estos tiel bone fabrikataj, ke ili funkcios en pluraj manieroj. La plej simpla estas, ke ili povas "fari paroladon", kiu estis trukarte endonita en ilin. Ankaŭ pli: traduka aparato povas esti aldonata, kaj la maŝino parolos la tekston senpere en fremda lingvo. Fine ne plu necesos enigi la tekston tru-karte en la maŝinon; ĝi ankaŭ povos esti parolata de homo en la maŝinon, la maŝino tradukas kaj reproduktas la tradukon per homa voĉo. Praktike tio signifas, ke eblos telefoni kun eksterlandano; ĉiu parolas en sia gepatra lingvo kaj ĉiu aŭdas la alian en sia propra gepatra lingvo.

Kiun signifon tiuj miraklaj maŝinoj havos rigarde al la klopodoj pri la internacia lingvo? Laŭprincipe la problemo plue ekzistos. La I.L. volas esti ponto inter ĉiuj homoj malsamlingvaj—ne nur inter certaj malsamlingvanoj. La I.L. celas al plisimpligo ne per tekniko, sed per senpereco. Kompreneble la I.L. mem uzos ankaŭ la teknikan progreson de la aŭtomatigo; oni povos elektrone traduki en la internacian lingvon kaj el ĝi.—D-ro A. Borman, Interlingvistika Informa Servo, Marto 1957.

ESPERANTO IN MALTA.

Miss V. Cox sent us an interesting cutting from the "Sunday Times of Malta" (11/8/57). After a brief review of the Marseilles Esperanto Congress, the reporter remarks that fifty years ago, when Esperanto was 20 years old and Dun Karm, Malta's national poet, was 36, the international language made its first appearance in Malta.

The poet became one of its first enthusiasts, and the only poem in Esperanto known to be of Maltese authorship came from his hand. The verses, in Esperanto and in an English translation, are reproduced in the article. It is named: Penso Printempa (Spring Thought). "Dun Karm" was seemingly the pseudonym of Mgr Carmelo Psaila, C.B.E., D. Litt.

LA KULMINO MANKAS.

Mi ĉiam flatis min, ke mi posedas tre bonan observadkapablon; ja mi imagis, ke mi kvazaŭ estas "denaska detektivo". Jam kiel knabo mi kelkfoje amuziĝis sekvante homojn en la strato tra longaj distancoj; mi provis subaŭskulti plejble ilian konversacion, mense priskribi al mi iliajn vestojn, vizaĝojn kaj aspekton, noti la vojon, kiun ili laŭiris, kaj la domon, en kiun ili fine malaperis. Sed neniam iu ekscita afero rezultis el tiu junula sporto mia.—

Mondmilitoj komenciĝis, daŭris tro longe kaj fine pasis, sen doni al la homaro veran pacon. Tamen oni povas diri, ke estis "paca atmosfero", en kiu mi faris iuvespere mian kutiman postmanĝan promenadon tra la senbruaj stratoj de mia antaŭurbo.

La stratoj ĉi tie, kiuj en antaŭaj tempoj estis borderitaj de multekostaj vilaoj, nun havis alian aspekton, ĉar ambaŭflanke altiĝis mult-etaĝaj domoj kun lu-loĝejoj. Tamen ĝi restis kvar-talo por riĉuloj. Mi ĵus pripensis tiun ŝanĝon en la vivmaniero, kiam aŭtomobilo malrapide veturanta preterpasis min kaj post distanco de ducent paŝoj subite haltis. Nu, aŭtomobilo ja certe ne estas eksterordinara aĵo en nia rapidanta epoko, tamen io vekis mian tujan atenton. En mallongaj intervaloj la ŝoforo estis doninta strangajn, akcentitajn korno-signalojn, kvankam neniu vojkruciĝo estis videbla kaj la veturejo estis tute ne okupata; kaj mi ĵus memoris, ke antaŭ nelonge oni ja malpermesis al la aŭtomobilistoj, laŭtigi signalojn krom en ekstremaj okazoj de danĝero. Kiam mi indigne postrigardis la ĝenemulon, mi rimarkis, ke la veturilo estas malnova ĉaraĉo kaj la numerŝildo krusita de koto kaj ne deĉifrebla. Ankaŭ tio ja okazas ne malofte post veturoj tra la kamparo. Sed mia atento estis ekscitita kaj tial mi rigarde sekvis la plujajn okazaĵojn.

Subite mi vidis, ke en la dua etaĝo de la domo, antaŭ kiu la aŭto haltis, iu fenestro heliĝis, ree mallumiĝis, tuj denove heliĝis, mallumiĝis, heliĝis, jen en longaj jen en mallongaj intervaloj: intermitaj lumsignaloj! Kaj kun frapanta koro mi, kiu eklernis la Morse-alfabeton kiel soldato, povis ekoni la enhavon de la sciigo: "ĉ-i-u-j f-o-r—v-e-n-u!" Apenaŭ la fenestro lastfoje malheliĝis, kiam fig-

uro saltis el la haltanta aŭto kaj malaperis kiel ombro en la dompordo.—Mi estis veninta en kriminalromanon!

Jen la aventuro, pro kiu mi ĉiam sopiris! Momenton mi pripensis, poste mi kuris por venigi policiston. Bonŝance mi trovis tiun jam en la proksima strato kaj kune ni rapidis reen al la ejo de la krimo. La aŭto ankoraŭ staris antaŭ la domo, la dompordo estis malferma. Ni silente suprengrimis la tapiŝkovritan ŝtuparon al la dua etaĝo. Ĉe la enirpordo de la loĝejo brilis latunŝildo: D-ro Jen Trofidulo.

De interne neniu sono estis aŭdebla. La policisto gravmienne tiris sian revolveron el la leda ujo kaj mi hezite premis la butonon de la sonorilo. En la loĝejo restis silento kiel antaŭe. Duan fojon mi sonigis la sonorilon; nun ni aŭdis, ke pordo moviĝas kaj mallautaj paŝoj proksimiĝas al la loĝejpordo, antaŭ kiu ni staris en febra atento. Riglilo estis forŝovata, la pordo malfermiĝis—kaj servistino aperis kaj naive nin demandis: "Kion deziras la sinjoroj?"

Por tiu simpleanima demando ni ne estis preparitaj. Ni interŝanĝis perpleksajn rigardojn, fine la policisto demandis, ĉu li povas paroli kun D-ro Trofidulo. "Ne," respondis la knabino, "la gesinjoraj moŝtoj bedaŭrinde ambaŭ foriris. Estas neniu hejme."

"Ĉu vere? Kaj la juna viro, kiu antaŭe venis aŭtomobile?" mi nun demandis, ĉar mia suspekto ankoraŭ ne ekdormis.

La knabino videble paliĝis, ĵetis petegajn rigardojn al ni ambaŭ kaj balbutis: "Tiu estas . . . sed estas ja neniu ĉi tie! Vere neniu!"

"Nu tion ni tuj vidis," mi vokis ekscite kaj kun la policisto perforte eniris la loĝejon, dum la knabino ekploris. El pordo ĉe la fino de la koridoro venis lumo; ni enpenetris la ĉambron kaj vidis junulon en blua seruristjako, kiu sidis ĉe la tablo kaj kviete vespermanĝis. Li tute ne interrompis sian maĉadon kaj nur moke alrigardis la enirintojn. Mi demandis iomete malcerte: "Kiu vi estas, kaj kion vi faras ĉi tie?"—"Sed tiu ja estas nur mia fianĉo!", kriis la servistino, kiu estis sekvinta nin, kaj la policisto laŭte ridis: "Hahaha! Kaj ĉi tiu sinjoro opiniis, ke vi estas portfortŝtelisto aŭ iu simila . . ."

La viro en la blua jako faris grimacon: "Ne, sinjoro, en tio vi eraras! Mi nur fortrinkas al mastro Trofidulo glason da lia bona vino! Jen estas ĉio. Je via sano!"

Sed mi ĉagrene demandis: "Je diablo, kial vi donis tiujn suspektindajn kornsignalojn? Kaj por kio vi donis la lumsignalojn: 'ĉiuj for—venu!'— "Ha, tio estas nur, ĉar sinjorino Trofidulo ne volas, ke mi vizitas mian fianĉinon ĉi tie. Do ni devas atendi, ĝis kiam la gemastroj foje eliras!" respondis tiu en la blua jako sincere.

"Sed tiu freneza intermit-lumado!" mi obstinis malafable. "Cetere, kial do scias via fianĉino la Morse-signojn?"

"Bona ĉiclo — nura ludado! Mi soldatis ĉe la radio-signalistoj kaj nur por amuzo mi lernigis la signojn ankaŭ al mia knabino. Tio ja ne estas krimo, ĉu, sinjoro serĝento?"

"Ne, tutcerte ne," ridis bonkore ia policisto. Poste li turnis sin al mi: "La afero ja nun klariĝis kontentige, ni volas foriri kaj ne plu ĝeni la junajn homojn." Kaj forirante li ankoraŭ kriis reen: "Bonan vesperon. Kaj—bonan amuzon!"

Mi murmuris pardonpeton kaj sekvis lin malbonhumore. Tro stulte, ke ĉi tiu travivaĵo pasis tiel sen kulmino! Kaj malgaje mi eliris la domon Vesper-strato 7, en kiu mi ĵus ridindigis min—

La sekvan tagon ĉe la matenmanĝo mia rigardo trafis jenan gazetnoton:

"Senckzemple impertinenta ŝteldado en Vesper-strato 7! Loĝejo en la dua etaĝo tute elrabita. Por 20000 funtoj valorpapiroj kaj juveloj ŝtelitaj! Servistino en komploto kun la krimuloj. Krimuloj verŝajne fuĝis en aŭtomobilo. Uzeblajn sciigojn al Krimialpolico, policprezidejo, ĉambro 13."

Sed mi ne iris al la policprezidejo. Konfesi, ke mi lasis min tiel mistifiki, . . . ne, tion oni ne povis postuli de mi! Sed de tiam mi ne plu pretendis, esti denaska detektivo. . . .

—P. E. Schwerin, Sydney.

"La E-istaro havas nur unu au du komunajn kredojn: pri la taŭgeco de nia int. lingvo, kaj eble pri la unueco fundamenta de la homaro."— R. A. Lewin, La Jolla, Cal., USA.

Recenzoj

"La Angla Antologio": eld. U.E.A. Redaktis William Auld, Reto Rossetti.

La unua grandnacia en Esperanto! Inter la malvasta limito de 63 literaturaj nomoj la redaktantoj starigis al si la timigan taskon, inde, fideinde kaj impresprezenti ne tro fragmentecan bildon de kampo grandiozega. Ili komencis la fortostreĉon per nekonsistanta anglosaksa poeto (antaŭ 1000 P.K.) kaj finis ĝin per Edward Gibbon.

En la proza parto estas vakuo de la jaro 1000 ĝis 1470—jen Malory. Ĉu efektive la angla prozo malhavis metiston dum pli ol kvar jarcentoj? Mankas ĉerpoj el Richardson—grandgrava romanisto—kaj el la komediekreistoj Wycherley kaj Sheridan ("la angla Moliere"), ankaŭ el Beaumont kaj Fletcher, agnoskite grandaj verkmaŝtroj, malgraŭ sia ĉiun-superanta samtempulo Shakespere.

En la poezia parto ne sin trovas provoj el Piers Plowman (Langland), kaj el Brut (Layamon)—la unua signifa poemo post la Konkiro Normanda.

Tielade ni povus plendpepi, en tiu humoro ehante la ĉagrenon ankaŭ de la redaktintoj, kiuj certe konscias pri la necesa nekompleto de sia laboro. Ĉu la proporcioj de la enhavo estis motivataj ne pro respektivaj valoroj de la verkintoj, sed pro disponeblo de jam preta materialo? Blake, Herrick ricevis resp. 9 kaj 7 tradukojn; Marlowe — metrikiste preskaŭ tiel potenca kiel Shakespere — kaj Cowper nur po unu.

La redaktantoj devis provizi, en unu volumo, sagace elektitajn ĉerpojn el okcent jaroj. Konsiderinte ilian striktan spacdisonon, kaj bedaŭrante mankojn eventuale eviteblajn per pliporpcia ekonomio, ni povas aserti, kun pli da justo ol da indulgo, ke ili prezentas frukton de sufiĉe konscienca laboro. Kiu ajn estu la redakta paro, ili elektus kaj arangus alie, laŭ propra aprezado aŭ senta devigo. Restas roke, ke Auld kaj Rossetti faris la akton, dum aliaj vate nestas en la kadro de kritikantoj.

La lingvo-manipulo, la esprima tekniko, ekster unu-du eroj, estas

tralibre sur nivelo super la mezo. En la poezio plaĉas la majeste-sonora traduko de Kanto 2 Paradizo Perdita, la verve vigla prologo al La Virino el Bado, sonetoj kaj scenoj el du verkoj Ŝekspiraj.

Ne mankas plezurigi sukcesoj ankaŭ ĉe la kelkversaj liriko kaj romancoj, kies nelongo neniel implicas facilan konservon de la subtila sentivo, la esenca parfumo. En sia "Jerusalem" de Blake, Dinwoodie superis la nekonaton en "British E-ist" Julio, 1945.

La redaktantoj, ŝajne pri ia bona principo, ignoris la tradukojn Ŝekspirajn de Louisa Briggs kaj C. Lambert, preferante spiri en freŝajn provojn la spiriton de nia plievoluta idiomato. Tamen, en la postlasitajo de la mortinta Brendon Clark ili trovas trezorujojn da tradukoj el la klasikaj poetoj.

Unu nebritoj, Prof-o Waringhien, kontribuis el Lyly, Drayton kaj Shakespere, sed la tradukoj de Kaloscay el Spenser, Milton kaj Shakespere ne represigis el "Eterna Bukedo" por nova vivo en ĉi-libro.

La 300 paĝoj saltas trans vastan pecon de literatura tempo, kaj prezentas kolekton da versteknika virtuoza kaj prozstila poluro, per kiu miloj da belon-serĉaj legamantoj admirante profitos.

La resuma skizo de M. Boulton estas miraklo de kompakta faktaĵo, spicita per brilpensa observo, interalie ankaŭ pri merituloj mankantaj en la libro mem.

La modesta prezo 30/- Aŭstralia mono. Turnu vin al nia ĉef-agento, Mr. G. A. Grant, 6 Mikado Street, Hamilton, Brisbane, Queensland.

P. 317, linio 1: legu "Herbert", ne "Herrick".

Pro ŝanĝo de presejo, "Sennacieca Revuo" (n-o 86) estas bonege produktita. Arte ilustrita, la ĉefa enhavo estas precipe vojaĝ-raporta kaj ekonomia, sed oni trovas ankaŭ lumdonan skizon pri Tolstoj kaj nelongan sed trafan pri la Finna verkmaĵstro A. Kivi. Valoraj prezentoj pri Islando, la petrola Saharo, Formozo kaj fantazia insulo Atlantika; pri la potenco de la Mono en la Demokratio, kaj vastrigarda studo pri la nuna soci-krizo.

33. eventuale (fine?); 47: novelo (romano); per nenia sencostreĉo oni rigardus "Milito kaj Paco" kiel "mal-longa beletra rakonto"! 47: bazigi (bazi).

S.A.T. pretendas al larĝmenseco en siaj sociaj kaj filozofiaj pritaktoj, sed iuj animoj povas rigardi kiel baze limigan la kulturcelon: "... per komparo de faktoj kaj ideoj... malebligis ĉe membroj dogmigon de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj." Se tio estas la celo, aligis al la "libera diskutado" de S.A.T. nur homoj strange dezirantaj formeti de si la proprajn konvinkojn... aŭ homoj sen tiuj fiksitaj opinioj aŭ kredoj. Cetere, kio estas "fakto"? Ĉu ĉia dogmo estas "malebliginda"? Ĉu dezirinde, ke homoj vagadu sen firmaj kredprincipoj, senankre flosante en la iluzio, ke ili estas pro tio efektive liberaj animoj? Sajnas, ke vane oni atendus artikolojn favorajn al teisma metafiziko. Tamen ankaŭ tiu filozofio meritus konsideron.

56 honeste kompostitaj paĝoj, por 5/- Aŭstralia.

HOMERO ANKORAŬ DORMETAS.

Idiomato: "lingvo propra al nacio aŭ provinco", Plena Vortaro. F.F. en "Progresanto", Marto, '58: "... tio estas nur lingva idiomato". Auld en "Esperanto" (samdate): "... miskompreno de miaj idiomatoj".

Per la supraj frazoj ni devas kompreni, ke s-ro F.F. povas koncepti idiomaton kiu ne estas "lingva", kaj ke s-ro Auld uzas plurajn naciajn aŭ provincajn lingvojn. Sajnas, ke ili plibone uzus "idiotismo(j)".

Senca misuzo de E-aj vortoj, eĉ en skriboj de eminentaj E-istoj, estas venene malesperiga, precipe ĉe pli ol ordinare sentemaj lingvouzantoj, kiuj estas ja sufiĉe konsciaj pri propraj pekoj en tiu sama afero. La plago ne limigas sin je efemeraj, diletantaj gazetoj, kaj leteroj de "novbakitoj"; ĝi makulas la kolonojn de centraj organoj, supozinde modeloj en ĉiu rilato, ankaŭ la lingvuza. Japanoj draste protestis en "Oomoto" (9/56) kontraŭ tiu malbela fenomeno, kaj atentigis, ke nepre estu unueca senco ĉe la E-terminoj.

Helpas al tio ĉiu E-isto posedanta la Plenan Vortaron kaj fidele redonanta ties difinojn en siaj propraj

skriboj. Tamen vortaroj estas nur iasence lambastonoj; sanaj homoj ordinare iradas sen ili. La idealo do estas, scipovi la lingvon ĝis tia grado, ke oni instinkte kaj fundkone uzas la vortojn laŭ ĝenerale akceptitaj difinoj. Tiun uz-facilon ni atingas nur per observa legado kaj pacienca pri-notado de vortoj kies senc-havo ne estas por ni tute klara. Tiun bazan disciplinon ni akceptu precipe dum la fruaj jaroj de nia E-isteco. Nur honeste farinte tion, oni povas, en postaj jaroj, uzi la vortarojn kun inteligenta kompreno de ties valoro.—F.R.B.

LA BATALO DE L'VIVO.

Tria eldono. Netakseble riĉa trezoro de la Zamenhofs lingvuzo, sed kiel redonilo de la senco kaj formo de la verko de Dickens ĝi enhavas multajn signojn de malkompleta kompreno kaj ne meritas la epiteton "perfekta". Ni rajtas supozeti, ke la germana traduko, kiun Z. uzis, ankaŭ estis iom manka. Kiu faris ĝin, tiu restas ankoraŭ nekonata. Pli ol unu germano, supozinde, provis traduki la verkon.

Principe estas bone, ke ordinaraĵoj homoj traduku nur verkojn el la gepatra lingvo. (La Rondo Sept. '56). Por la lingvistoj-superhomoj eble tiu principo ne absolute validus. Zamenhof scipovis kelkajn lingvojn, sed ne egale bone. Lia gepatra estis la rusa. "La Batalo de l'Vivo" li tradukis nur por konvinki sinjoron, ke li povas fari la germanan tradukaĵon en Esperanton.

Sefer kaj Lawrence asertis, ke la germana traduko estis bonega. Tio povas esti. Mi nur esprimas konvinkon, ke pli fidinda tradukaĵo rezultus, se la verkon tradukus laŭ la originalo teksto iu angla vortmastro, kiu funde scias la du lingvojn kaj jam liberigis el la katenoj de sialingvaj idiotismoj.

Oni scias la historion de tiu redaktoro, kiu iam decidis eldoni libron absolute pura de ĉia eraro tipografia. Andre Gide ĝin rakontis. La libro—"Les Aventures de Telemaque"—okupis la laboron de armeeto da korektistoj, kies devo estis forpeli la preserarojn. Post multmultaj revizoj, la redaktoro presigis la volumon kaj frotis la manojn pro kontento,

ĝis subite li ekvidis, ke la antaŭa kovrilparto surhavas, en literoj grandiozaj, titolon "Les Aventures de Telemarque"! Similan ĉagrenon devis sperti la kompatindaj eldonintoj de la tria eldono de "La Batalo de l'Vivo", ekvidante sian "Zamenhoff".

CITOJ INCITAJ.

Feminismo: movado celante havigi al virino egalecon kun viro laŭ ĉiu vidpunkto.

Ekvatoro: Imaga rondo linio pasanta tra la centro de la tero.

Adreso: Surskribajo enhavanta ia nomo kaj ĝian precizan loĝlokon.

Buŝo: kavaĵo de la homa kaj besta vizaĝo, tra kiu ili sin nutras. (Grenkamp-Kornfeld: Vortaro, 1937.)

"Kiu donacos pli ol 5 resp. kup. estos eternigata per dokumento . . ." —H. Steiner. Jen alloga propono!

"Kiu amas lingvon estas jam poeto; kiu amas du, fariĝos tradukanto". —Brendon Clark.

La Hispana registaro malpermesas apartan E-grupon aŭ societon; E-grupoj devas aliĝi al permesataj sociaj kluboj. Ili tial ne havas la forton de unuigo, kaj, kvankam ekzistas multaj E-istoj en Hispanujo, ili ne povas fari tiel multe tiel iliaj samcelanoj en aliaj lokoj.—North American E-Review.

ĈINOJ KAJ ESP-O.

Cino plendis, ke "E-o estas por Ĉinoj neniel facila, se ili ne scias iun Eŭropan lingvon".

Verdire, ĝi estas malpli facila por Azianoj, ol por Eŭropanoj. Tamen Azianoj bone notu, ke ne ĉiu lingvo en Eŭropo estas vere "Eŭropa" (t.e. Indogermana, Arja) lingvo. Ekz., Ia Finna kaj Hungara ne parencas kun la lingvogrupoj ĝermana, slava kaj latinida . . .

Malgraŭ tio, multaj Finnoj kaj Hungaroj majstre uzas E-on, nesicante alian lingvon krom la gepatra.

Infanoj de la Mondo.—Hongo 6-13, Tokio. 2 r.kup. Ni varme rekomendas tiujn eldonojn al ĉiu intereso pri E-o kaj infanoj. Notoj pri mondkonferenco Dimanĉerneja.

The Australian Esperantist

("La Rondo")

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15\$ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5\$.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.

Adreso de A.E.A.—Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

Kasisto: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

N-ro 4 (84).

MELBURNO.

Julio - Aŭg., 1958.

Esperanto in the Service of Science

Noteworthy Addition to Exploratory Literature.

"SCIENCAJ STUDOJ," 241 pp. in great octavo. Publishers: KOKO, Randbolvej 4, Copenhagen F. Australian £1/11/3.

This jubilee book of the Internacia Scienca Asocio Esperantista is the first Esperanto publication in which are collated solely treatises of strictly original research and observation in the various sciences. Apart from the introductory section, which includes a preface by the Association president, university rector Seihi Nishi, and an historical sketch on the application of Esperanto to science, the volume consists of two parts: The Humanities, with 15 articles on linguistics, history, law, psychology, &c.—and Mathematics and Natural Science, with 21 contributions on mathematics, astronomy, geology, chemistry, physics, zoology and anatomy.

Certain of these may present matter and treatment somewhat outside the range of the ordinary person, but in the former section there is much to engage general interest for anyone with normal intelligence and a questing mind. Their value is undoubted, and their patient compiling merits wide appreciation.

The second section is obviously designed to appeal primarily to specialists, who should find in its freshness and originality attractive material to supplement their knowledge.

The appearance of this volume is an outstanding event in Esperanto

history, not only by reason of its important observations in many fields, but also because it demonstrates the practical use of Esperanto at the hands of eminent scholars and scientists who have thus given model examples for an extended application of the international language for specialised or recondite texts.

Dr. Paul Neergaard is the editor, and among those assisting are the highly qualified Collinson, Waringhien, Privat, Wuester, Setala, Manders, Perez, Migliorni and others, lesser known to us but soundly accredited to their vocations. Prof. C. J. Adcock, of New Zealand, gives a psychological paper on Perception and Subception. Among subjects of significance to Esperantists as such are: Idioms and Idiotisms; Word Frequency as a Basis for Dictionaries; Reform of the Chinese Written Language; Verbs in Shakespeare; Grammatical Category of Words; Genesis of Folk Songs et al.

The scientific items range from the purely mathematical — through the study of crystals, colors, new vines, polichetes, legume sugars, phosphate manures, vitamins for algae, oceanography, sex determination of silkworms and so on—to the effect of umbilical position on pelvic capacity.

To appraise critically and in detail such a work would call for a universal genius such as Da Vinci, Goethe or Swedenborg. Even an academically trained Esperantist could

at best dilate with any authority on the subject(s) familiar to him. Here then are indicated only the scope of the enterprise, and witness given to the clarity of language and value of matter in sections where this is feasible to the present reviewer.

An 8-verse poem by Poul Thorsen fittingly serves as l'envoi to the volume, which is adorned by photos, designs and vignettes.

A volume will appear every two years if enough subscriptions are forthcoming. This should not be difficult if the response is as it should be from those to whom the work offers so much. A copy should be in every university library as well as on the shelves of every Esperantist able to use it.

YEARBOOK OF U.E.A.

The yearbook of the Universal Esperanto Assocn. is a vastly different publication from that of the first, in 1908, which had 28 pages. Today it is a nuggety 4½ by 6, with 393 pages. Listed are 2539 "delegates", in 62 countries. Australia has 18; France, the highest, 251. Gazettes, reviews, &c., number 76.

A useful table is that of the "stelo," money unit, rated at 6d. English, 7½d. Australian. It were a blessing if all Esp-o books, &c., bore the price in steloj, instead of the kaleidoscopic national currencies—an enigma for all but bankers and commercial editors. This criticism does not apply to the subscription list on p. 48, where the sums are clearly indicated in round figures for each country concerned.

This compact guidebook is essential for every active E-ist. Seated in his chair at home, the possessor of it has an army of fellow-workers at postal call; travelling the routes of the civilised world, he has a vade mecum unique in its capacity to pierce the barriers that bar or mar free intercourse in foreign lands, and reveal the "lord of creation" as more helpless than the animals that serve him.

Details: K. Linton, 11 Poplar St., S.E.3, Victoria.

Australia Kroniko

BRISBANE: Veturante Kvinlandon laŭ la metodo "Dika Fingro", juna s-ano el Viktorio post 2 tagoj atingis Albury'n, de kie li akceptis proponon akompani 2 personojn en aŭtomobilo ĝis Brisbano. Rezulte de troa dumvojaĝa drinkado, la du homoj ebrie batalis inter si, tiel malkaŝante tro da sekreta informo pri si, inkluzive siajn nomojn.

Post iometa malebriĝo ili konstatas ke al la pasaĝero ili malkaŝis jam tro multon pro siaj troaj paroloj, kaj per minacoj pri perforto kontraŭ li, malhelpis ke li forlasu la aŭtomobilon. Tamen, alveninte Brisbanon, li, per lerta ruzo sukcesis eligi sin for el iliaj manoj, kaj postlasante sian pakajon kiel revengaranton, per taksio fuĝis al la domo de la UEA-delegito. Tiu, post ol audi la historion, tuj kondukis lin al la policejo kie li tutdetale rakontis la okazon. El inter kelke da portretoj de krimuloj montritaj al li, li identigis unu kunvojaĝanton.

Kvar detektivoj, gviditaj de nia amiko, iris al apuda antaŭ-urbo, kie ili kaptis tiun homon kies portreto estis rekonita ĉe la policejo. Li estas krimulo longe serĉita pro krimo farita ĉe Townsville, N.Q. Saman nokton, en pli fora parto de la urbo la due fripono estis arestita, kaj de li la detektivoj forprenis la pakajon de nia amiko.

Varme dankante nian s-anon pro lia altvalora helpo pri la kaptado de la krimuloj, la detektivoj tre laŭdis lin pro tio ke li povis tiel senhezite gvidi ilin al la ĝusta loko en urbejo kiun, ĝis antaŭ 5 horoj, li neniam antaŭe vizitis. Lia nomo?—Nia juna germana s-ano kaj A.E.A.-membro ROLF AHRENS.

NASKIĜO: Al Johanna kaj Jozefo Matzner, la 25-an de Majo 1958, naskiĝis filo Robert. Gratulojn kaj bondezirojn.—S. L. PARRY.

SYDNEY: S-ro W. Chandler montris (3/5) tre interesajn malnovajn filmojn, kiuj estas valora havaĵo por film-kolektantoj. Inter ili estis tre primitivaj movigantaj filmoj el la pionira periodo. S-ro Stubbs (7/6)

montris filmojn pri Svislando, Svedujo kaj nia-propra Guthega Projekto. Ĉi-tiu kunveno estis ankaŭ la adiaŭa festo por nia Vicprezidanto J. Matusin, kiu kun la edzino ekveturis (15/6) por mondvojaĝi dum proks. 2 jaroj. Nia kantado bone progresas dank' al la nova piano, ludata de nia nov-varbita Norman Stimson, kiu estas muzikisto.

Membroj de la estraro ĉeestis kunvenon de la "New Education Fellowship". Parolinto estis Prof. H. D. Black kaj la temo "Edukado por Mondfrateco". Kompreneble ni sugestis en la diskutperiodo la plej valoran metodon por tiu edukado. Tamen, kiel ĉiam, ni trovis ke kvankam N.E.F. ŝatas paroli-paroli, ĝi ne volas fari ion praktikan por internacia frateco.

La raporto fine publikigis de la Komitato por Duagrada Klerigo en N.S.W. En 1955 s-ro Chandler kaj s-ino Barlow atestis antaŭ tiu komitato. Bedaŭrinde, malgraŭ la bona impresio kiun faris niaj argumentoj, la komitato menciis eĉ ne unu vorton pri Esperanto. Ni devas konfesi ke ni esperis pri pli da sukceso, ĉar la membroj de la Komitato, kaj speciale la Direktoro de Klerigo, D-ro Wyndham, montris intereson kaj diskutis E-on private kun ni post la oficiala periodo.

La grupo en Strathfield High School laboras kaj pligrandigas. Kelkaj knabinoj, kiuj komencis lerni en Februaro, jam korespondas kun 3-4 landoj; novaj varbitoj venas de tempo al tempo. La nombro nun preskaŭas 40. Ankaŭ familianoj de iuj knabinoj lernas en la hejmo. Unu frateto, kiun la instruistino neniam vidis, nun havas 4 korespondantojn en diversaj landoj. Du patrinoj kaj unu patro ankaŭ lernas de la filinoj.

Nia ŝatata membro Frank Dash pasigis kelkajn semajnojn en hospitalo pro operacio, sed ni ĝojas raporti ke li jam tute resaniĝis.

CANBERRA: En Majo s-ino Torr finis kurson por junuloj. La knaboj estis ekzamenitaj de nia Prez. s-ro Robbins. Andrew Hopkins, la gajninto, 12½ jaraĝa, ricevis "Nelson's E-Course" kiel premion. La filo de s-ino Torr, Graeme, ekkorespondis

kun bulgara knabo, 14-jara. Dum la maja kunveno, en la hejmo de Ges-roj Torr, nia prez. s-ro Robbins, denove prezentis interesan programon de Magio, Gramatiko kaj Ekzercad-Ludoj.

La junia kunveno okazis en la hejmo de Ges-roj S. Fulop. S-ro Fulop aranĝis bonan programon de E-kartludoj, 2 teatraĵetoj kaj belaj lumbildoj pri Nederlando. Ni estis feliĉaj bonvenigi Ges-rojn van Dyke kaj ni esperas vidi ilin ĉe estontaj kunvenoj. Post foresto dum kelkaj jaroj, f-ino Joan Murray, lernanto de s-ro Fulop, revenis el Eŭropo. S-ino Fulop fine regalis nin per bongusta vespermanĝo, el kiu elstaris la bongustegaj nederlandaj kukoj.

MELBOURNE: Multvariaj estis denove niaj programoj lastatempe. F-ino Rita van Ryswyck (4/6) rakontis pri "Ferioj en Europo". S-ro E. Hanks prezentis (11/6) unu el siaj ĉiam interesaj preleĝoj kun lumbildoj, kiu temis denove pri arboj, floroj kaj birdoj en Viktorio. S-ro H. Koppel, kiu alvenis ĉe ni ĵus antaŭ 10 jaroj el Kanado, uzis ĉiun okazon por montri (18/6) 5 sonfilmojn pri tiu vasta kaj interesa lando norde de Usono. F-ino A. Godfrey (25/6) prezentis denove interesajn kaj amuzajn elĉerpajojn el anglaj jurnal-oj de la 19-a jarcento.

S-ro K. Linton, 4/6 kaj 2/7, daŭrigis sian serion pri E-gramatiko. La anaro ĉiam sekvas liajn preleĝojn kun granda intereso. "La mondo antaŭ 50 jaroj" estis la temo de interesa preleĝo, kiun faris s-ro A. Fridenbergs (9/7). Ĝi ĉefe temis pri la studentaj jaroj de s-ro Fridenbergs dum la tempo kiam Latvujo estis parto de cara Rusujo. Pri "Aŭstraliaj Esploristoj" parolis s-ro E. McKenzie (16/7) kaj je 23/7 f-ino Wilson, amikino de nia membro f-ino A. Paling, parolis anglalingve kun lumbildoj pri vojaĝo tra Usono. D-ro Fred Williams (30/6) rakontis al ni pri sia E-vivo en 3 kontinentoj.

En la maja kunveno de la "RENDEVUO", s-ro Ken Linton analizis diversajn homtipojn kaj kiel oni povas rekoni ilin laŭ aspekto de okuloj, buŝo, nazo, frunto k.t.p. En Junio, nia diplomato, s-ro R. Harry,

gvidis nin al ne multe konataj Malajo, Borneo kaj al Hong-Kong. Li ilustris sian prelegon per memfaritaj belaj kolorfilmoj. En Julio s-ro H. Koppel rakontis pri la vivo kaj verko de D-ro Semmelweis, hungara kuracisto, kiu dum sia laboro en vienaj hospitaloj elkovris la kaŭzon de post-akusa febro, mortmalsano de miliono da virinoj en antaŭaj tempoj.

UNU FOJON EN CENT JAROJ

Tra la tuta mondo la Esperantistaro preparas sin por la 100-jara datreveno de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof. Ankaŭ ĉe ni en Aŭstralio ni ŝatas digne honori nian Majstron. A.E.A. elektis eminentan membron, S-ron Ralph Harry, kiel "Komisiiton por la Zamenhof-Jubileo 1959". Li jam ellaboris detalan programon: Prelegoj per la radio kaj ĉe multaj ne-esperantistaj organizoj, eldono de speciala, pli granda, eldono de "Australian Esperantist" en angla lingvo, kaj tute dediĉita al D-ro Zamenhof, estas nur kelkaj el la eroj de ĉi-tiu programo.

Sed, "unu fojon en cent jaroj", ni povos streĉi niajn fortojn plie!

Tial estas nia intenco krei monumenton al la memoro de D-ro Zamenhof, monumenton ne el ŝtono, sed vivantan monumenton. Nia celo estas propra domo — "Zamenhof House"—kiu servos por ĉiam kiel centro de nia movado, loko de granda biblioteko, loko de arĥivo, kie ni povos kolekti ĉion kio koncernas la internacian lingvon, loko kie Esperantistoj el tuta Aŭstralio povos renkontiĝi. La venonta kongreso en Hobart decidus en kiu aŭstralia urbo estos starigota ĉi-tiu vivanta monumento.

Por efektiviĝi ĉiujn niajn planojn ni komencis "Zamenhof - Jubilean Fonduson" kaj ni invitas ĉiun Esperantiston tra tuta Aŭstralio, "unu fojon en cent jaroj", fari sufiĉe grandan oferon al ĉi-tiu fonduso. Sendu vian kontribuon al nia kasisto, s-ro Ken Linton, 11 Poplar St., South Caulfield, S.E.8, Vic. Sufiĉas se vi nur faros "promeson" pagi ĝis la fino de 1959 certan sumon; monon vi povos sendi poste.

Se ni ĉiuj forte kunagos, tiam ni certe atingos nian altan celon!

—Herbert Koppel, A.E.A. Sekretario.

£362/10/-

Jen la unua sumo kontribuita al la "Zamenhof-Jubilea Fonduso".

Je la 11-a de Julio 41 ges-anoj kunvenis en la eleganta "Crystal Room" de la "Oriental Hotel" por inaŭguri la grandan kampanjon por la Zamenhofa Jubileo. Cef-parolinto estis S-ano Ralph Harry, Komisiito por la Zamenhof Jubileo, kiu detale klarigis la planojn de A.E.A. por la jubileo kaj kies kulmino estos la kreo de "Zamenhof House", kiel centro de nia movado sur ĉi-tiu kontinento. D-ro Fred Williams, nome de A.E.A., kaj S-ro E. McKenzie, nome de la Melburna E-Klubo, estis la aliaj parolintoj dum la vespero, kiu finiĝis per bongusta manĝo. Regis granda entuziasmo kaj ni ĝojas anonci ke entute venis kontribuoj aŭ "promesoj" je £362/10/-.

1-a Listo de Kontribuoj:

Aŭstralia Esperanto-Asocio ..	£50
Melbourne Esperanto Club ..	£35
Dr. F. Williams	£50
S-ro H. Koppel	£20
S-ro R. Harry	£20
D-ro A. Fridenbergs	£20
S-ro I. Grahovac	£20
S-ro E. McKenzie	£20
S-ro K. Linton	£20
F-ino G. Calwell	£10
F-ino V. Cox	£10
F-ino A. Godfrey	£10
Ges-roj S. Milligan	£10
S-ino M. Herman	£10
Ges-roj Ryding	£10
Ges-roj Stope	£10
S-ino F. Koppel	£5
S-ro H. M. Cohen (1-a pago)	£5
S-ro W. J. Drummond	£5
"Verda Stelo"	£5
S-ino E. Fes	£5
S-ro E. Ottens	£2/10/-
S-ino E. Hill	£5
D-ro R. Robbins (Canb.)	£5

ESP. AND MEDICINE

The Italian medical review "Therapeutica Nova", via Marocco 20, Milan publishes resumes in Esperanto of the articles it contains. The editor wishes to exchange with other medical gazettes doing the same. Address: Luigi La Pila, Viale Col di Lana 4, Milan.

Recenzoj

"BELARTO": Eld. U.E.A., 72 pj. Ilustrita, ankaŭ grandioza kolorbildo. 13 steloj (11 por UEA-anoj).

De dokumenteca valoro estas artikoloj pri Schleyer kaj Volapuk; komentoj pri Internatational Language Review; la rilato de la aĝo al la poezia talento E-a; vortdraŝo kontraŭ iaj "recenzuloj" kaj enketo en la "mi-econ" (ne "miop-econ!") de poetoj ("3000 el 40,000 Danaj poemoj komenciĝas per "Mi"); rebato de Lapenna al tiesverka kritiko far Solzbacher, k.t.p.

En la 23-verkula kompilo Francis kontribuas simbolisman novelon pri tentata ermito; Ragnarsson studon pri Islanda pentristo Kjarval. Inter la 17 poemoj elstaras Donna Klara (Heine) trad. Kalocsay, kaj Odo al Najtingalo (Keats) trad. Francis. Sceno el "Faŭsto" (trad. B. Mirski), el La Nova Epoko, 1922, estas utila represo, kiu sci-akire kompariĝas kun la tradukaĵo de Bartelmes. Teksto kaj signoj de ario "Memnon" (Boulton kaj Merrick) plaĉas al muzikuloj.

Per la Odo, Francis faris kuraĝan provon, helpante sin per tre, se ne tro, modernisma vorttekniko. "with beaded bubbles"—"kun perlaĵ blazoj." Kial ne "kun perlsaŭmeroĵ"; aŭ, "perlbobeloĵ"? "mossy ways"—"vojoj antraĵ"; vojoj muskaj? "charmed magic casements"—"psilis magiajn vitrojn". sorĉis? Fr. psylle, serpent-sorĉisto. "and mid-May's eldest child"—"kaj maja bel' atuta". Neklara. "emperor and clown"—reĝo kaj regato". Francis tie bone redonas la tiaman sencon de "clown".

La cetera enhavo, pro sia vario, allogos diversajn temperamentojn.

Ĉi literatura-kultura periodaĵo impone prenas lokon apud La Revuo de S.A.T., kiel taŭga prezento de la E-a kontribuo—sensa kaj mensa—al la universala spirito.

4: iniciado, iniciĝo (inicado, iniciĝo); 13: anesteza (anestezita); 63: venenigado (venenan).

LIBERA FORUMO

"Responde al D-ro Williams kaj la subnoto: Ĉu la AEA konsentas aŭ ne, ni fakte havas klubon en Adelaido kaj antaŭe havis dum multaj jaroj.

Ke ĝi ne konformiĝas al la reguloj de la AEA ne estas grave. La kelkaj membroj estas tre fidelaj kaj renkontiĝas dusemajne. Nur mal-sano, urĝaj aferoj aŭ, kompreneble, malproksimo malhelpas ĉeston. Ni legas, studas, parolas, renkontas vizitantojn kaj respondas al demandoj pri Esperanto k.t.p. Sed ni ne ludas per ladaĵ soldatoj (difinante, ke el la kvin aŭ ses membroj unu estu prezidanto, unu vicprezidanto, unu sekretario k.c.). Tial la AEA rifuzas rekoni nin. Denove ni diras: Ne gravas.

"Oni diris: La litero mortigas sed la spirito donas vivon. La spirito ne estas mortinta; la klubo daŭre funkcias feliĉe (kvankam, ni bedaŭras, sen aprobo de la AEA). Niaj reguloj ne devus ĝeni al la AEA, ĉar nia klubo ne deziras aliĝi al la AEA, nek partopreni la venontan kongreson. Estonte ni plugos nian propran sulkon.—Jean C. Kempson.

"Mi pripensis bagatelon pri E-o. Se, ekzemple, mi iris al la loka klubkunveno, kaj poste alia E-isto, kiu ne povis ĉesti, iris al mi: 'Kiom da personoj ĉestis?'. Mi povus respondi 'Du-tri' aŭ 'Kvin-ses', aŭ eble 'Dek-du-dektri'; sed, se mi dirus 'Naŭ-dek' li preskaŭ mortus pro mirego, ĉu ne?'—V.F.

BULGARIAN FILMS

The Department of the Cinema in Bulgaria has added an Esp-o edition to its issues of information reviews in several languages. These are widely sent to newspapers, firms, cultural centres and individuals for the use and reproduction of the articles they carry.

The publishers keenly look for the co-operation of all E-ists interested in the art of the film, seeking especially notes on technical terminology. The contents deal with Bulgarian films in the fields of art, popular science, documentation, cartoons and puppetry. The closing article gives a resume of the progress and statistics of the cinema in Bulgaria.

I have some copies available on request. Address: G. Stojanov-Bigor, str. Grivica 7, Sofia 2.—Editor.

ONI DIRAS:

"Ĉiu eldonisto, kies eldonoj ĉerpas nur el la vortprovizo de La Plena Vortaro, signu siajn presajojn per certa marko—Ĉi tiu marko al vi asertas, ke Plena Vortaro ĉion klarigas. Faklibroj kaj vortjonglaĵoj tiam povos aperi speciale por la rondoj, kiuj bezonas tiajn. Postulu la P.V.-markon sur la titolpaĝo".—Magel en "Nederlanda E-isto".

"Marjorie Boulton estas sendube la plej produktiva poeto iam verkinta aŭ verkanta originale en Esperanto".—Ragnarsson en "Norda Prismo".

Auld asertis: "Esperanto kapablas ĉion!" Ĉu do ĉi kapablas traduki la poemojn de Browning en klare komprenatan Esperanton? Tio verŝajne estas malebla, tial ĉar la originaloj estas tiel enigmece. E-isto, supozinde, "kapablas" nur transdoni la pensohaoson en sian propran idiomaĵon, se li ne sukcesas kompreni la efektivan dirvolon, t.e. la sencan, de Browning, kaj sekve parafrazu ĝin en klare espriman lingvaĵon. Komparu tiun rimarkon kun la tre malfacila "The Grammarian's Funeral" ("Literaturo", Okt. 1922) kaj la deklaro de Zam. en la antaŭparolo al la Psalmaro.

PRI LA LIBERECO

En 1957 Prof. A. van Drummen, Nederlanda E-isto, vizitis Brazilion. Intervjue ĉe la Radio Ministerio por Edukado en Rio li diris: "Forte impresis min la libereco de la individuo Tie ĉi ĝi jam montriĝas en la aŭtobusoj, kiuj haltas kie ajn oni volas. Kaj kiam estas la horo por vespermanĝo, aŭ kiam pluvegas, oni plenegigas la veturilon (certe tio estas kontraŭ la reguloj). Soforo kaj pasaĝeroj povas fumi kiam ajn ili volas. Eĉ piedirantoj havas plenan liberecon transiri la straton kie ajn ili volas (eĉ kontraŭ malfavora trafiklumo). Veturiloj povas iri tiel rapide kiel ili deziras. Tamen Rio estas pli-ol-miliona urbo kaj en unu tago oni ne konstatis eĉ unu akcidenton".—"Rio Esperantista", Jan. 58.

ELSIE PROCTOR MORTIS

Kun granda bedaŭro ni anoncas la morton de nia fidela membro F-ino Elsie Proctor (Launceston). Aŭtomobilo frapis ŝin, kiam ŝi transiris straton apud sia hejmo, revenante post laboro. Severe vundita ĉe la cerbo, ŝi kuŝis senkonscie kvar tagojn en hospitalo, kaj mortis la 22an de Junio. La kremacio okazis du tagojn poste ĉe la Tombejo Carr-Villa.

F-ino Proctor, kiu lernis Esperanton en Perth, regule vizitis niajn tutlandajn kongresojn kaj malvare subtenis al A.E.A.

NOVA LIBRO-SERVANTO

Ni informas niajn membrojn en tuta Viktorio ke la ĝisnuna ŝtata libroperantino, s-ino O. Glenie, rezignis de tiu posteno pro malsano kaj multokupiteco. Ni deziras ĉi-loke publike danki al s-ino O. Glenie pro la multjara servo, kiun ŝi donis al A.E.A. en ĉi-tiu grava fako de nia kultura laboro.

La nova perantino: S-ino S. Milligan, 274 Mont Albert Rd., Surrey Hills, E.10, Vic.

Ĉef-Peranto por tuta Aŭstralio: S-ro G. Alan Grant, 6 Mikado St., Hamilton, N.E.2, Brisbane, Queensland.

ESPERANTO AND PHOTOGRAPHY

Gevaert Photo-Producten, Mortsel, Belgium, sent us an attractive article in Esperanto on photography. It outlines some of the ways in which the camera is furthering efficiency in art, science and education. Photography is no longer a mere social adjunct of life, but a highly developed technique essential to human progress in all fields. The firm seeks suggestions for closer contact between Esperanto and photo work.

TURISMO

M. Retot asks for addresses of any hotels or the like where Esperanto is used. To such he offers free publicity in a tourist guide book. 162 Bd. Aristide-Briand, Montreuil (Seine), France.

EL LETERO AL

Kara

Verdire, vi estas tre klera knabino, ĉar, laŭ via deziro, vi volus korespondi **pri ĉiaj temoj!** Mi dube demandas al mi, ĉu vi dezirus letere pritrakti—la vektoraj elementoj de planetorbitoj, kaj la involucio de la vektora kalkulo; la matematiko de minimumaj surfacoj; geologiaj kaj geofizikaj fenomenoj en Japanujo; la limigantaj facoj de kristaloj; la kolor-sistemoj en la farbindustrio; la vitamin-bezonoj de algoj; la polihetoj de Norvegujo; seksdeterminado de vermoj; biogenezo kaj partenogenezo; la teologio de la Haldeo; la traŭma teorio de Freud; la prozodio de la trubadoroj; la semantiko de la Latina lingvo?

Ne, kara! Ne uzu tiun frazetaĉon, "pri ĉiuj temoj". Tio pensigas homojn pri tio, kion vi certe ne kulpas—la suprajemo, malprofunda pensado kaj diletantismo. Multe helpus se vi klare limigus vian tem-elekton kaj nete indikus vian preferatan kampon de intereso.

Neniu ordinara homo rajtas tiel frazuzadi; eble nur homoj, kia Goethe, aŭ Da Vinci, aŭ Swedenborg. Por ni, simpluloj, devas sufiĉi tre modera penso-tereno.

ALDONE PRI

"La Geografia Revuo". Ĝi ne estas destinita sole nur por **profesiaj** geografoj, sed celas kunligi ĉiujn homojn, kiuj profesie aŭ **amate** okupiĝas pri geografio, antropologio, etnologio, arĥeologio, folkloro, mont-grimpado, speleologio, vojaĝoj k.t.p. Sendu 10/- por jarabono al S-ino Irene Fink, 100 Headingley Rd., Mt. Waverley, Vic.

STRANGA ERARO

Sur p. 19, Libera Forumo, "mondo" mistere enŝteligis, por uzurpi la gŭstan "nomo", kiu estas en la manuskripto. Kiel tio okazis, jen demando por la psikologoj, ĉar la kompostisto, laŭ nia supozo, ne scias E-on. La vorto "mondo" ne troviĝas apudlinie en la raporto. De kie do li ricevis la sugestion?!

KLUBAJ ADRESOJ

Sydney E-Societo: kunvenas ĉiu-jaŭde je la 8a ĉe 12 Ennis Rd., Milson's Point (stacidomo). Sek-io: f-ino Edna Dash, 26 Edgeware Rd., Enmore, NSW.

Melbourne E-Klubo: kunvenas ĉiu-merkredo je la 8a ĉe "Henry George" Club Rooms, 18 George Parade (for de 113 Collins St.), Melbourne.

Sek-io: s-ro H. M. Cohen, 83 Youngman St., Preston, N.18.

Okcident-Aŭstralia E-Ligo kunvenas ĉiun 2-an kaj 4-an jaŭdon en monato en ĉambro 6 ĉe 196 Adelaide Terrace, Perth. Prez.: s-ino G. Pollard, 45 Second Ave., River-ton, W.A.

Brisbane E-Societo: Prez.: s-ro S. L. Parry, Ford St., Albion, N.2, Brisbane.

Canberra E-Klubo: Sek-io: s-ro N. Gamble, 27 Froggatt St., Canberra.

Hobart E-Grupo: Sek-io: s-ro Geo. E. Lancaster, The Friends' School, 393 Argyle St., Hobart, Tas.

ANTAŬDIRO

En letero al W. T. Stead, ĉ. 1890, "Ouida" (Maria Louise Rame) skribis: "Germanujo ĉiam fatale rilatis al Italujo, kaj ĉiam tiel rilatos. La tempo venos, kiam Germanaj trupoj devos konservi 'la socian ordon' en la urboj kaj provincoj de Italujo. Kiel longe daŭros la Germana alianco en sia nuna formo, tiel longe daŭros tiu danĝero por Italujo. Kaj se la Reĝa Domo de Savojo estos forpelita el la Kviralno, ĝi povos danki tiun potencperdon tute kaj nure al sia propra politiko".

Alicite: "La militado, kiel ni ĝin konas, tre povas fine neniigi, ĉar armeoj reciproke eksploddetruos sin en la spacon."—The Fine and The Wicked: Stirling.

Passing the German-Danish frontier motorists receive a slip in English, German, French and Esperanto advising them on traffic arrangements for further travel. The Danish Railways thus use Esperanto.

PROSPECTUSES

in Esperanto continue to reach us. One on Mainz, 8 pages in color, touch on all the attractions, old and new, of this city where the World Esp. Congress this year had its venue. Get one of the 10,000 copies from Stadtisches Presseamt, Stadthaus, Mainz.

Malmö presents a fine color job, with rich text on the town's amenities and treasures. Write asking for the Esperanto brochure to: Turisttrafikforening, Malmö, Sweden.

The Fair in Marseille, September, invites you to its Esperanto folder, too. Since 1932 this Fair has favored Esp-o. Internacia Foiro, 36 La Canebiere, Marseille.

The German Railways have a treat for art lovers with its two booklets, Salto tra Jarcento, and "Saĝu, Vojaĝu!" Both are illustrated, the first by the famous Daumier, 1808-79, who takes us back to the early days of rail travel, in sad comparison with the luxury of today. A modern artist points the difference: Bundesbahn-Werbeamt, Frankfurt-am-Main.

Norway comes in with an Esperanto lay-out of its service by the Peter Wessel, an "auto-pramsipo" which in 8 hours covers the sea between Larvik and Frederikshavn. Boks 2443, Oslo, Norway.

The Tourist Transport Assn. for Oslo and district have chosen a novel means of presenting local attractions. It is in the form of a hand-written letter in Esperanto (mimeographed), such as any helpful correspondent would compile. Copies: Box 942, Oslo. Send a reply coupon.

An Esperanto film, "Bonvenon al Oslo," is on loan from the same address.

Landkarto pri Svedujo estas perfekta de la turisma kartografio. La detale klarlinia mapo—kopirajta de la Kartografiska Institutet — forte plaĉas al ĉiu amanto de la geografio. Ĝi prenas lokon inter la plej bonaj en sia speco. Belaj fotoj ilustras la tekston, nete informan pri multo koninda. Ni rekomendas peti ĝin ĉe la eldonejo: Svenska Turisttrafikförbundet. Stockholm.

ESPERANTO IN SCHOOLS

In Britain 15 schools are teaching E-o to pupils; in 9 of them it is a part of the curriculum.

World figures (vide UEA year-book) are, for 1955-6, 148 schools in 23 countries; 457 teachers in 35 lands have announced themselves ready to teach E-o when called on.

ADULT EDUCATION

The first Int. Conference of People's Universities (Evening Institutes) in August, 1957, was initiated by E-o organisations, convened under the auspices of UNESCO and held at the UNESCO Palace in Paris. Esperanto was the only translation language and most delegates spoke it.

PLUMAMIKOJ

D-ro S. P. Moskov, ul. Prof. Moskov 6, Sevlievo, Bulgaria.

Neuzitaj p.m. kun Aŭstralio kaj Japanujo.

Albert Henzl, Hornicka 172, Zaluza i Mosta, Czechoslovakia. Bildkarto kaj E-ajoj.

F-n Krystna Glowacka, 20-jara, ul. PPR 83, Czestochowa, Poland.

WOULD the member who has the "PLENA VORTARO"

please return it immediately to the Librarian, Melbourne Esperanto Club.

The original Esperanto story, **Kredu Min, Sinjorino!** by Cesar Rossetti, is to appear in an Hungarian translation.

Teruroj de l'Infero (Terrors of Hell), in a large edition, has been translated into German from the Esp. translation of the work by a Japanese professor at Hiroshima. Publishers are the East German Peace Council.

Hackenschmidt & Esp-o.

The British Esperanto Assn. received a letter from the Estonian Wrestlers' Section in Tallinn, asking for the whereabouts of the one-time champion, born 1878 in Tartu, Estonia, and since the close of the last century living in London. The B.E.A. found him, and secretary Leslie was rewarded by a thankful letter from Hackenschmidt.

The Australian Esperantist

("La Rondo")

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15\$ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5\$.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.

Adreso de A.E.A.—Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

Kasisto: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

N-ro 5 (85)

MELBURNO.

Sept. - Okt., 1958

Why speak Esperanto and not English at our Congress ?

From Dr. Zamenhof's speech to the Preparatory Conference of the Esperantists of Russia at St. Petersburg, 1910. Translation by Conrad Fisher, in "North American Esperanto Review".

Esteemed ladies and gentlemen! Perhaps you will wonder why I am speaking to you not in Russian, but in Esperanto; perhaps you will say that, since we are now holding a congress of citizens of the same realm and all, or at least nearly all, its participants understand very well the same language, it is much more natural to speak to you in that language. However, there are important reasons why I chose for my talk that language for which we are fighting and for which we are meeting.

Our congresses, not only the universal ones, but the national ones, have above all an instructive and educational significance. Esperantists, scattered in different cities and towns, meet in a more or less large mass to hear our language, to check on whether they have correctly mastered the language, whether they understand it well, to compare their own manner of speech with the accent of more experienced esperantists. When they later return home, they not only speak more purely themselves, but they bring back a model of good speech to those who stayed home. Thus, the congresses regulate the usage of the language, and thanks to our congresses Esperanto is now spoken uniformly not

only in the distant corners of every separate country, but in the most diverse places of the globe. Already when we hear a good and experienced Esperanto orator, we can in no way guess the nation or country to which he belongs. The entire autonomous life of our language, with its own spirit, in no way borrowed or imitating any other, is ever more strengthened in that way, as if esperantists of the world lived together on one small piece of ground.

No less important is the educational significance of the Esperanto congresses. Isolated esperantists, who never had the possibility of applying in practice what they've learned, often doubt if they could really become understood when they speak Esperanto. Even within the Esperanto clubs, they are often afraid to speak in Esperanto, they stammer, they prefer to speak in their own national language, and in proportion to the lack of courage in speaking Esperanto there also appears a lack of boldness in promoting it, because the esperantists who speak it haltingly in spite of themselves are not able to free themselves from the fear that perhaps Esperanto after all is only a more theoretical matter than a practical one. But when the stammerer comes to the congress, he has a

enhance to hear good and experienced Esperanto orators; when he becomes convinced with his own ears and eyes how beautifully and fluently Esperanto can be spoken, he becomes enthusiastic, he sees that he is working for something living and full of life, and he returns home with new courage and energy. Our congresses, not only the universal, but also the local ones, thus educate convinced, consequently enthusiastic, fighters for our cause.

That's why in all our congresses we must all speak not only about Esperanto, but in Esperanto, not only in the universal, but also in the national and regional ones.

—Originala Verkaro.

SAVE YOUR PAPER!

How many of you keep The Australian Esperantist? The time, energy and money spent in producing this paper for you seems largely spent in vain when one sees it used as pipe lighter, curling wisp, mess mop or junk for the incinerator. To some this may be regarded as a fate fair enough; to others, a few at least, such treatment savors of thoughtless waste of a durable asset. Not only does the gazette record the course of our activity here, but it contains elements of permanent worth. The shelf space for say ten years' issues would occupy no more than that of a few novels.

Not a few long and faithful subscribers, active in teaching and preaching Esperanto, have not saved their copies, and are as a result much the poorer in proficiency and power to develop their work. To be well informed on Esperanto one must preserve for frequent reference: "Esperanto", "The British Esperantist", and "The A.E." These three organs should be privately indexed, all matter in them that appeals to you as having peculiar interest being recorded under distinctive headings. Called on for an address at club or on radio, or to elucidate some point concerning Esperanto, you have only to consult your index, turn up the indicated articles and you have got the lot.

Australia Kroniko

HOBART: Nia klubo kunvenas ĉiun vendredon en la hejmo de Gesroj M. Leereveld, 61 Main Rd., New Town, de 7.45-9.45. Ceestis 6-8 personoj kaj alterne ni korektas kaj preparolas hejme faritan tradukajon. Ni kune legas E-libron, momente la teatraĵon "La Lasta Sanco". Dum la lasta duonhoro de la vespero ni ludas iun ludon por paroligi niajn anojn.

Plue ni kunvenas ĉiun unuan dimanĉon en la monato, posttagmeze de la 2-a ĝis la 5-a en la "Friends' School". Tie ni pritraktas diversajn aferojn, gramatikojn ktp.—A.L.

CANBERRA: La aranĝinto de nia aŭgusta klub-kunveno estis nia membro Tim Cobham, kiu aranĝis tre interesan vesperon ĉe "Barton House". Nia membro f-ino Joan Murray, kiu antaŭ nelonge revenis el Port Moresby, prelegis pri Nov-Gvineo kaj ilustris sian interesan vojaĝraporton per belaj koloraj lumbildoj. La "Canberra Times" (21/8) detale raportis pri tiu kunveno.—H.T.

SYDNEY: La 2-an de Aug. S-ro Norman St. Clair Anderson, pastro de la Kongregacia Eklezio kaj prez. de la Aŭstralia Pacasambleo, prelegis pri vizito al Japanujo, kiun li faris okaze de la datreveno de la atombombfaligo sur Hiroshima. Li priskribis la packongreson en Tokyo kaj la paclaboron en Japanujo. Li montris al ni tre klarajn bildojn pri Japanujo kaj konfesis ke la nescio de internacia lingvo tre malefike influas la laboron de la delegitoj.

Ni ricevis viziton de S-ro Mackley, kiu organizos ekspozicion de tradukoj de la verkoj de la skota poeto Robert Burns, okaze de la 200-a datreveno de lia naskiĝo. La ekspozicio okazos venontan Januaron supozeble en "Mitchell Library" kaj enhavos tradukojn el multaj landoj kune kun tiuj en Esperanto. Li volas aĉeti Esperanto-Kantaron kaj ni petas la legataron de "Australian Esperantist", ke, se iu povus vendi tiun libron, tiu skribu al la Sidneja Societo.

La gimnazia grupo en Strathfield High School ankoraŭ progresas. Freŝdate foto-grafisto vizitis la gim-

nazon por oficiale fotografi ĉiun klason kaj grupon da sportistinoj, kaj nia Esperanto-Klubo estis fotografita kiel firme akceptita parto de la lerneja vivo. Tio estas rimarkinda, ĉar kutime Esperanto estas traktata kvazaŭ "malriĉa parenco" kaj estas ĝojige raportita ke en almenaŭ unu aŭstralia loko ĝi atingis la saman nivelon kiel "gravaj" aferoj kiel sporto. Ni sendis la foton al "Herald" kaj raporto ankaŭ troviĝas en la gimnazia gazeto "Kanjanka". Okaze de la "Vizita Tago" en la Eduka Semajno, nia grupo aranĝis Esperanto-ekspozicion, kiun vidis proks. mil personoj. En Septembro la grupo piknikis kun la gvidistino ĉe la bela loko Bundeena.

Ni sentas la mankon de taŭgaj plumamikoj. Ni ja skribas al gejunuloj en aliaj landoj, sed treege malofte ni ricevas respondojn.

MELBOURNE: La ĉiujara "Amerika Teo" okazis 13.8 kun granda sukceso. Multaj anoj ĉestis kaj alportis valorajn donacojn, kiuj tre rapide vendiĝis. Luksa keramikajo farita de s-ino E. McKenzie kaj tortoj faritaj de s-inoj Brown, Cohen, Koppel kaj Slade estis lotumitaj. Rezulte de tio ni faris profiton de £29, kiu estos egale dividita inter la klubkaso kaj la "Zamenhof Jubilea Fonduso".

Pri la "Vivo kaj verko de Jules Verne" parolis 20.8 s-ino F. Koppel. Ŝi montris ke ĉi-tiu franca geniulo anticipis inventaĵojn jardekojn antaŭ ol ili fakte estis inventitaj. S-ro J. Ryding montris belajn lumbildojn pri vojaĝo, kiun li faris tra Nova Gvineo. (27.8).

Per anonco en "Esperanto" ni invitis la tutmondan samideanaron al "Letervespero", kiu okazis 10/9. Alvenis amasoj da belaj poŝtkartoj, kaj ĉiu klubmembro ricevis kelkajn korespondantojn. Ni rekomendas tiuspecan programon al aliaj kluboj por montri al la anaro le vere universalan karakteron de nia movado.

Je Sept. 17, s-ro A. Fridenbergs donis siajn impresojn pri vojaĝo al la "Ora Bordo" de Aŭstralio (Surfer's Paradise) kaj pri vizito al la membroj de la Brisbana E-Societo, kiuj cetere promesis entuziasman

subtenon al la Zamenhof Jubilea Fonduso.

Belajn filmojn pri Svislando, kie li deĵoris dum 2 jaroj kiel aŭstralia ĉefkonsulo, montris 24/9 nia ĉiam bonvena kaj interesa preleganto, s-ro Ralph Harry. S-ro Ken Linton, nia populara gramatikisto, daŭrigis sian serion da prelegoj je 6.8 kaj 3.9 kaj s-ro H. Koppel regule raportis pri "Novajoj el Esperantujo".

En la aŭgusta kunveno de la "RENDEUVUO", s-ro Ken Linton parolis pri la poezia metriko. Li klarigis ĝiajn funkciojn kaj per multaj trafaj elĉerpajoj el la E-poemaro li montris la diversajn formojn. En Septembro, s-rino I. Fink parolis denove pri Maroko; ŝi priskribis viziton al Marrakech kaj skizis interesan bildon pri la popolo de tiu nordafrika lando.

Malbona novaĵo el Sydney

Dum proks. 25 jaroj la adreso 14 Ennis Rd., Milson's Point, estis tre konata kiel la adreso de la Sydney E-Societo. Ni prave fieris pri tiu bela hejmo. Ĝi aspektis firme bazita kiel la fama pontego mem, sub kies protekto ĝi troviĝis. Sed depost la fino de Septembro tiu adreso ne plu ekzistas. La registaro decidis forigi la tramvojon per motorvojo por aŭtomobilistoj. Tio necesigas grandan rekonstruadon kaj la parto en kiu troviĝas nia klubejo estos detruata.

La anonco venis subite kaj frapis nin kiel fulmotondro. La 6-an de Sept. okazis la lasta amuzvespero kaj ni nun serĉas alian klubejon. Portempe, la adreso de la Sydney E-Societo estas: 373 New Canterbury Road, Dulwich Hill, NSW.

Ni bedaŭras la perdon de nia famaejo. Ni pensas pri la karaj mortintoj kiuj laboris tie dum la pasintaj 25 jaroj, kaj ni ankaŭ scias ke niaj geamikoj en Aŭstralio kaj en aliaj landoj simpatios kun ni.

—Grace Barlow.

A.E.A. ĉe la 43-a Univ. Kongreso

S-ro J. Matasin, Vicprezidanto de la Sydney E-Societo, estis la oficiala reprezentanto de A.E.A. ĉe la 43-a Universala Kongreso en la malnova germana urbo Mainz.

La kongreson partoprenis 2,000 E-istoj el 40 landoj. Estro de la

kongreskomitato estis la ĉefurbestro de Mainz, s-ro Franz Stein, kiu estas aktiva E-isto kaj kiu persone salutis la ĉestantojn en Esperanto okaze de la Solena Malfermo.

S-ro J. Matasin alparolis la festkunvenon en la nomo de A.E.A. kaj li speciale invitis junajn gesanojn veni al la nova kreskanta kontinento Aŭstralio.

S-ro Matasin raportas ke oni filmis kaj sonregistris preskaŭ la tutan kongreson. Li klopodas aĉeti almenaŭ kelkajn sonregistraĵojn de la kongreso kaj kunportos ilin al Aŭstralio.

KATOLIKOJ.

El flugraporto ricevita 1 Sept.—Je la Katolika Diservo en la Katedralo en Mainz pli ol mil personoj alestis; almenaŭ duono estis kongresanoj. Predikis pastro L. Thalmaier pri Dio kaj nia atomepoko. Ĉe la Katolika fakunveno alestis Episkopo d-ro A. Stohr, al kiu oni donacis E-Biblion, lernlibron kaj vortaron. I.a. salutis lin D-ro Lapenna. Kun vigla intereso la episkopo sekvis la diskuton, tradukitan por li en la germanan. Konkludoj: E-o estu por la Katolikoj la Latino de la atomepoko. La Latina estas honorinda kiel internacia ĉiutaga lingvo por la tutmonda Katolikaro.

Ĉiu Katolika E-isto fariĝu membro de la Internacia Katolika Unuiĝo E-ista.

Estas konsilinde aliĝi al UEA, almenaŭ kiel abonanto de la Jarlibro.

Jen ŝajne la unua fojo, ke episkopo oficiale partoprenis Katolikan fakunvenon.—Dankon, pastro L.T., pro via raporto rekte al ni.—Red.

POR VIN DISTRI . . .

"(La gazeton "Semado") redaktis ne ni mem, sed niaj Majstroj: Jesuo Kristo, Allan Kardec kaj Zamenhof. Ĉu ĝi povus havi pli da aŭtoritato?" —"Semado", Brazilo.

"Nenion mi scias pri la tekniko de la versfarado. Eĉ hodiaŭ, 70-jara, mi ne scias kio estas jambo aŭ trokeo"—Robert Service (vidu: "Who's Who").

La Julia numero tute ne aperos . . . pro manko de materialo (pri la svisa E-a movado). Ni esperas, ke por la septembra numero materialo alfluos torente . . . (Red. Svisa Espero).

Mi ankoraŭ hodiaŭ estas partiano de la praktika neceso de internacia lingvo laŭ la modelo de Zamenhof kaj jam en 1905 en Parizo mi mem ekagis por defendi tiun ideon. Estis dum kunsido internacia de la sindikatoj . . . ankaŭ Jouhaux defendis la saman vidpunkton.—Cam. Huysmans, prez. de la Belga Cambro de Deputitoj.

PROF. MARIO PEI.

Rilate al la ĉefartikolo en la Maja-Junia n-ro, "A million thanks for the copy of The Australian Esperantist. It's unfortunate that newspapers quote people out of context, but your Australian friends evidently discounted the newspaper story. If my plan were put into operation the world language not only could be, but rather probably would be, Esperanto; at least that is the view that most of my Esperantist friends take . . . Cordially yours, Mario Pei."

(Milionon da dankoj pro la ekzemplero de la A.E. Estas malfeliĉe, ke ĵurnaloj mise citas homojn aparte for de la kunteksto, tamen viaj Aŭstraliaj amikoj evidente dubis la kredindecon de la raporto. Se mia plano efektiviĝus, la mondlingvo ne nur povus sed iom probable estus Esperanto; almenaŭ tiel opinias la pliparto de miaj Esperantistaj amikoj . . .)

ESPERANTO PRESS

R. Eichholz, of Oakville, Ontario, Canada, has an offset printer that is turning out some fine Esperanto work designed in the main for children of all ages. "Here are just the books that the children like!" says Heroldo de Esp. Judging by the copies received here, we should say the statement is sound. Some half-dozen have been issued, from the simple "Mia Frateto", designed for 2-5 year-olds to "Alko kaj Suna", 78 pages, by Verna Hills, rich indeed in fine pen drawings illustrating an

interesting text. All those of us working among young folk should contact this enterprise.

Other publications of this firm include a reprint of "The Life of Zamenhof" (E. Privat), 125 pp. It can be recommended. 0.70 dol. It stands alone as a means of introducing the outsider to the man and his work.

A perpetual calendar to the year 2013 is also obtainable. Full instructions are given in E-o.

Mr. Eichholz is agent for the U.E.A. tape-recording service. He asks that all E-ists possessing a magnetophone send him their recordings, if of interest and quality, in E-o or in a national language if this deals with E-o. They will be sent back after copying, or conserved by him in agreement. Recompense would be made for this service on sender's part. Your editor has folios on this matter at your disposal, but it were better to consult Mr. E. also.

A 60-page brochure on Unitarianism, compiled and translated by Eichholz, priced at 0.75 dol., is another publication. Its latitudinarian and non-dogmatic attitude will appeal to many having affinity with the similar basic ideas of Zamenhof with his "homaranismo". Unitarianism has produced some grand spirits, among them James Martineau. Spurgeon greatly admired the preaching of this outstanding man, though far apart in his belief, and highly praised Martineau's utterances from the pulpit. He was one day asked by a wondering friend: "How can you praise the preaching of a man whose teachings you do not believe?" to which he replied: "I do not believe them, but he does!" Sincerity ever impresses; one feels it in the speech of every honest man.

GOETHE.

Li estis la unusola ĉefranga poeto, kiu praktike sin okupis pri la scienco kaj pri la ĉia-voja serĉado al la vero. Lia pens-etendo estis vastega. Li aktivis en la kampoj drama, romana, lirika, vojaĝverka, aŭtobiografia, lingva, teologia, mistika, etika, filozofia,

artkritika, klasika, teatrodirekta, stat-administra, ekonomia, geologia, botanika, anatomia, biologia, legscienco, medicina, agronomia, hortikultura, kolor kaj lumscienco, mineralogia, psikologia kaj aliaj.

La plej universala animo inter la modernaj geniuloj li daŭre impresos — ne per sia arto, kiu kvazaŭ kaŝas la artiston, aŭ per siaj opinioj (1), foje kontestindaj — sed per sia plena, riĉa personeco. Lia vivo estis lia plej granda verko.

(1) Ekzemple, "Notre Dame de Paris (Hugo) estas la plej abomininda verko iam verkita".

RECENZE . . .

Kantoj por la Paco: Canko Murgin: eld. EXON, Landskrona, Sveden. 28 p. 2 resp. kup.

Tridek tri gaje optimismaj, incite agemigaj originaloj kaj tradukoj el la Bulgara kaj Rusa. Kelkaj temas pri la H-bombo kaj la militminaco. Preseraroj sin trudas, ankaŭ misuzo de vortoj: **ondo** ne povas **ruli**, nek **homo** agi **service**. "Dirigent'" ne estas E-a radiko. Pro ritmo troviĝas la korekta "venena" kaj la nekorekta "veneniga". Versemuloj, obeu la leĝojn de la lingvo; malobeo makulas vian verkon!

Parnasa Gvidlibro (p. 17) nomas "leonaj" rimojn inter partoj de la sama verso. Oni serĉus vane la vortarojn por tiu difno. Lingvo Stilo Formo (p. 110) donas "mez-rimo" . . . kiam la unua duono de verso rimas kun la dua:

Kaj se levas sin stelo, mi revas pri **l'helo**

Kiel la poetoj klasifus: Ekzistas emfazaj okazoj; al ĉiu li feste sugestas; ebria de ruza akuzo; embuske aŭ rekte li plektas . . . ?

COMELLA-BASSOLS.

Senor J. Comella, Vich, Spain, has given 2000 pesetas as Prize for a humorous story in Esperanto. Note: 2000-3000 words. Not to have appeared in press before. The winning work to appear in "Esperanto", the official organ of U.E.A. Copyright with author.

Type if possible. Four copies to address below. Use a pseudonym on the envelope; enclose real name,

address in another sealed envelope, to be opened after judging.

Subscription: 3 reply coupons (international), stamped on left side.

Closing date, 28 February, 1959. Send all to Senor Francesc Vila, Estoril 9, Barcelona.—G. C. Jervis, sec. Belartaj Konkursoj de U.E.A.

"PORT LINCOLN TIMES"

of 11/9/58 tells of a Japanese who used the Year Book of the Universal Esperanto Assn. to find a fitting address here to receive his report on finding a banded mutton bird cast up on the Japanese coast. The letter was sent to Mr. Fulop, our Canberra delegate for the Asscn.

(Thanks, Mrs. Hill.)

En la maja-junia numero de nia organo aperis la "kurt-rakonto" de s-ano P. E. Schwerin, kiu gajnis la unuan premion ĉe la literatura konkurso de la lasta kongreso. Jen la rakonto, kiu gajnis la 2-an premion:

PRESKAŬ MI GAJNIS LA MELBURNAN POKALON

Ne, fakte, mi ne estas superŝticia! Ne ĉe iomete! Sed mi kredas, ke lundo estas mia bonŝanca tago.

Tial mi tute ne estis surprizita, kiam ĝi okazis pasintan lundon. Estis proksimume je la deka matene. Mi glutis jus mian matenmanĝon—glason da citronosuko kun mielo kaj varma akvo (vi devas konsenti: tre ekonomia matenmanĝo, kaj aparte: ĝi tenas vin gracile!)—kiam mi aŭdis frapon je mia pordo. Kiu povus esti tiu? Je tia terure frua horo? Nu, la plej facila maniero eltrovi estas malfermi la pordon kaj rigardi.

Antaŭ mi staris du sinjoroj. Unu de ili demandis:

"Ĉu vi estas sinjoro Mueller-Sorau?" (Li prononcis mian nomon kvazaŭ havante acidan citronon en sia buŝo).

"Jes."

"Gratulon, sinjoro Mueller-Sorau. Ĉi tiun matenon vi gajnis la unuan premion en la loterio, dek du mil pundojn absolute!—Mi estas raportisto de la "Daily Evening Fable" (Ĉiutaga Vespera Fabelo) kaj mi ŝatus intervjui vin. Ĉu mi rajtas enveni?"

Do, kion mi faru? Mi estis devigata enlasi ilin, kvankam mi malaprobis intervjuojn, precipe tiel frue en la mateno.

La alia sinjoro, la fotografisto, fotografis min kelkfoje kaj dum li faris tion, mi havis iom da tempo pripensi, kion mi povus respondi al la venontaj demandoj. Tiam kaj tie subite grandioza ideo ekbrilis en mia menso. Kial ne fari grandan ŝercon? Kaj eltrovi, kiel stultaj povas fariĝi la homoj?

Tiam la unua demando venis.

"Nu, sinjoro Mueller, senkulpigu min nomintan vin tiamaniere, ĉar via dua nomo estas tiel malfacile prononcebla, ĉu tio estas via unua gajno? Ĉu vi estas tre surprizita?"

"Ne, estas mia dua gajno. Iam antaŭe mi gajnis dek pundojn. Sed mi ne estas surprizita, tute ne!"

"Kial ne?"

"Simple pro tio: ke mi sciis, ke mia havis gajnontan bileton. Mi sciis tion, kiam mi aĉetis vin vendredon antaŭ du semajnoj. Komprenu, mi vidis la numeron antaŭe. En sonĝo!"

"Vere? Mi petas vin, rakontu!"

"Ho, tie ne estas multe por rakonti. Iam matene, antaŭ kelkaj semajnoj, mi vekiĝis el strange sonĝo. Mi estis sur hipodromo kaj vidis la finon de kurado. Antaŭ ĉiuj aliaj ĉevaloj kuris purrasulo. Estis pentrita granda kvin - cifera numero blanka sur ĝia flanko. La homoj ĉirkaŭe estis tiel frenezaj, kriegante la nomon de la ĉevalo, aplaudante kaj plorante kun larmoj en la okuloj. La ĉevalo venkis facile. Tiam mi vekiĝis. Kuŝante tie mi konsideris la kuriozan sonĝon. "Imagu," mi diris al mi mem, "vi ŝongante pri kurado. Certe la plej neverŝajna afero por vi ŝongi pri tio!" Komprenu, sinjoroj, ke mi ne estas interesata pri ĉevalkurado kaj mi ĉe neniam vidis kuradon en mia vivo. Nur en filmoj. KREDU ĜIN AŬ NE. Tiel mi kuŝis en mia lito konsiderante ĝin kaj diris: "Ha, nur stulta sonĝo! Forgesu ĝin, Fritz!" Kaj mi forgesis ĝin!"

"Do, kio okazis poste?"

"Sekvontan vendredon mi iris al la loteria oficejo apude de Central Railway (Centra Stacidomo) kaj aĉetis

kelkajn biletojn, kiel mi faras ĝin kutime. Nu, imagu mian surprizon, kiam unu de la biletoj montris la saman numeron, kiun mi vidis pen-trita sur la ĉevalo. De tiu momento mi sciis, ke mia sonĝo estis pli ol sonĝo. Kaj jen vi estas!"

"Kion vi intencas fari per la mono?"

"Mi metos eĉ la lastan pencon sur la Melburnan pokalon!"

Nu, vi devus vidi iliajn mienojn. Tian respondon ili ne atendis.

"Pardonu min dirante tion, sinjoro Mueller, sed ĉu vi ne pensas, ke tia agado estas iom malprudenta?"

"Tute ne, mia amiko, ĉar mi scias, kiu estos la gajnonto!"

Tio ŝokis ilin.

"Kiel vi povas scii?"

"Tute facila. Vi forgesis, sinjoroj, ke mi havis ĉarman etan sonĝon, kiam mi vidis la gajnintan ĉevalon."

"Sed tio ne signifas necese, ke..."

"Nature, jes," mi interrompis, "ĉar vi devas scii, ke je la vendredo, kiam mi akiris la bonŝancan bileton kaj komprenis, ke ĝi ne estis sonĝo sed antaŭsigno, tiam unuafoje en mia vivo mi trarigardis la kuradan gvid-folion de via propra ĵurnalo. Mi estis scivolema vidi, ĉu fakte tia ĉevalo ekzistas. Jes, mi trovis ĝin, kaj ĝi estis aludita inter la esperoj por la Melburna Pokalo. Do, mi ne povas erari!"

Mi vidis, ke ili estis kaptitaj de la logaĵo.

"Ĉu vi rakontus al ni la nomon de la ĉevalo?"

"Kompreneble ne! Mi ne zorgas vetludi per mia propra mono, sed mi ne deziras respondeci pri tio de aliaj personoj. Kaj ne forgesu: estis nur sonĝo. Ĉio povus esti eraro!"

Tio estis sufiĉe por ili. Postulante kelkajn kutimajn demandojn rutinajn por plenigi la fonon, ili foriris rapide, ĉar vere, ĉi tie ili havis sensancian historion.

★ ★ ★

Estis ĝustatempe, ĉar mi bezonis mian tutan histrionan kapablecon daŭrigi seriozan fizionomion. Sed nun mi ekridegis kaj gratulis min pro posedo de sufiĉe da sprito elpensi improvize tian verŝajnan historion kaj rakonti ĝin kun rekta vizaĝo.

★ ★ ★

Kiam mi iris posttagmeze en la urbon, mi vidis ĉe la ĵurnalvendejoj mian bildon sur la unua folio de la ĵurnalo kaj la rubriko kriegis: "MEL-BURNA POKALO—VENKONTO KONATE DE SIDNEJA VIRO!"

★ ★ ★

Kaj sekvontan tagon reale komen-ĝiĝis amuzo.

Frue matene mi ricevis la unuan viziton de konata sidneja punter (ĉeval-kurad-vetanto). Mi sciis por kio li avidis. Li proponis al mi 30% de siaj gajnoj en la Melburna Pokalo, se mi dirus al li la nomon de la ĉevalo. Li juris per ĉio kio estas sankta, ke li tenus la nomon sekreta kaj ne malkaŝus ĝin al iu ajn alia. Mi povis kredi tion facile, ĉar mi neniam aŭdis lin menciita kiel esti dotata troe per filantropiaj inklinoj. Sed aplombe mi rifuzis lian proponon. Ĉar mi diris al li, ke mi ne povus vendi ian kurad-informadon. Tio estus verŝajne kontraŭleĝa kaj mi ne deziris ian ĉagrenon kun la leĝo.

"Ho, mi komprenas," li respondas, kaj li prenis el sia monujo kvin bankbiletojn da cent pundoj, "sed neniel estas kontraŭleĝa rakonti al mi vian sonĝon." Kaj li metis la biletojn sur la tablon.

Mi konsentis kaj rakontis al li mian sonĝon. Kion alian mi povus fari? Se li estas tiom interesita en sonĝoj, tio estas lia propra afero. Eble li kolektas sonĝojn, kiel aliaj homoj kolektas poŝtmarkojn aŭ ŝtrumpligilojn.

Kiam mi venis al la nomo de la ĉevalo kaj menciis "Fluganta Ostro" (mi prenis la nomon el kurada gvid-libro, ĉar ĝi sonis tiel freneza), li ekkriis:

"Sed tio estas neeble! Tiu ĉevalo neniam gajnis kuradon!"

"Vi povus esti tute prava," mi respondis neagitebla, "ĉar mi ne komprenas ion ajn pri kurado."

Almenaŭ li estis tute ĝoja, kiam li forlasis min.

Tiu ĉi malgranda sceno estis ripe-tita ĉiutage dum la sekvontaj sem-ajnoj. Mi ĉiam rakontanta la sonĝon kaj alia viro (aŭ virino) aŭskultanta kun granda intereso. Vere, estas

mirige, kiom da songkolektantoj ekzistas en Sidnejo. Sed ne nur en Sidnejo, mi ricevis vizitantojn de preskaŭ ĉiu pli granda loko de Aŭstralio.

Kaj ĉiutage mi devis fari ekskurson al banko deponi la biletojn, kiujn miaj vizitantoj forgesis remeti en siajn poŝojn.

Estis la plej riĉiga 'songo' kiun mi iam 'songis'.

★ ★ ★

Kiam la tago de la Melburna Pokalo alproksimiĝis, mi fariĝis iomete maltrankvile, ĉar oni neniam scias, kiel homoj reagos. Ili povas esti tiom senkonsideraj.

Kompreneble, mi ne vetis uĝu pordon je tiu ĉevalo. La nomo mem estis sufiĉe por fari min malsana, eĉ malpli veti kun mono je tia ĉevalaĉo. Aparte, le nura vera parto de mia song-historio, kion mi rakontis al la raportisto estis tio, ke mi neniam vidis ĉeval-kuradon. Do, kial malspari mian bonan monon?

Fine la tago alvenis. Kontraŭ mia pli bona juĝo mi estis tenegata de la komuna kurada febro, kaj tial mi estis alĝuiĝinta al la radio-ricevilo.

La ĉevaloj kun iliaj jokeoj liniĝis. La kurado komenciĝis kaj finiĝis. Kaj la venkanto? Vi divenis: "Fluganta Ostro."

Vi devus vidi mian vizaĝon!

—Fritz Mueller-Sorau (Sydney).

REGO VENCESLAO.

"La Rondo", Dec. 1956.

Tiu estis Ĉeĥa princo (Ĉeĥe: Vac-lav), la tria Kristana regnestro en Bohemio antaŭ mil jaroj. Tre erudita homo, li ardege favoris la novan kredon de la Kristanismo, ĝin apostolante inter siaj samgentanoj. Li fidele strebis praktiki la Kristanajn idealojn en sia vivo. Lia pli juna frato Boleslav igis lin murdi la 28an de Septembro en 929j, kaj mem okupis la tronon. La popolo amare priploris la junan princon, adorante lin kiel sanktan martiron. Baldaŭ post lia morto estis verkataj legendoj pri lia sankteco kaj mirakloj. Unu el ili rakontas, ke princo Venceslao kun sia servisto Podivan portis lig-

non kaj mangaĵojn al malriĉuloj. Estis vintro. kaj Podivan tremis de frosto. La princo instigis, ke li paŝante, metu la piedojn en liajn spur-ojn. La servisto obeis kaj li ĉesis senti la malvarmon. Tiu legendo transportiĝis eksterlanden kaj vivas hodiaŭ inter la Anglosaksoj kiel popola kanto pri la bona reĝo Venceslao.—Por The A.E. sendis speciale T. Pumphr, Praha.

(La Encyclopedia Britannica nomas lin WENZEL (la Sankta). Laŭ ĝi li estis murdita en 935 kaj poste sanktigitita de la Roma Eklezio.—Red.)

POLAND.—The Union of E-ists in Poland has 32 branches with total of 6,000 members. Courses, inc. correspondence, are being taken by 1,200 students, and circles exist in schools, factories, army units, &c. In 1957, 30,000 textbooks in E-o were sold; a Polish-Esp. dictionary and an anthology of Polish literature in E. translation are being prepared. E-o is used for mediating the translation of Polish works into Chinese and Japanese.

AGO DE LA TERO

Ni supozu, ke iu kronikis la historion de la tero depost ĝia kreo. Tio postulu kvar-kvincent paĝojn, po kvin milionoj da jaroj por ĉiu paĝo.

Per nur la finaj ok linioj la kronikanto povus resumi la historion de la tempo dum kiu la homoj ekzistis sur la tero, kaj la tuto de la Kristana erao ricevus, proporcie je sia tempodaŭro, nur unu literon.

Lau la astronomia scienco, oni povas konjekti, ke kiam estos eble, verki 500 volumojn pri la terhistorio, kondiĉoj ne grande diferencos de la nunaj. — H. Spencer: "Mondoj sen Fino".

Sydney Esp. Society will meet at 333 George-street, Room 209, near Wynyard. Monthly social at Ingersoll Hall, Crown-st., Darlinghurst.

The Australian Esperantist

("La Rondo")

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15ŝ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5ŝ.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.
Adreso de A.E.A.—Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.
Kasisto: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

N-ro 6 (86)

MELBURNO.

Novembro, 1958

"RETORIKO" — By Dr. Ivo Lapenna

294 pages; bound 27/6 Australian; unbound 22/6. Through the author, 77
Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, or our agents.

"In few literatures could we find a book so scientifically compiled, so readily
usable, so profitable to one's thinking, as this work."—Prof. G. Waringhien.

A few born orators there may be
for whom:

All a rhetorician's rules

But teach him how to name his
tools—

but the lips of most aspirants have
been but doubtfully touched by a
"live coal from off the altar."

This book, like the Parnasa Gvid-
libro, does not promise to bestow
genius; it explains the techniques of
the popular tribune, control of which
gives confidence to any speaker who
wishes to say something relevant,
and it examines, with a vitality that
imparts something of the inspiration
of the author, the emotional, mental
and moral factors in effective oratory.

With high academic honors, and the
deserved reputation of a superlative
master of the spoken word, Dr.
Lapenna is fully accredited to the
elaborate task he has so ably ful-
filled in this detailed and expressive
work.

This second edition is both a re-
vision and an expansion of the first.
The notes, for example, number 123
in the second as against 67 in the
first, and the earlier text has been
corrected or amended where found
advisable to do so.

A review to appear later.

PRI AŬSTRALIO

La loĝantaro nombras preskaŭ dek
milionoj—tri milionoj pli ol antaŭ la
milito. Ĝi kreskas po pli ol 200,000
jare; povas esti, ke la loĝantaro en-
tute duobliĝos jam ĝis 1958j.

Fakuloj malsame opinias pri la
efektive taŭga nombro, kiun la lando
povus ekonomie vivteni. Iuj diras:
20-30 milionoj; aliaj, 70, ankoraŭ
aliaj—virtuale senlima nombro. La
scienco fine decidis tion. Eble freŝa
akvo, atome distilita el marakvo, iri-
gacios la sekan internlandon. Man-
kas al Aŭstralio sufiĉe da akvo, kaj
tute mankas petrolo.

Triono de la lando estas seka de-
zerto—simile al la Saharo. Ankoraŭ
triono taŭgas nur por maldensa
homokupado. Iuj homoj komparas
Usonon kun Aŭstralio, riproĉe al ni.
Usono estas preskaŭ samampleksa
kiel Aŭstralio, kaj 170-milione hom-
hava. Al Aŭstralio tamen mankas la
grandegaj naturaj riĉoj de Usono.
Pliĝuste, plijuste oni komparas nin
kun Kanado, kiu havas nur 17 milion-
ojn da homoj. La "glacia nordo"
Kanada ekonomie ekvilibras la "mor-
tan koron" de Aŭstralio.

Ses mil Aziaj studentoj estas nun
instruataj en Aŭstralio.

1,200,000 Aŭstralianoj enspezas pli ol £1000 ĉiujare.

Nur Usono, 187; Kanado, 138; Svisujo, 106, kaj Novzelando, 105, havas pli altan pokapan produktipovon, do vivnivelon, ol Aŭstralio, 100.—"Facts".

ON THE MARCH.

At the European Conference of Baptists in Berlin, July, 1958, an Esp-o meeting took place with delegates from 7 lands.

In 1957 over 14,000 people took part in 89 international congresses in 25 countries. Esperanto was the only official language.

18,325 articles and items about Esp-o appeared in 29 lands; 194 Esp-o exhibitions were visited by 957,180 people, 2367 radio lectures were given on Esp-o, and 251,000 pamphlets were distributed. These statistics do not include Poland, Czechoslovakia, Greece and a few Asian and South American countries, nor countries where Esp-o is discriminated against, as Portugal and East Germany. Vigorous activity is shown by Brazil and Italy.

"Once across the Oder bridge and into the Polish frontier the atmosphere changed. They laughed and talked at us in Greek, German, ESPERANTO, Russian, EVEN a little English." (Chris. Bradshaw, The Observer, 29/6.)

"MIRO" (Magia Internacia Rondo) magicians' gazette, uses Esp-o in its overseas relations. M. Walter, Snetdorstr. 1, Unterlness, Germany.

Useful booklets in Esp-o, "Advice to Amateurs", "Exposition Tables", by Gavaert Ltd., 27 Gt. Western Rd., Brentford, Middlesex. Ask at your local photographic store.

PARLETS.

"Kredu Min, Sinjorino" (Believe Me, Madam), Cesar Rossetti's original Esperanto work, has sold 15,000 copies, almost the whole edition, 3 weeks after appearance in its Hungarian translation.

"Pollando" gazette says a special Esperanto stamp will be issued for the Zamenhof Jubilee Year.

MI KAJ LA MALAMIKO

Ĉi-tiu rakonto ricevis la 3-an premion ĉe la literatura konkurso de la lasta aŭstralia E-kongreso.

Ne kredu, mi petas, ke mi malamas fotistojn. Mi trovis inter ili homojn tre respektindajn, eĉ simpatiajn. Ankaŭ la fotantojn — tiujn fervorajn amatorojn kiuj superŝutas min per fotoj pri siaj senkomparaj idoj aŭ sia mirinda vojaĝo enlanden aŭ eksterlanden — eĉ tiujn mi entute ne malamas. Ĉar ankaŭ mi volonte montras bildojn pri miaj senkomparaj, dok-kaj espereble baldaŭ povos montri pri mia mirinda vojaĝo.

Mi ne malestimas la plezurojn de la familia fotoalbumo. Jen Avinjo, ĉarma modestulino en krinolinĝobo. Jen Avinjo denove, nun feste vestita por sia edziniĝo, sed mankas la ĉarmo de la pli frua portreto, ĉar estas evidente ke Avinjo furiozas. Mi rapidas diri, ke ŝi furiozas, ne kontraŭ Avo, kiu restis ŝia amata vivkunulo dum pli ol 50 jaroj, sed kontraŭ la fotisto, kiu longe atendigis ŝin. Sur aliaj paĝoj estas portretoj pri iu ne-rekonebla knabeto — mia patrino en sia infanaĝo; la edziĝa portreto de niaj gepatroj — du serenaj, gravmienaj homoj sur la sojlo de nova vivĉapitro; kaj jen bildo pri velure vestita knabo kun grandaj malhelaj okuloj kaj longaj, buklitaj haroj — mia plej aĝa frato. Lian talion ĉirkaŭas larĝa blankeca zono kiu ŝajnas kunfandiĝi kun malgranda blanka tablo apud kiu li staras, tiel ke alia frato malrespekte titolis la foton "Ludoviko ligita al lavtablo", kaj per tiu nomo oni ankoraŭ aludas ĝin en mia familio. Sekvas ankoraŭ multaj fotoj pri miaj 5 gefratoj, kaj fine komuna portreto de ĉiuj familianoj. Jen mia patrino en nekredible sekeca robo kaj absurda, pelvsimila ĉapelo — modoj kiuj kun kelkaj modifoj estas denove aktualaj. Flanke de mia patrino sidas Paĉjo, kun mieno digne respondeca, kiel ja decas al familiestro. Ĉirkaŭ la paro grupiĝas 4 diversgradaj knaboj kaj unu longhara knabino. Ho, sed estas ankoraŭ iu alia, kiun oni emas pretervidi. Sur la genuoj de la patrino kuŝas malgranda bebo, buleca estajeto al kiu mankas trajtoj kaj individueco. Jam

sufiĉe! Tiu estas mi! Permesu ke mi fermu la albumon!

Cu vi iam legis la vortojn de Szilagy pri la objektoj en lia kabineto? Li diras: "Ni estas multaj en tiu ĉi eta ĉambro. Multaj vivantoj, multaj voloĵoj, kiujn mi devas agnoski. Libroj, objektoj, mebloj. Ili vivas, ili povas esti kapricaj, ili povas ĝoji, melankolii, grumbli, ŝerci, artifiĉi, petoli. Ili havas karakteron. Kelkaj el ili estas rekte malbonvolaj."

"Kelkaj el ili estas rekte malbonvolaj." Ja jes! Fotilo, malgraŭ tio, ke ĝi eble tute senkulpe kondukis dum la tuta ĝisnuna vivo, tuj kiam ĝi direktiĝas al mi, fariĝas absolute malica. La tuta raso de fotiloj estas nepacigeblaj malamikoj de mia memfido.

Denove mi petas ke vi ne miskomprenu min. Ĉiujn pretendojn pri belecoj, korpaj au lingvostilaj (se ili iam vivetis en la menso) mi rezignis, jam de longe. Mi ne plendas ĉar la fotilo montras min nebela, aŭ eĉ rekte malbela, sed ĉar ĝi faras min absurda kaj iel nehoma. Se efektive mi estas tia, mi preferus ne veni vidalvide kun pruvoj pri tio.

Dolore mi prezentas la atestajojn. Jen mi, 12-jarulo en kolumbina kostumo okaze de lerneja prezentado. Memkontento estas evidenta sur mia idiotece rikana vizaĝo, sed sola rigardo al miaj longegaj ostecaj kruroj sufiĉas, ke oni konvulsias pro ridado. Kaj jen foto kiu estas memoraĵo pri solena evento—mia konfirmiĝo. La grupo de konfirmitoj estas iom granda. Por ke ĉiuj estu videblaj iuj genuas sur la razeno en la antaŭo. Mi estas inter ili. En mia junaĝo knabino 13-jara ŝatis pensi sin jam fraŭlino kaj ne plu maldigna bubino, sed jen mi estas. La blanka vualo sidas oblikve, kaj ho ve! La genuoj estas trude videblaj sub la blanka robo. Tamen, la ĉiama rikano ne mankas.

Kiam mi iĝis plenaĝa kaj jam urbano, mi ne malofte fotiĝis surstrate. Nur, mi konas homojn kiuj fieras—kaj eĉ prave fieras pri strat-portretoj de si men. Sed ne mi. Aŭ miaj vestoj aspektas kiel se mi dormis sur ili, aŭ miaj manoj gestas ridiĝe, aŭ eĉ pli verŝajne mia vizaĝo aspektas iel monstra. Mi nun evitas fotiĝi surstrate.

Antaŭ pluraj jaroj la Rendevuo-

klubo organizis ĉiujaran literaturan konkurson—nun bedaŭrinde mortinta. Okazis (supozeble ĉar neniu alia partoprenis) ke mi foje gajnis la premion. Samideano, kiu volis profeti la okazon per propagandaj celoj, informis gazeton en nia urbo ke mi jus venkis en tutlanda konkurso pri esperanta "novel". Nu, la esperanta vorto "novelo" kaj la angla vorto "novel" iom draste diferencas laŭ signifo, kaj rezultis ke la gazetuloj decidis ke la afero meritas ne nur raporteton, sed ankaŭ portreton. Do juna kaj bela inkvizitorino invadis mian laborejon. Kiam frontas min raportisto kun notlibro kaj kraĵono mi pensas pri frazo el iu detektivromano "kaj memoru ke ĉiu vorto kiun vi diras estos enskribita kaj uzata kiel atestaĵo kontraŭ vi." Do mi estis jam en kompatinda stato kiam, kvaronhoron poste alvenis fotisto. Sed li estis tre ĉarma junulo, kaj pro tio ke la raportisto jam malaperis kaj miaj du maturaĝaj kolegoj forestis, mi eĉ ĝuis lian viziton. Li demandis kiomjara mi estas kaj komentis ke tia estas tre fierinda sukceso por junulino. Sajnis stulte, detruu tian korvarmigan komplimenton per malkaŝo de la vero, do mi simple ruĝiĝis modeste.

Sekvis streĉa atendado kelktaga. La intervjuo ne aperis en la ĵurnalo. Fine venis tago kiam ĝi efektive aperis. La raporto mem estis sufiĉe animskua (he ve! Tiajn stultajojn mi nepre ne diris!) Sed ankoraŭ post jardeko doloras al mi eĉ pensi pri la ŝoko de la portreto. Iu spiritulo diris: "Mi sciiis ke estas vi, ĉar mi rekonis la vestojn!" Taktulo murmuris, "Via verda stelo trafis elstaras!" Miaj kolegoj konsentis ke ilia skribtablo (ĉe kiu mi fotiĝis ĉar ĝi pli imponis ol mia) tre klare bildiĝis.

La espero ĉiam fontas en la homa koro. Mi fine iris timtreme, sed ne malespere, en la luksan salonon de Boris, konata portretisto de nia urbo. Iuj fotistoj petas ke mi demetu la okulvitrojn. Tia propono teruras min, ĉar sen okulvitroj mi estas kvazaŭ nuda kaj sendefenda. Feliĉe Boris ne faris tian sugeston. Li simple demandis, kial mi timas, kaj ĉu mi kutime kombas la harojn tiele.

La unua rigardo al la provajoj

preskaŭ tute trompis la esperojn kiujn generis la imponaj portretoj en la akceptejo de Boris. Sendube marmalsanulo pli allogas aspektus. Sed ho, estis escepto! Unu bildo tre plaĉis al mi. Ĝi prezentis virinon sen rideto, sed kun mieno kiu elmontris grandan dignon kaj ian noblan fieron, Jen, fine la malamiko min indulgis! Mi estis tre kontenta.

Goje mi montris la provajojn al miaj geamikoj. Jes, tre bone, ili konsentis — sed preskaŭ senescepte preferis la por mi plej malplaĉan pozon! Mi ekkoleris pri ilia stulteco. "Kompreneble mi elektos la seriozan pozon," mi diris iom acide. "Tiu?" oni ekkriis, "sed tia vi neniam aspektas!" La opinio de preskaŭ ĉiu al kiu mi montris la bildojn emfaze malfavoris mian preferaton. Do, dolore mi cedis kaj mendis la abomenaĵon kiun ili laŭdis. Feliĉe la ekzemplero kiun mi donis al la viro kiu poste fariĝis mia edzo nun vegetas en la mallumo de alta ŝranko kie mi ne povas rigardi ĝin. Espereble ĝi plaĉas al la lepisimoj!

De tiam mi kiom eble evitis la malamikon. Sed estas unu okazo en la vivo kiam fuĝi de la fotisto estas preskaŭ neeble—kiam oni edziniĝas. Sufiĉas diri ke la malamiko splene triumfis ĉe nia geedziĝo. Li tamen ne estis sen artismo. Sian plej diablantan baton li rezervis ĝis la fino.

Inter la edziĝa solenaĵo kaj la festeno la fotisto malaperis por deĵori ĉe alia edziĝo, antaŭe klarigante ke li nepre deziras bildigi la tranĉadon de la edziĝa kuko.

Lia reveno ne okazis laŭ plano. Ni atendadis, sed ĉar ni devis baldaŭ trafi trajnon ni fine ne plu povis prokrasti la ceremonion de la kuko. Ĝi estis jam preskaŭ duone formangiĝinta kiam la fotisto revenis. Pardonpete li klarigis al ni kiuj mem estis jam pretaj foriri, ke lia aŭtomobilo karambolis kun tramo survoje. Feliĉe neniu vundiĝis, sed oni devis raportari al la polico, kio okupis iom multe da tempo. Febre li enmanigis al mi la tranĉilon kaj ŝovis min kaj la edzon al la kuko. "Pssst!" mi siblis al la edzo. "Rigardu la fotiston, ne la kukon!" Guste tiun momenton la malamiko eternigis. En la foto kiu rezultis mia edzo rigardas la kukon, mi oblikve rigardas la ed-

zon, kaj kune ni atakas festkukon kies malorda, tranĉe difektita flanko rikanas al la rigardanto.

Jes, mi timas fotilon preskaŭ samgrade kiel mi timas kuracistojn. Same kiel kuracisto, ĝi disponas pri diabla povo—la povo prezenti la veron sub formo nepre neplaĉa, sed malfacile refutebla. Ĉiuj potencoj min gardu kontraŭ la malamiko.

—Ruth McGrath, Perth.

Australia Kroniko

● **PERTH:** Monataj kunvenoj ĉe la nova, pli centra lokita sidejo de la Ligo (9 Barrack-st.) altiras pli multnombrajn ĉeeston.

S-ino H. Claxton (10/7) informis nin pri "Mirindaĵoj de Aŭstralio", konigante al ni multajn interesajn faktojn pri nia hejmlando. S-ino R. McGrath (14/8) facilanime rakontis pri "Vizito Al Ballarat". Kelkaj klubanoj (F-inoj Woolley kaj McGeehan, S-roj Brodie, Hawks kaj McGrath) partoprenis en la laŭtleĝo de amuza teatraĵo. (Sept. 11) F-ino A. Longson (9/10) parolis pri "Hiroshima", la atombombita urbo, kaj ŝiaj impresoj dum kelkhora vizito.

Mallonga antaŭanonco de S-ino R. Hutchison, M.L.C., ke ŝi parolos pri Esperanto en la Parlamentejo (19/8) ebligis al kelkaj anoj ĉeesti dum tiu historia okazo. Krom informi pri diversaj atingajoj de la internacia lingvo, ŝi laŭtleĝis du valorajn artikolojn el "La Rondo" pri Esperanto en la lernejo. Klubanoj profitis la okazon ankaŭ iom esplori la parlamentejon. Post la kunsido oni noktomanĝetis kiel gastoj de nia eminenta samideanino.

Pro ŝia lastatempa okupateco, nia klubo perdis (nur dumtempe, ni esperas) la valoregan servon de nia sekr-ino, S-ino A. Sedgley. Frapis ŝin ankaŭ malsano, post kiu ŝi nun, feliĉe, refortiĝas.

Ce speciala kunveno de la Ligo (23/10) S-ino Pollard elektigis kiel sekretario kaj F-ino Longson kiel kasisto de la loka komitato por la Zamenhof-Jaro. Pluraj anoj jam kontribuis aŭ monsumon, aŭ monpromeson, al la fonduso.—R.McG.

● **CANBERRA:** La septembra kunveno de la klubo okazis en la hejmo de Ges-roj H. Torr. Oni pridiskutis la proponon krei "Esper-

anto-Domon" kaj decidis subteni ĝin. Tamen, pro manko de detaloj, la formo de la subteno ne estis ankoraŭ decidita.

Je la fino de Septembro S-ano Ralph Harry vizitis Kanberon, sed ĉar ne estis la semajno de la klubkunveno ne multaj anoj havis la oportunon renkonti lin. Okazis anstataŭe malgranda kaj ne-formala batalado en la domo de Ges-roj H. Torr.

La oktobran kunvenon organizis F-ino Blumer en "Reid House", kie ŝi loĝas. Post la pli seriozaj aferoj, la ĉeestantoj partoprenis kelkajn ludojn.—H. Torr.

● **MELBOURNE:** Ni daŭrigis nian kutiman dueran programon ankaŭ dum oktobro. Je 1-a Okt. s-ro H. Koppel donis raporton pri la ĉi-jara U.E.A.-kongreso en Mainz. Tiu prelego estis bazita sur aerpoŝtaj raportoj de la ĉi-jara A.E.A.-Delegito al Mainz, s-ano J. Matasin (Sydney). Sekvis S-ino E. Hill, kiu priskribis libron kiun ŝi legis kaj inter la diversaj interesaj informoj ŝi rakontis pri hinda okulkracisto, kiu operacias grandamase kataraktojn en tendoj.

S-ro H. M. Cohen, 8.10, faris treege interesan prelegon pri Lobengula, la reĝo de la Matabela tribo en Suda Afriko. Lobengula estis samtempulo de Cecil Rhodes, kaj li kapablis amasigi grandajn riĉaĵojn dum sia vivtempo.

Je 15-a Okt. s-ro H. Koppel prezentis sonbendon kun la voĉo de la Ĉefurbestro de Mainz, nia s-ano Franz Stein, kiu estis la ĉi-jara prezidanto de la Univ. Kongreso. Sekvis s-ro Stan Milligan kun tre interesa parolado pri la historio kaj nuna stato de Skolta E-ista Ligo, kies aŭstralia reprezentanto li estas. Li prezentis sonbendojn kun la voĉoj de aŭstraliaj birdoj kaj kun kantoj de aŭstraliaj skoltoj. Tiujn sonbendojn Stan sendos al transmaraj skoltofratoj, kiuj recipokos kun sonbendoj pri ilia movado. S-ro E. McKenzie, 22.10, parolis pri Astronomio kaj la nun tre aktuala temo de vojaĝo tra la spaco per raketoj. Vigla diskutado montris ke la anaro interesiĝis pri ĉi-tiu temo. Samvespere, ni denove praktikis la kantadon de Esperanto-kantoj.

● **BRISBANE:** En la komenco de Julio la delegito ricevis viziton de S-ro K. Gunster, Germano kiu venis Aŭstralien el Persujo kie li laboris ĉe oleo-kompanio. S-ro Gunster aliĝis al la Societo kaj estas tre entuziasma ano de nia grupo, kaj tre interesas la anojn per rakontoj pri Persujo, kaj aliaj lokoj kie li pasigis kelke da tempo.

Ankaŭ en Julio nia Aŭstria s-ano Josef Matzner travivis, sed apenaŭ ne, gravan akcidenton pro kiu li kuŝas en hospitalo jam tri monatojn kaj devos resti en la lito pluajn semajnojn. Li suferis trilokan rompiĝon al la kruro, kaj la patelo serioze difektigis. La manon li ankaŭ rompis al si. Rompitaj okulvitroj ankaŭ estis plua granda ĝeno al li. Ĉiuj esprimas bedaŭrojn pro lia malfeliĉo, kaj deziras baldaŭan resaniĝon por li.

En Aŭgusto alvenis en Brisbano. S-ro B. Anderson. Li estas Anglo, kiu venis Aŭstralien el Nov-Zelando, kie li pasigis kelke da tempo. S-ro Anderson multe vojaĝis, kaj pasigis trimonatojn en monaĥejo en Cejlono, pri kiu loko li tre interese rakontas al la anoj ĉi tie. Li ankaŭ vizitis Thailand, kaj ĉe la kunvenejoj liaj priskriboj pri tiuj landoj donas grandan plezuron al la ĉeestantoj.

En Septembro la anoj de la Societo venis al la hejmo de la delegito de U.E.A. por saluti D-ron Fridenbergs, kiu pasigis tri tagojn en Brisbano. D-ro Fridenbergs alparolis la ĉe estantojn pri la Zamenhofa Jubileo, kaj ricevis certigon de nepra helpo de la anoj ĉi tie.

Ni bedaŭras raportoj ke nia s-ano Majoro S. H. Beck devis eniri la armeo-hospitalon ĉe Greenslopes, kaj antaŭ unu semajno devis submeti sin al tre grava operacio. La plej aktuala novaĵo sciigas ke li malrapide resaniĝas. Ni ĉiuj sendas salutojn al li, kaj malpacience atendas lian revenon inter ni.

ADELAIDE: Nenia raporto.

IS YOUR CLUB A SECRET SOCIETY?

State reporters, don't fall down on your job. Send in to us regular reports of your club activities, clearly written and double spaced of typed. Verify spelling of all names and initials. If your club has no re-

port in each issue of the gazette, you are turning your organisation into a secret society!

Mail all reports to Box 2122T, P.O., Elizabeth St., Melbourne.

SPECIAL ISSUE OF "AUSTRALIAN ESPERANTIST"

As one of its projects for the Zamenhof Centenary, A.E.A. will publish a special issue of "Australian Esperantist", commemorating the life and work of Dr. Zamenhof. This issue will have 20 pages and—as the purpose is to inform the general public about Zamenhof and Esperanto—will be written completely in English.

This special issue will be published early in 1959, so that copies may be available throughout the year for distribution to non-Esperantist contributors to the Zamenhof Fund, by lecturers and generally to interest the public during the Centenary.

A first printing of 3,000 copies has been made possible by the generous offer of the President of A.E.A. (Dr. Fred Williams) to purchase 1,000 copies for his personal information activities. After free distribution to A.E.A. members and to contributors or potential contributors to the appeal, the remaining stock will be available for purchase by clubs and individual members. Price per copy will be 1/-. It is hoped that every Esperanto Club in Australia will purchase at least 100 copies!

To avoid disappointment, orders should be sent to A.E.A. (Box 2122T, Elizabeth St. P.O.) not later than 31st December, 1958.

We hope to make the special issue a publication which will not only be a fitting tribute to Dr. Zamenhof but also a useful means of bringing his work, and the possibilities of Esperanto, to the attention of a wide section of the public. We are sure that all members will co-operate in achieving this objective.

Prof. Marcus Oliphant—Patrono de nia Zamenhof-Kampanjo.

La mond fama atomfizikisto Prof. Marcus Oliphant akceptis la inviton de s-ano Ralph Harry fariĝi Patrono de nia Zamenhof-Kampanjo. Jen granda honoro kaj kuraĝiga gesto, kiuj devus instigi ĉiun Esperantiston

en Aŭstralio fari sian plej eblon por ke la ĉefa celo de nia kampanjo—starigo de Zamenhof-Domo—efektiviĝu!

Dum la lasta monato alvenis devove donacoj al la Zamenhof-Fond-
2-a Listo de Kontribuoj:

F-ino A. Paling (Melb.) ..	£10
S-ro A. L. Brentwood (Melb.)	£10
"Anonime"—Sud-Aŭstralio ..	£5
S-ino J. M. Slade (Melb.) ..	£5
Melb. E-Club (2-a pago) ..	£15
S-ro Ch. Lee (Aŭstralio Dip- lomato, Wellington, N.Z.) ..	£3/3/-
S-ro L. N. M. Newell (Adelaide)	£3
Kapitano N. E. Farrell (Melb.)	£1/1/-
S-ro S. M. Bishop (Melb.) ..	£1
S-ino Ryding (Melb.), vendo de floroj	£1/1/-
Leter-Vespero (Melbourne) ..	18/-

Sumo £55/3/-

Sumo jam anoncita .. £362/10/-

Gisnuna Sumo £417/13/-

ZAMENHOF — FESTO

Melbourne

Sabate, 13-a Dec., 1958,
8-a p.t.m.

Caris Club Rooms

McEwan House

4-a Etaĝo

343 Lit. Collins St.

GIVE BOOKS FOR CHRISTMAS

Fulcher & Long (Eng./Esp.
Dict.), 18/-.

Millidge (Esp./Eng. Dict.),
19/3.

Plena Vortaro de Esperanto,
31/7.

Tempo-maŝino (H. G. Wells),
3/4.

Knaboj de Paulo Strato (F.
Molnar), 3/4.

Alaska Stafeto (F. Omelka),
8/3.

Komuna Kantlibro (Holmes),
3/4.

Vagado sub palmoj (J. Ribil-
lard), 6/11.

Buy books in Melbourne
from Mrs. S. Milligan, 274

Mont Albert Rd., Surrey Hills; in **Sydney**, Miss Edna Dash, 26 Edgeware Rd., Enmore, N.S.W.; in **Canberra**, Mr. S. Fulop, 26 Bundeela St., Narrabundah, A.C.T.; in **Brisbane**, Mr. G. A. Grant, 6 Mikado St., Hamilton, Brisbane; in **Adelaide**, Miss W. Addis, 25 Greville Ave., Flinders Park; in **Perth**, Mrs. R. McGrath, 41 Reynolds Rd., Mt. Pleasant, W.A.; in **Hobart**, Mr. M. Leeereveld, 41 New Town Rd., Hobart.

WILLIAM BARNES

la poeto-filologo de Dorset, Anglujo, estis pioniro en la kampog de la interlingvistiko. En 1840 li eldonigis "Enketo pri la leĝoj de la kazoj en la lingvo; unua paŝo al sistemo de universala gramatiko". Li poste detaile grandigis ĝin en "Filologia Gramatiko . . . formita laŭ komparado de pli ol 60 lingvoj" (1854).

En "William Barnes of Dorset" (Giles Dugdale, 1953) oni legas, ke "li intencis kompili universalan gramatikon formitan laŭ studo de la aĵoj komunaj por ĉiuj konataj lingvoj". Tiun entreprenon li fine plenumis per eldono de la supremenciita "Philological Grammar".

RECENZE.

Ĉe Doktoro: D-ro Ante Grgurina, originalo Esperanta. 60 p. Prezo 12 steloj. Eld. Serbia E-Ligo, Terazije 42, Beograd, Jugoslavio.

Vaste aĉetiĝas rememorverkoj de kuracistoj, inter ili George Sava, Richard Gordon, H. Sutherland. Ĉiverko de D-ro G. favore kompariĝas kun multo en la nomitaj. Jam de longe mi ne tiel ĝue legis libron en E-o. Ĉiuj 31 rakontoj, pro sia suka anekdoteco kaj kristalklara esprimopovo, indas la verkadon. Kelkaj el ili, aparte amuzaj, bonege servus por klubdeklamo.

E-isto dum 30 jaroj, D-ro G. vere majstras la lingvon. Per simple trafa stilo kaj frazarango li infekte strebigos ĉiun leganton al simila virtuozeo. Lia postmorta heredaĵo al siaj samcelantoj meritas vendiĝi ne en 2000 ekz. sed en 200,000. Ni senrezerve ĝin rekomendas.

HOLIDAYS ABROAD.

"My morning post includes letters and cards from diverse places—Belgium, the Isle of Wight, Italy, Israel—all from members of youth holiday groups I have arranged. The messages are always much the same—comments on the weather, the food, the country, and the good time being had by all. Holidays abroad are a step in the right direction, for there can be no better way to understanding and tolerance, to international peace and—wretched phrase—peaceful co-existence, than to go and see, instead of to stay at home and talk about 'them foreigners'."

Thus Mr. S. Bunt in "Hackney Gazette" (25/8). We suggest a better way than "go and see", namely, "to go and speak with" foreigners. Surely Mr. Bunt must realise that the reason his correspondence mentions little beyond food and weather is that the writers have simply nothing to report? Without intimate contact with the people of a country they are nothing but sightseers. From any true insight into the life and thought of the people they are visiting, the great majority of trippers are barred by the barrier of language. Without the international language youth holiday groups are helpless to further in any real sense the ideal of international understanding which their organiser is serving with such enthusiasm.—Revised from The Worker E-ist.

INTERNATIONAL PRESS SERVICE.

To honor United Nations Day the U.N. publishes a colored poster with the flags of the 81 affiliated lands together with text in Esperanto.

The Anthology of English Literature, over 300 pages, is meeting ready sale. It takes its place with the other Esperanto anthologies of national literatures—Catalan, Czechoslovakian, Swiss, Hungarian, Swedish, Belgian, Bulgarian and Polish.

In Budapest, Kossuth Radio broadcast a talk on the chief Esperanto poet, Dr. K. Kalocsay. His masterpiece is the translation of "La Inferno" (Dante), perfectly following the original metrical form. Many students of Dante affirm it to be one of the most perfect of existing trans-

lations, in sense and harmonic fidelity.

The Nobel Prize-winner for Medicine, Daniel Bovet, son of Prof. Pierre Bovet, speaks Esperanto perfectly. His father used Esperanto extensively in pedagogic circles.

Sharp complaint was made before the Italian Chamber of Deputies at "the arbitrary and loose" treatment of Italian grammar by radio and television workers. It was stated that no Italian knows how to use the Italian language correctly, and it is "almost impossible for a foreigner to learn it."—Edited by G. C. Figliera.

MIRINDA PENSILO.

Studante lingvon, oni lacigis la kapon per tiom da konjugacioj, deklinacioj, malregulaĵoj, idiotismoj, mallogikajoj, kaj demandas al si mem: "Kial la homoj kreis lingvojn tiel malfacilajn kaj neniam sufiĉe klarajn por esprimi iliajn pensojn? Ĉu ili ne povus krei instrumenton matematike regulan?"

Ili ja povus. La skribajo povus esti tute fonetika: nur unu sola konjugacio por ĉiuj verboj sufiĉus; nur unu deklinacio; ĉiujn antonomiojn oni povus formi per unu sola prefikso ĉiam; ĉiuj substantivoj, adjektivoj, adverboj, verboj povus havi karakterizajn finaĵojn; la pluralo kaj la ina genro povus esti ĉiam regulaj.

Serio da prefiksoj kaj sufiksoj klare difinitaj povus doni al verboj, substantivoj k.c. ĉiujn deziratajn nuancojn: ekzemple, de la radiko LERN oni povus krei ĉiam regule: eklerni, prilerni, ellerni, mallerni, lernigi, lernegi, lernadi, lernado, lernigado, lernajo, lernanto, lerninto, lernantaro, ellerninto, lernolibro, lernejo, lernejaĉo, lernejestro, alternejo, arternejo, lerniga, lernludilo k.t.p. senfine, kiom la homa kapo povus nur koncepti.

Kia mirinda instrumento por la penso estus tia science perfekta lingvo! Kiel ĝi entuziasmigus la intelligentajn pensulojn!

Tia mirinda pensilo tamen ekzistas jam de 71 jaroj, sed la intelligentaj pensuloj estas tiom malmultaj!

—IGB en Semado.

NIA GASTARTIKOLO.

Carl Barthel.

Antaŭ 55 jaroj mi legis artikoleon pri E-o. Vizitinte mondkongresojn, kiuj uzis nur nacilingvojn, mi konstatis, ke tiuj kunvenoj estus kondamnitaj al plena fiasko jam de la komenco. Mi do tuj decidis labori por E-o. Mi fondis en Sept-o 1904 nian Frankfurton grupon, kaj iris al Boulogne por alesti la Unuan Kongreson.

Zamenhof plezuris konatiĝi kun mi kaj promesis al mi viziti Frankfurton en 1906-7. La facila interkomprenado ĉe la Kongreso alte miris, kaj la preĝo de Zamenhof, per kiu li inaŭguris ĝin, estas por mi neforgesebla. Pro la dubemo de multaj E-istoj alestis nur preskaŭ 650, sed la afero funkciis bonege . . . ne nur la oficialaj kunsidoj sed ankaŭ la teatraĵo de Moliere ("La Edziĝo Kontraŭvola") k.t.p.

Por ni ĉiuj, la senlima modesteco de Zamenhof faris penetran impreson. La fajroprovo de Boulogne estis eltenita dank'al la sentimo kaj kredo de la tiamaĵ pioniroj, el kiuj nur tre malmultaj ankoraŭ vivas. Sed tiu anima forto donis al ni la mensan kaj spiritan harditecon por kontraŭbatali ĉiun provon ŝanĝi aŭ modifi E-on. Sen la Interna Ideo nenia projekto de internacia lingvo eĉ povas esperi ekzisti. Ne la lingvo, sed la Interna Ideo, estas la kerno de la movado.

Bedaŭrinde iuj E-istoj riproĉis al la Majstro, ke li volas fari novan kredon aŭ religion. NE! Tion li ne volis. Li volis forigi lan sangajn militojn kaj eduki la mondon al daŭra paco. La Germana gubernatoro, Majoro Neubarth, diris ĉe lia ĉerko:—"Zamenhof estis unu el la plej grandaj bonfarantoj de la homaro. Liaj meritoj estos nur pli malfrue rekonataj de la mondo."

Ni danku eterne al li, kiu metis la fundamenton de nia lingvo, kiu iom post iom evoluigos laŭ naturaj bezonoj.

Ni iros antaŭen kun kredo, fervor', Benante la Majstron pro verko, Kaj lian anaron de plej frua hor' Fidelan al li ĝis la ĉerko. La mond' aliĝos, la temp' pasos for, Sed restos eterne ilia memor'.

The Australian Esperantist

("La Rondo")

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15\$ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5\$.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.

Adreso de A.E.A.—Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

Kasisto: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

N-ro 7 (87)

MELBURNO.

Decembro, 1958

LANGUAGE MAY KILL

Lives are the Currency Ignorance Pays to Death.

On 15.8.57, an "Aeroflot" liner from Moscow was sighted at Kastrop, Copenhagen airport. The Flight Controller started radiophoning landing instructions. Something must have gone wrong. With quick apprehension, he called upon a Russian interpreter. But it was too late. The airliner crashed into the sea. Out of the 23 passengers and 5 crew not a soul was saved. The tape recording of the earth-to-sea-conversation shows that the Controller was right in his surmise; the pilot did not understand him, nor he the pilot, and yet, both were supposed to speak the same language—the international aviation code based on the English language which should obviate the need for an international language. Yet, its necessity is obvious in the case of aviation whose efficiency and safety are conditioned by co-operation between the operating aircrews and ground crews.

All of us remember the mid-Atlantic collision of "Andrea Doria" and "Stockholm". It appears that the appalling toll of death was largely due to the fact that the multilingual passengers were unable to follow emergency orders. No wonder that already in 1951 the Inter-Civilian Airtransport Organisation stated clearly that "The universal availability of at least one medium of radiotelephony communication is necessary for the safety of international air navigation as well as for its efficiency". The overwhelming pres-

sure of the U.S.A. and British air-navigation interests from the very beginning determined the issue, i.e., the adoption of English. ICAO was not unaware of the inherent danger due to "air crew and ground personnel possessing a mother tongue other than English". So the language was adapted to become—not a language—but a code of set phrases and sentences to meet any situation. The first large-scale test of a similar code for the Navy during the Mediterranean NATO exercises showed it to be operating only if both partners possessed a full knowledge of English.

Why? Because codification on paper does not provide for codification in sound. The Russian pilot and the Danish operator could not understand each other's pronunciation of the code. National languages are difficult for foreigners not only because of their structure but also their phonetic pattern. English has adopted many international elements, but it has assimilated them to its own phonetic pattern, so that they are no more recognizable internationally. Were these reduced to a simple international phonetic pattern the English themselves would have to learn this internationalised English as a language completely new and foreign.

So, why not make a further step: why not integrate the international elements of English into a homogeneous system of communication cap-

able of meeting any contingency? As a matter of fact, this would result in . . . Esperanto!—whose phonetic clearness is unsurpassable, as shown by the long-distance telephonic articulation tests of the Inter. Telephone Consultative Committee as far back as 1924. This solution was set out with compelling force by E. D. Durrant in his paper read before the Language Committee of the (British) Ministry of Civil Aviation in 1952. We know that the solution was not adopted. Another attempt at internationalisation of English, the miserable failure of Basic English, can be expressed in terms of taxpayers' money lost. The price of the aviation "Basic" is human life. Languages may kill as efficiently as guns, if put to improper use.

—"The Worker Esperantist"
(Nov., 1957).

THE "A.E." NUMBER 84.

"Vi demandas: Ĉu iu kapablas traduki la poemojn de Browning en klare komprenatan Esperanton?"

"Estas necese unuavice difini: klare komprenata de kiu? La komprenebleco de la traduko devas esti sur la sama nivelo kiel la komprenebleco de la originalo. Tro ofte, klarigi signifas simpligi, kaj tio estas neinda se temas pri poemo. Simpligi estas mistraduki. Se nur kelkaj 'komprenas' la originalon (pro manko de poezia sento kaj eduko, aŭ aliaj kaŭzoj), verŝajne nur kelkaj 'komprenus' ankaŭ la tradukon.

"Sed estas vane, diskuti tiajn problemojn **teorie**; tial mi proponas, ke vi elektu poemon el Browning, kies traduko estas, laŭ vi, "malebla" pro la 'enigmeco' de la originalo. Mi klopodos traduki ĝin en E-on. Se mi sukcesos, vi presigu mian tradukon en The A.E., kaj tiam povos okazi diskuto pri la traduko.

"Ŝajnis al mi, ke la supra eksperimento, kies sola celo, kompreneble, estus ricevi impreson pri la tradukebleco de ŝajne netradukebla poemo, povus esti utila kontribuo al la studo de nia lingvo".—W. Auld, 15.11.58.

Proponata estas: Prospice, aŭ alternative, The Lost Leader.

Ni dankas s-ron Auld, kiu tiel honoras nin per sia valora laboro pri tiu

temo, kaj certe aperigos lian tradukon, malgraŭ konstatoj de individuoj pri ĝia sukceso aŭ nesukceso. La provo ne povus esti farata de plibona "atakanto".—Red.

VETERAN LATVIAN ESPERANTO SCHOLAR

In Kirov Avenue, in the Latvian town of Pumpuri, lives Int Chache, a former linotype operator, now on pension. On his numerous bookshelves there are 6000 volumes in 33 languages. He will tell you that there is nothing extraordinary about this, because the books Prof. Bokarev, D.Sc. (philology), a Moscow Esperanto scholar, has in his private library are in more than 100 languages.

Among the many interests of Int Chache the chief has always been Esperanto, which he studied as a boy. Back in 1909 Chache became a member of the Latvian Esperanto Society and was secretary of the Society *Espero* in St. Petersburg from 1914 to 1922.

December last year the veteran made a report at the Gorky Science Club of the U.S.S.R. Academy of Sciences in Leningrad, where he shared with the audience his reminiscences of his meeting with Lenin, who in 1918 invited to the Smolny Institute Prof. V. Devjatnin, President of the group *Espero*, and Int Chache. A. Lunacharsky, People's Commissar of Education, took part in the discussion. Lenin suggested that a congress of Esperanto scholars be called. It took place later. Maxim Gorky also twice visited the *Espero* Society.

Chache returned to Latvia in 1922 and helped to develop the Esperanto movement there. He directed courses, published a textbook in 1926. In 1930 his translation into Esperanto of Rainis' play "Love is Stronger Than Death" gained a reading public in 83 countries.

The Latvian Esperanto scholars have now prepared an anthology of Latvian literature for publication with contributions from 29 authors. Chache is now engaged on an international reader with examples of folklore from 123 peoples.—"Here and There in the Soviet Union": sent by Dr. F. Williams.

able of meeting any contingency? As a matter of fact, this would result in . . . Esperanto!—whose phonetic clearness is unsurpassable, as shown by the long-distance telephonic articulation tests of the Inter. Telephone Consultative Committee as far back as 1924. This solution was set out with compelling force by E. D. Durrant in his paper read before the Language Committee of the (British) Ministry of Civil Aviation in 1952. We know that the solution was not adopted. Another attempt at internationalisation of English, the miserable failure of Basic English, can be expressed in terms of taxpayers' money lost. The price of the aviation "Basic" is human life. Languages may kill as efficiently as guns, if put to improper use.

—"The Worker Esperantist"
(Nov., 1957).

THE "A.E." NUMBER 84.

"Vi demandas: Ĉu iu kapablas traduki la poemojn de Browning en klare komprenatan Esperanton?"

"Estas necese unuavice difini: klare komprenata de kiu? La komprenebleco de la traduko devas esti sur la sama nivelo kiel la komprenebleco de la originalo. Tro ofte, klarigi signifas simpligi, kaj tio estas neinda se temas pri poemo. Simpligi estas mistraduki. Se nur kelkaj 'komprenas' la originalon (pro manko de poezia sento kaj eduko, aŭ aliaj kaŭzoj), verŝajne nur kelkaj 'komprenus' ankaŭ la tradukon.

"Sed estas vane, diskuti tiajn problemojn **teorie**; tial mi proponas, ke vi elektu poemon el Browning, kies traduko estas, laŭ vi, "malebla" pro la 'enigmeco' de la originalo. Mi klopodos traduki ĝin en E-on. Se mi sukcesos, vi presigu mian tradukon en The A.E., kaj tiam povos okazi diskuto pri la traduko.

"Ŝajnis al mi, ke la supra eksperimento, kies sola celo, kompreneble, estus ricevi impreson pri la tradukebleco de ŝajne netradukebla poemo, povus esti utila kontribuo al la studo de nia lingvo".—W. Auld, 15.11.58.

Proponata estas: Prospice, aŭ alternative, The Lost Leader.

Ni dankas s-ron Auld, kiu tiel honoras nin per sia valora laboro pri tiu

temo, kaj certe aperigos lian tradukon, malgraŭ konstatoj de individuoj pri ĝia sukcesos aŭ nesukcesos. La provo ne povus esti farata de plibona "atakanto".—Red.

VETERAN LATVIAN ESPERANTO SCHOLAR

In Kirov Avenue, in the Latvian town of Pumpuri, lives Int Chache, a former linotype operator, now on pension. On his numerous bookshelves there are 6000 volumes in 33 languages. He will tell you that there is nothing extraordinary about this, because the books Prof. Bokarev, D.Sc. (philology), a Moscow Esperanto scholar, has in his private library are in more than 100 languages.

Among the many interests of Int Chache the chief has always been Esperanto, which he studied as a boy. Back in 1909 Chache became a member of the Latvian Esperanto Society and was secretary of the Society *Espero* in St. Petersburg from 1914 to 1922.

December last year the veteran made a report at the Gorky Science Club of the U.S.S.R. Academy of Sciences in Leningrad, where he shared with the audience his reminiscences of his meeting with Lenin, who in 1918 invited to the Smolny Institute Prof. V. Devjatnin, President of the group *Espero*, and Int Chache. A. Lunacharsky, People's Commissar of Education, took part in the discussion. Lenin suggested that a congress of Esperanto scholars be called. It took place later. Maxim Gorky also twice visited the *Espero* Society.

Chache returned to Latvia in 1922 and helped to develop the Esperanto movement there. He directed courses, published a textbook in 1926. In 1930 his translation into Esperanto of Rainis' play "Love is Stronger Than Death" gained a reading public in 83 countries.

The Latvian Esperanto scholars have now prepared an anthology of Latvian literature for publication with contributions from 29 authors. Chache is now engaged on an international reader with examples of folklore from 123 peoples.—"Here and There in the Soviet Union": sent by Dr. F. Williams.

In "La Belga Esperantisto" (July, 1958) is a note confirming this meeting. It adds that E. Drezen also was present. Lenin said he learned Esperanto from a French textbook when a young man, and remarked that at the Second International at Brussels in June, 1914, he addressed the gathering in French and Esperanto. Further, that Gorky spoke Esperanto at the two meetings he attended at the Espero Society.—Ed.

POR VIN DISTRI . . .

Scienco recenza: Pri "La 13 Mortis": ". . . la rakonto estas lerte elpensita, la psikologio estas ĝenerale laŭhoma, la malvolvo de la problemo interese prezentita". (V. Verda en "Brit. Esperantist").

". . . mi malofte legis detektivan romanon tiel seninteresan, neverŝajnan kaj miskonstruitan". (Waringhien en "Sennaciulo").

Pri "Misteroj de l'Vivo": "La kvara novelo, La Fremdulo, estas malsupera kvalite . . . banala . . . saturita de mistikismo" (N.B. en "Sennaciulo").

"La kompozicio de La Fremdulo estas la plej harmonia . . . kaj en sia speco apartenas al la plej sukcesaj (el la noveloj en la libro)." (F. Szilagy en "Arbetar Esperantisten.")

"La sola fakto, kiun mi povas memori pri la rapideco de la lumo, estas, ke ĝi venas tro frue en la matenoj."

Demandite pri tio, kial li neniam vizitis ĉevalkonkurson, Prez. Kruger respondis: Mi estas maljuna. Kaj mi bone scias, ke unu ĉevalo povas kuri pli rapide ol alia. Mi tute indiferas pri tio: kiu el ili estas la pli rapida.

Malaprobante le neologismojn "lanta", "frida", "febla" k.c., D-ro F. R. en "Belga E-isto" averte plendas pri ilia preskaŭ tute Okc.-Eŭropa karaktero. Li strange komentas, mem aldonante al tio, kion li "neaprobas"—"Sed ĉu la supremacio restos ĉiam en Okcidenta Eŭropo? Imagu ke tiu supremacio transiras al alia mondparto . . ." Pato ripročas poton pri ties nigreco!

Cikanetuloj amas pripiki le redakciojn de ĵurnaloj, riproĉante pri komposteraroj en ties teksto. Saĝe estus, ke ili pli atentu la penserarojn ol la preserarojn.

Australia Kroniko

(Sendu regule raportojn al la Sub-Redaktoro de ĉi-tiu rubriko, S-ro Herbert Koppel, ĉe A.E.A., Box 2122T, Elizabeth St., Melbourne.)

● **PERTH:** S-ino Gertrude Pollard jam sukcesis kun honoro en la skriba parto de la ekzameno por la Diplomo de la Brita E-Asocio. Nia klubo tre ĝojas pri ŝia sukceso, kiu kronas agadplenan celkonscian oficerperiodon kiel Prezidanto de la Ligo.

Dum sia baldaŭ finiĝonta periodo kiel Prezidanto, ŝi ne nur fidele plenumis la devojn de sia ofico, sed ankaŭ multe kaj sukcese klopodis por plibonigi la financon staton de la Ligo kaj aktivigi ĉiun membron. Aldone al tio, ŝi daŭre plenumis la oficon de kursgvidanto, taskon kiun ŝi senlace akceptas, jaron post jaro, malgraŭ tio ke ŝi nun loĝas iom malproksime de la urbo. Ni fiere gratulas nian novan Diplomiton.

La Zamenhofa Festo tagmanĝo ĉe la bela nova restoracio en King's Park kaj poste societa vespero ĉe nia kutima rendevuo por tiaj okazoj—la ĉambraro de Women's Service Guild.—R.McG.

● **HOBART:** Okaze de nia monata societa kunveno, 2.11 ni detale diskutis la preparlaborojn por la 12-a Aŭstralia E-Kongreso en nia urbo. Nia prezidanto, s-ano M. Leereveld, gvidis la diskutojn kaj nia loka taggazeto raportis detale pri la okazonta kongreso.—G.E.L.

● **CANBERRA:** Nia novembra kunveno okazis ĉe la hejmo de geroj Fulop. S-ro Fulop preparis interesan programon kaj la vespermanĝo de s-ino Fulop estis kiel kutime ege bongusta. Ni ankaŭ diskutis kiamaniere subteni la Zamenhof-Kampanojn kaj pridiskutis tiucele la aranĝon de "Jubilea Danco" en Albert Hall.

● **BRISBANE:** Nia societo havis 4 kandidatojn por la Pyke-ekzameno. Du el ili estas junuloj de Romkatolika kolegio ĉe Toowoomba.

Ni ĝojas raporti ke nia s-ano Majoro S. H. Beck jam eliris en Greenslopes Armeo-Hospitalo post grava operacio.—S. L. Parry.

● **SYDNEY:** Spite de la grava bato kiu nia societo ricevis pro la perdo de nia bela ejo, nia klubo tamen nun antaŭeniras firme kaj kurage. Ni trovis ripozejon por kelkaj el niaj mebloj en la hejmo de niaj fidelaj membroj la familio Feldmayr. La ceteron ni transportis al la Ingersoll Halo, centro de la Raciista Asocio. Nia monata kunveno okazos posttagmeze la unuan dimanĉon en ĉiu monato en tiu halo, kaj ni ankoraŭ kunvenas vespere ĉiun duan merkredon en alia ĉambro en Sidnejo: 333 George Street, apud Stacidomo Wynyard—do facile atingebla por ni.

Dum la pasintaj semajnoj nia fidela sam-o Fritz Mueller-Soraŭ strebis starigi Esperanto - Institution en Kings Cross, sed la sukceso, malgraŭ granda elspezo de lia propra havaĵo por reklamoj k.t.p., ne estas tre esperplena.

La Skolta Asocio petis de ni intervjuon pri E-o kiel lingvo uzebla por la interpretista kaj lingvista ŝildoj de la skoltoj. La ĉefulo petis artikolon por la skolta gazeto; ĝin ni tuj sendis. Samtempe li starigis la Klubon kiel oficialan ekzamen-aŭtoritaton por la skolta movado en N.S.W. Ni ĝoje akceptis tiun respondecon.

Du delegitoj ĉeestis kunvenojn de la Pacasembleo de N.S.W. kaj faris ekspozicion de Esperanta materialo tie. Unu aliĝis al la rondo por Eduko kaj Kulturo kaj la alia al la rondo de Pacifistoj kaj Religiaĵoj. Ambaŭ parolis pri Esperanto kaj en la fina raporto Esperanto estis rekomendita kiel kunligilo por la paco.

